3/ 6. • 16,– Ft

HUNGARA VIVO











Aperis unu el la sensaciaĵoj de la Kristnaska hungarlingva librooferto,

represo de

„Emlékkönyv a Székely Nemzeti Múzeum 50 éves jubileumára"

(Memorlibro por la 50 jara jubileo de la Sikula Nacia Muzeo), aperinta la unuan fojon en la jaro 1929, en du volumoj, kiuj kune kostas 470,- Ft.

Depost la libro de Balázs Orbán ĝi estas la plej altnivela libro, verkita pri sikula temo.

Omaĝe al la 110 jara jubileo de la Sikula Nacia Muzeo.

La Eldonejo por ĉiu vendita libro transpagos 10,- forintojn al la konto de helpo al la rifuĝintoj el Transilvanio.

Adreso:

CASTOR & POLLUX

Komerca, Teknika kaj Reklamperanta Etkooperativo

1011 Budapest, Fő u. 56-58. VI.42.

Mi mendas ĉe Vi la libron „Emlékkönyv a Székely Nemzeti Múzeum 50 éves jubileumára" en .....ekzempleroj.

Mi promesas pagi la prezon de la libro kaj la sendkostojn ĉe ties ricevo.

Nomo: .....

HUNGARA VIVO

ENHAVO

Buller, O.: Esperanta roman-rikolto 202
Benczik, V.: Ludante iom per la ciferoj 204
Tvarozek, E.: Je la dua post nokto-mezo... 208
Djutĉin, Ŝ. – *Atanasova,* A.: La sciuro 211
Ungar, K.: Februaro, Aŭtuna korkanto 213
Ragnarsson, B.: Baroj 213
Ertl, I.: El la Libroj de Forgeso kaj Komenco 214
Maron, M.: Rubusoj 216
Lapenna, E.: Lanĉo 217
Panoramo 222
Fenyvesi, Ervin: Revuo de revuoj 225
Golden, B.: Piĝinoj, kreolaj lingvoj kaj planlingvoj 228
Ternavski, M.: Sep 234
Konkurso por verkado de originalaj romanoj 235
„La laŭta vekhorloĝ"o 237
Krucenigmo, Ekzameno sen risko 243
Leterkesto, Korespondi deziras 244

Sur la frontpaĝo: la Esperanta libro-rikolto de 1988, minus unu libro, kiu ankoraŭ ne alvenis el Brazilo.
Foto de Z. Fejér.

Revuo de
Hungara Esperanto-Asocio
Adreso:
Budapest, I. Szentháromság tér 1-3.
Telefono: 563-659, 564-093
Poŝta adreso:
Pf. 193, H-1368 Budapest
Aperas dumonate
XXVIIIa jaro, 1988 n-ro 6
(142)
Készült a MÉMMI Agrinprop irodájában, Gödöllő – 238/89



Originalaj romanoj...

lastatempe tiel multnombre aperas, ke eblis plenigi la frontpaĝon de tiu ĉi numero sole per titoloj de la finiĝanta jaro. Tiu montrofenestro eĉ ne prezentas la tutan rikolton de 1988, kiel vi konstatos, se vi studos la bibliografion de ĉiuj originalaj Esperanto-romanoj ĝis nun aperintaj.

La originala romano efektive ĉefrolas ĉi-numere. Krom la bibliografio, vi trovos ankaŭ analizan superrigardon pri ĝi, kiu espereble instigas ankaŭ vin al propraj pripensoj kaj konkludoj. La temon kompletigas la recenzoj, ĉi-foje ekskluzive pri originalaj romanoj lastatempaj.

La Jubilea Jaro estis rekorda romanjaro: la rikolto de sep titoloj kompare kun antaŭaj jaroj preskaŭ rajtigis uzi la vorton „amaso". Mi verŝajne ne estis la sola, kiu kredis, ke post tiu pinto ni revenos al la kutima ritmo de la lasta tempo, du-tri romanoj jare. Sed jen surprizo: la rekordo de 1987 tuj en la posta jaro estis superita! Jam baldaŭ ni povos festi la aperon de la jubilea centa romano, almenaŭ laŭ la kriterioj de nia bibliografio.

Nu, mi ankoraŭ ne pretas cedi mian skeptikon pri la kapablo de nia merkato engluti ĉiujare sep-ok novajn romanojn. Espereble tiu skeptiko montriĝos malprava en tiu testo, kiun la merkato nun spertas. Kiel ajn, la romano fariĝis la ĉefa kaj plej vitala kampo de la hodiaŭa Esperanta literaturo.

Preskaŭ cent libroj jam rajtigas rimarkojn pri mankoj rilate temojn kaj ĝenrojn aŭ pri malekvilibro inter ili, eĉ se kiel ajn subjektivaj estus tiaj taksoj. Inter miaj plendoj unu ĉefas. Mi ne povas ne grumbli, ke en tiu cento malmultaj estas, en strikta senco, priesperantistaj laŭ la temo: laŭ mi nur *Maria kaj la grupo, La litomiŝla tombejo* kaj *Ombro sur interna pejzaĝo.* Ja en multaj Esperanto iel rolas, pli aŭ malpli nature. Sole tio tamen ne sufiĉas, por ke temu pri verko, kiu beletre priesploras, reflektas, problemigas la vivon, celadon kaj historion de nia unika komunumo kaj ties membroj. Ĉi-rilate nia romano postrestas la poezion. Se do iu eldonisto frontas la dilemon elekti inter tia manuskripto kaj plia krimromano, li jam divenas mian sugeston...

Sed mi ne plendu. Inter la ceteraj verkoj ja estas multaj bonegaj. Kaj ju pli da novaj aperos, des pli da tema riĉeco. La estonteco de la originalaj romanoj dependas de vi, kiu legas tiujn ĉi liniojn. Vi voĉdonas per viaj aĉetoj.

Osmo Buller

ESPERANTA ROMANRIKOLTO

94 romanoj dum 82 jaroj

ENKONDUKO AL LA LISTO DE ROMANOJ:

Apendice al **VERECO, DISTRO, STILO. Romanoj en Esperanto** *de William Auld (Saarbrücken: Artur E. Iltis 1981) aperis kronologia listo de 52 originalaj Esperantaj romanoj. Por distingi romanon disde rakonto/novelo, ĝi fiksis la minimuman amplekson je ĉ. 100 paĝoj. La plej mallonga verko, kiu eniris ĝin, havas 88 paĝojn, t.e.* **Neologisme** *de Lorjak (1975).*

La jena listo aplikas la saman kriterion pri paĝonombro – la plej malvasta estas Auli (1934) de H. Adamson, mankanta ĉe Auld. Pensante, ke ĉe dubaj kazoj ĉi-speca listo prefere akceptu anstataŭ ellasi, mi enprenis ankaŭ **Kanako el Kananam** *(1960) de K. Linton, kiun Auld malakceptis kiel nefikcian. (Ekz. la plej populara nuntempa finna romanisto Kalle Paatalo verkas aŭtobiografie kun plena nefikcieco de ĉiuj detaloj. Post longa ignorado la kritiko nun akceptas lin inter beletristojn.) Kiuj aplikas pli striktajn kriteriojn, tiuj facile kribras mian liston konforme al ili.*

Bibliografio de originalaj Esperanto-romanoj

1907 VALLIENNE, [Henri]: **Kastelo de Prelongo.** Paris: Hachette 1907. 515 p.

1908 VALLIENNE, [Henri]: **Ĉu li?** Paris: Hachette 1908. 447 p. – **Ĉu li?** I. vol. Reviziita de K. Kalocsay. Budapest: Literatura Mondo 1938. 195 p.

1912 LUYKEN, H[einrich] A[ugust]: **Paŭlo Debenham.** London: British Esperanto Ass.; Gen138ve: Universala Esperantia Librejo 1912. 227 p.

1913 LUYKEN, H[einrich] A[ugust]: **Mirinda amo.** London: British Esperanto Ass. 1913. 295 p.

1915 TAGULO [t.e. H.B. Hyams]: **Nova sento. Filozofia romano.** London: British Esperanto Ass. 1915. 155 p. – 2a eld. 1925.

1918 SINNOTTE, E. Alleyne: **Lilio.** Londono: Brita Esperantista Asocio 1918. 194 p.

1920 ARGUS [t.e. Friedrich Ellersiek]: **Pro kio? Internacia kriminalromano.** Berlin: Ellersiek 1920. 157 p. (Nova Esperanto-Biblioteko, 5.)

1922 LUYKEN, H[einrich] A[ugust]: **Stranga heredaĵo.** Leipzig: Hirt 1922. 319 p.

1923 BULTHUIS, H[indrik] J[an]: **Idoj de Orfeo.** Den Haag: Bulthuis 1923. 542 p.
FORGE, Jean [t.e. Jan Fethke]: **Abismoj.** Leipzig: Hirt 1923. 149 p. Repr. Helsinki: Fondumo Esperanto 1973. 150 p. (Serio Forge. 1.)
SENTIS, H.: **Blua kardo.** Grenoble: Allier 1923. 140 p.

1924 FORGE, Jean [t.e. Jan Fethke]: **Saltego trans jarmiloj.** Leipzig: Hirt 1924. 189 p. – Repr. Helsinki: Fondumo Esperanto 1973. 196 p. (Serio Forge, 2.)
LUYKEN, H[einrich] A[ugust]: **Pro Iŝtar. Romano el la antikva Babela historio.** Leipzig: Hirt 1924. 303 p.

1925 BAGHY, Julio: **Viktimoj. Romano el la vivo de siberiaj militkaptitoj.** Budapest: Hungara Esperanto-Instituto 1925. 162 p. – 2a eld. Budapest: Hungara Esperanto-Societo Laborista 1930. 237 p. – 3a eld. Budapest: Bleier [1934?] 237 p. – Repr. de la 3a eld. Kopenhago: TK 1971. (Kunbindita kun Sur sanga tero).

1926 BULTHUIS, H[indrik] J[an]: **Jozef kaj la edzino de Potifar aŭ Idoj de Merkuro kaj Eroso.** Horrem bei Köln: Heroldo de Esperanto 1926. 188 + 200 p.

1927 JUNG, Teo: **Landoj de l'fantazio.** Horrem bei Köln: Heroldo de Esperanto 1927. 323 p.

1928 BULTHUIS, H[indrik] J[an]: **La vila mano.** Idoj de Cereso. 's-Gravenhage: Ykema 1928. 299 p.

1930 BAGHY, Julio: **Hura! Ne romano, nur grimaco.** Budapest: Literatura Mondo 1930. 411 p. – 2a eld. Budapest: Hungara Esperanto-Asocio 1986. 438 p.
ENGHOLM, Stellan: **Al Torento.** Köln: Heroldo de Esperanto 1930. 93 p. – 2a eld. Stockholm: Eldona Societo Esperanto 1934. 93 p. – Repr. Aabyhoj: Dansk Esperanto-Forlag 1972.
SCHWARTZ, Raymond: **Anni kaj Montmartre.** Paris: Solsona 1930. 126 p. – Repr. Aabyhoj: Dansk Esperanto Forlag 1972.

1931 BAGHY Julio: **Printempo en la aŭtuno. Rakonto pri dolĉe melankolia renkonto.** Köln: Heroldo de Esperanto 1931. 113 p. – Repr. Aabyhoj: Dansk Esperanto-Forlag 1972. – Repr. Beijing: El Popola Ĉinio 1981. 169 p. (Kun paralela ĉina traduko fare de Bakin.)

1931 FORGE, Jean [t.e. Jan Fethke]: **Mr. Tot aĉetas mil okulojn.** Budapest: Literatura Mondo 1931. 244 p. – 2a eld. 1934. – Repr. de la 2a eld. Helsinki: Fondumo Esperanto 1973. (Serio Forge, 3.)

1932 BOATMAN, Douglas P.: **La nekonata konato. Mistera rakonto.** Köln: Heroldo de Esperanto 1932. 121 p. – Repr. Kopenhago: TK 1977
ENGHOLM, Stellan: **Homoj sur la tero.** Budapest: Literatura Mondo 1932. 201 p. – 2a eld. (reviziita) La Laguna: Régulo 1963. 235 p. (Stafeto. Belliteratura serio, 21.)

1933 BAGHY, Julio: **Paŭlo Paal. Mejloŝtonoj el la vi-**

vo de unu el ni. 174 p. en Verdaj donkiĥotoj, Budapest: Szalai 1933. 221 p

BAGHY, Julio: **Sur sanga tero. Mozaikromano.** Daŭrigo de la romano **Viktimoj.** Budapest: Szalai 1933. 264 p. – 2a eld. 1933. – Repr. de la 1a eld. Kopenhago: TK 1971. (Kunbindita kun Viktimoj.)

VARANKIN, V[ladimir]: **Metropoliteno.** Amsterdam: Ekrelo 1933. 200 p. – 2a eld. Kopenhago: TK 1977. 252 p.

1934 ADAMSON, Hendrik: **Auli. Rakonto pri knabeto.** Budapest: Literatura Mondo 1934. 86 p. – Repr. Saarbrücken: Artur E. Iltis 1983.

ENGHOLM, Stellan: **Infanoj en Torento. Skizo.** Budapest: Literatura Mondo 1934. 114 p. – 2a eld. Stockholm: Eldona Societo Esperanto 1946. 100 p. – Repr. de la 2a eld. Aabyhoj: Dansk Esperanto-Forlag 1972.

WEINHENGST, Hans: **Tur-strato** 4. Budapest: Literatura Mondo 1934. 174 p.

1935 MEYE, Richard: **La longa vojo.** Köln: Heroldo de Esperanto 1935. 138 p.

1936 EMBA [t.e. Imre Baranyai]: **Maria kaj la grupo.** Budapest: Literatura Mondo 1936. 172 p.

BARTELMES, N[orbert]: **Juneca ardo.** Paris: SAT 1936. 119 p.

1937 BAGHY, Julio: **La verda koro. Facila romaneto el la vivo de esperantistoj en Siberio.** Budapest: La nederlandaj geamikoj de la aŭtoro 1937. 97 p. – 2a eld. Rotterdam 1947. 74 p. – 3a eld. Amsterdam 1954. 93 p. – Repr. de la 1a eld. Warszawa 1962. – Repr. de la 1a eld. Helsinki: Fondumo Esperanto 1969. – Repr. de la 1a eld. Budapest: Hungara Esperanto-Asocio 1982. 104 p.

1938 BARTELMES, N[orbert]: **Vartejoj.** Paris: SAT 1938. 128 p.

BULTHUIS, H[indrik] J[an]: **Inferio.** [Den Haag]: Internacia Cseh-Instituto de Esperanto 1938. 147 p.

1939 ENGHOLM, Stellan: **Infanoj en Torento.** 2a parto. Stockholm: Eldona Societo Esperanto 1939. 144 p. – Repr. sub la titolo Junuloj en Torento. Aabyhoj: Dansk Esperanto-Forlag 1972.

1945 EGERRUP, H.L.: **D-ro Dorner.** Aabyhoj: Dansk Esperanto-Forlag 1945. 208 p. – Repr. 1972.

1946 ENGHOLM, Stellan: **Vivo vokas.** Stockholm: Eldona Societo Esperanto 1946. 180 p. (Stelo Libro, 4.)

1949 SAYERS, James: **Invito al ĉielo.** München-Pasing: Ziegler 1949. 205 p.

1950 ROSSETTI, Cezaro: **Kredu min, sinjorino!** [Scheveningen]: Heroldo de Esperanto [1950]. 260 p. – Repr. Londono: SAT en Britio [1974].

1958 SZATHMÁRI, Sándor: **Vojaĝo al Kazohinio.** Paris: SAT 1958. 315p.

SZILÁGYI, Ferenc: **Tiel okazis aŭ Mistero minora.** Kopenhago: Koko 1958. 119 p. – Repr. Saarbrücken: Artur E. Iltis 1982.

1959 ZIVANOVIC, Stevan: **La sonorilo de Bled.** Beograd: Knjiga 1959. 112 p.

1960 LINTON, Kenneth G.: **Kanako el Kananam.** Rickmansworth: Esperanto Publishing Co. 1960. 200 p.

1963 RIBILLARD, Jean: **Vivo kaj opinioj de Majstro M'Saud.** La Laguna: Régulo 1963. 143 p. (Stafeto. Beletraj Kajeroj, 18.)

SCHWARTZ, Raymond: **Kiel akvo de l'rivero.** La Laguna: Régulo 1963. 487 p. (Stafeto. Belliteratura serrio, 19/20.) – Repr. Aabyhoj: Dansk Esperanto-Forlag 1977. – Repr. Saarbrücken: Artur E. Iltis 1987.

1975 LORJAK [t.e. J.L. Mahé]: **Neologisme.** Helsinki: Fondumo Esperanto 1975. 88 p.

1976 LORJAK, [te.e. J.L. Mahé]: **Transe.** Helsinki: Fondumo Esperanto 1976. 153 p.

MIYAMOTO Masao: **Naskitaj sur la ruino** – Okinavo. Oosaka: Pirato 1976. 146 p.

OKA Kazuta: **Matenruĝo. La juneco en la tridekaj jaroj.** Kioto: L'Omnibuso 1976. 191 p

VALANO, Johán [t.e. Claude Piron]: **Ĉu vi kuiras ĉine?** Aabyhoj: Dansk Esperanto-Forlag 1976. 136 p. – Repr. 1983.

1977 ROSBACH, Johan Hammond: **Fianĉo de l'sorto.** Aabyhoj: Dansk Esperanto-Forlag 1977. 192 p.

1978 FRANCIS, John: **La granda kaldrono.** Antverpeno – La Laguna: TK-Stafeto 1978. 592 p. (Bel-literatura eldon-serio, 37.)

LORJAK [t.e. J.L. Mahé]: **Retoj.** Helsinki: Fondumo Esperanto 1978. 207 p. (Felietone en **Franca Esperantisto**, 1946.)

VALANO, Johán [t.e. Claude Piron]: **Ĉu li bremsis sufiĉe? Krimromano.** Antverpeno – La Laguna: TK-Stafeto 1978. 128 p. (Bel-literatura eldon-serio, 39.)

1979 BOATMAN, Douglas B.: **Kara diablino.** Antverpeno – La Laguna: TK-Stafeto 1979. 112 p. (Bel-literatura eldon-serio, 40.)

SEKELJ, Tibor: **Kumeaŭa, la filo de la ĝangalo.** Antverpeno – La Laguna: TK-Stafeto 1979. 95 p. (Bel-literatura eldon-serio, 42.)

1980 VALANO, Johán [t.e. Claude Piron]: **Ĉu li venis trakosme?** Antverpeno – La Laguna: TK-Stafeto 1980. 144 p.

1981 LORJAK [t.e. J.L. Mahé]: **Regulus.** Ascoli Pineco: Gabrielli 1981. 340 p. (Beletra Eldon-Serio, 16.)PIĈ, Karolo: La litomišla tombejo. Saarbrücken: Artur E. Iltis 1981. 276 p.

1982 BALANO, Johán [t.e. Claude Piron]: **Ĉu ŝi mortu tra-fike?** Priseksa kaj prikrima fantaziaĵo. Antverpeno – La Laguna: TK-Stafeto 1982. 92 p.

FRANCIS, John: **Misio sen alveno.** Antverpeno – La Laguna: TK-Stafeto 1982. 159 p.

NEMERE, István: **La fermita urbo.** Budapest: Hungara Esperanto-Asocio 1982. 128 p.

VALANO, Johán [t.e. Claude Piron]: **Ĉu ni kun-**

venis vane? Antverpeno – La Laguna: TK-Stafeto 1982. 180 p.

1983 DORVAL, Deck [t.e. Frans van Dooren kun Jef Beeckmans kaj Jos Deckkers]: **Jaĥto veturas for... kaj veturigas la morton.** Antverpeno: Flandra Esperanto-Ligo 1983. 190 p.

NEMERE, István: **La blinda birdo.** Budapest: Hungara Esperanto-Asocio 1983. 118 p. – Repr. 1987

NEMERE, István: **Sur kampo granita.** Budapest: Hungara Esperanto-Asocio 1983. 127 p. – Repr. 1987.

PIĈ, Karolo: **La mortsonorilo de Chamblay.** Saarbrücken: Artur E. Iltis 1983. 249 p. (Jubilea Eldon-serio: I. Beletro originala, 4.)

1984 LORJAK [t.e. J.L. Mahé]: **Eŭlalia.** Budapest: Hungara Esperanto-Asocio 1984. 188 p.

MODEST, Julian [t.e. Georgi Mihalkov]: **Maja pluvo.** Chapecó: Fonto 1984. 94 p. (Fonto-Serio, 4.)

NEMERE, István: **Febro.** Budapest: Hungara Esperanto-Asocio 1984. 131 p.

NEMERE, István: **La monto.** Budapest: Hungara Esperanto-Asocio 1984. 166 p

STIMEC, Spomenka: **Ombro sur interna pejzaĝo.** Pisa: Edistudio 1984. 141 p.

TÓFALVI, Éva – KNÍCHAL, Oldrich: **Kiuj semas plorante...** Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio 1984. 107 p.

1985 NEMERE, István: **La alta akvo.** Budapest: Hungara Esperanto-Asocio, 1984. 129 p.

VALANO, Johán]t.e. Claude Piron]: **Ili kaptis Elzan!** Chapecó: Fonto 1985. 100 p. (Fonto-Serio, 9.)

1986 LORJAK [t.e. J.L. Mahé]: **Mariagnes.** Budapest: Hungara Esperanto-Asocio 1986. 220 p.

TAVANTI, Corrado: **Varmas en Romo.** Ĝenevo: Kooperativo de Literatura Foiro 1986. 185 p.

1987 DORVAL, Deck [t.e. Frans van Dooren kun Jef Beeckmans kaj Jos Deckkers] kaj DECLERCK, Christian: **Kazinski venas tro malfrue. Krim-romano.** Antverpeno: Flandra Esperanto-Ligo 1987. 169 p. (Serio „Stafeto", 3.)

KNÍCHAL, Oldrich: **Adiaŭ, Kuzko!** Budapest: Hungara Esperanto-Asocio 1987. 88 p

LARBAR, Sara: **Karuseloj.** Chapecó: G. Ledon/Fonto 1987. 117 p.

NEMERE, István: **Serĉu mian sonĝon.** Budapest: Hungara Esperanto-Asocio 1987. 171 p.

NEMERE, István: **Terra.** Budapest: Hungara Esperanto-Asocio 1987. 151 p.

PIĈ, Karolo: **Klaĉejo.** Saarbrücken: Artur E. Iltis 1987. 188 p. (Jubilea Eldon-serio: I. Beletro originala, 11.)

VAHA, Blazio: **Adolesko.** Budapest: Oy Mendoservo Ak kaj Hungara Esperanto-Asocio 1987. 248 p.

1988 AUSTIN, Majno: **Vojaĝoj finiĝas, amantoj kuniĝas.** Antverpeno: Flandra Esperanto-Ligo 1988. 126 p. (Serio „Stafeto" 6.)

BUBENIC, Stan: **Sub cirkotendo.** Hago: Internacia Esperanto-Instituto 1988. 195 p.

ELGO, Serĝo: **Ŝia lasta poŝtkarto.** La Chaux-de-Fonds – Barcelona – Milano: Kooperativo de Literatura Foiro 1988. 225 p.

MOIRAND, Daniel: **Murdo en Esperantujo.** Antverpeno: Flandra Esperanto-Ligo 1988. 171 p. (Serio „Stafeto" 5.)

NEMERE, István: **Dum vi estis kun ni.** Budapest: Oy Mendoservo Ak kaj Hungara Esperanto-Asocio 1988. 165 p.

NEMERE, István: **Vivi estas danĝere.** Budapest: Hungara Esperanto-Asocio 1988. 159 p.

STEELE, Trevor: **Sed nur fragmento.** Chapecó: Fonto 1988. 448 p.

DORVAL, Deck [t.e. Frans van Dooren kun Jef Beeckmans kaj Jos Decckers] kaj DECKLERCK, Christian: **Nigra Magio. Krim-romano.** Antverpeno: Flandra Esperanto-Ligo 1988. 214 p: (Serio „Stafeto", 7.)

Aktualigita surbaze de la listo en William Auld: Vereco, distro, stilo, Saarbrücken: Artur E. Iltis 1981.

Septembro 1988 – Osmo Buller

Ludante iom per la ciferoj

Osmo *Buller* faris tre laŭdindan, kaj nepre utilan laboron enbukedigante la 94 originalajn Esperantajn romanojn, kiuj produktiĝis dum la lastaj 81 jaroj. Prelegante kelkfoje pri la Esperanta romano tie kaj tie, inkluzive internaciajn kunvenojn de vere kleraj esperantistoj, mi ĉiam trovis, ke oni havas tre nebulajn imagojn pri la dimensioj de la Esperanta romanliteraturo. Plej ofte oni grave supertaksis la kvanton de originalaj Esperantaj romanoj: ordinare oni supozis, ke ekzistas pluraj centoj da ili, sed troviĝis ne malmultaj personoj, kiuj hipotezis pri pluraj miloj...

Havante antaŭ mi la bele kompilitan liston, mi ne povis kontraŭstari la tenton ludi iom per la ciferoj, fari ian *kvantan analizon* de la romanrikolto. Kompreneble tiu ĉi analizo ne tuŝas la valorojn, ja tion oni mezuras ne per paĝonombro, tamen, ankaŭ la kvanta analizo permesas tiri kelkajn konkludojn, precipe, se oni konscias, ke *kvanto estas ŝanco por kvalito.*

A) Laŭtempa distribuiĝo de la originalaj romanoj:

Ĝis 1910: 2 romanoj kun suma amplekso de 962 p., de unu aŭtoro

1911-1920: 5 romanoj kun suma amplekso de 1028 p., de 4 aŭtoroj

1921-1930: 13 romanoj kun suma amplekso de 3445 p., de 7 aŭtoroj

1932-1940: 17 romanoj kun suma amplekso de 2636 p., de 11 aŭtoroj

1941-1950: 4 romanoj kun suma amplekso de 853 p., de 4 aŭtoroj
1951-1960: 4 romanoj kun suma amplekso de 746 p., de 4 aŭtoroj
1961-1970: 2 romanoj kun suma amplekso de 630 p., de 2 aŭtoroj
1971-1980: 12 romanoj kun suma amplekso de 2184 p., de 8 aŭtoroj
1981-1988: 35 romanoj kun suma amplekso de 6155 p., de 11 aŭtoroj

La unua romano aperis en la jaro 1907: post tio oni spertas solidan kreskon ĝis la eksplodo de la dua mondmilito. Poste sekvas kvaronjarcento da vera stagnado, neniel motivebla nur per la milito: inter 1941-1974 aperas entute nur 10 romanoj de 4 aŭtoroj. Aliflanke, dum la okdekaj jaroj oni spertas veran eksplodon: dum jardeko ne plena eliras 35 romanoj, t.e. pli ol triono de la tuta produkto.

B) Pri la aŭtoroj de la originalaj romanoj

La statistiko montras, ke la 94 romanoj estis verkitaj de 46 aŭtoroj, kiuj devenas el 20 diversaj nacioj. La amplekso de la romanoj varias inter 88 p. (Neologisme) kaj 592 p. (La Granda Kaldrono). Tial mi ekzamenis la produktivecon de la opaj verkistoj laŭ la suma paĝonombro de la romanoj, kiujn li/ŝi verkis. Interkrampe staras tamen ankaŭ la nombro de la romanoj:

1. Bulthuis 1476 p. (4 romanoj)
2. Nemere 1445 p. (10 romanoj)
3. Baghy 1221 p. (6 romanoj)
4. Luyken 1144 p. (4 romanoj)
5. Lorjak 1108 p. (5 romanoj)
6. Vallienne 962 p. (2 romanoj)
7. Valano 780 p. (6 romanoj)
8. Francis 751 p. (5 romanoj)
9. Engholm 732 p. (5 romanoj)
10. Piĉ 713 p. (3 romanoj)
11. Schwartz 613 p. (2 romanoj)
12. Forge 582 p. (3 romanoj)
13. Dorval 573 p. (3 romanoj)
14. Bartelmes 247 p. (2 romanoj)
15. Boatman 233 p. (2 romanoj)

El la supra listo konstateblas, ke 15 aŭtoroj apartenantaj al 9 diversaj nacioj, verkis 59 romanojn (ĉ. 63%) el la tuta produkto; la suma paĝonombro de tiuj verkoj estas 12.580 (ĉ. 67% de la tuta produkto). La restintaj 35 romanoj estis verkitaj de 35 malsamaj aŭtoroj.

C) Kontribuo al la romanliteraturo laŭ nacieco

Ĉisube ni vicigas nur la kvin plej „diligentajn" naciojn. La vicordo sekvas la kontribuon laŭ paĝonombro; oni povas vidi, ke la vicordo laŭ la nombro de la romanoj estus iom diferenca. En la suba tabelo la „duona" romano estas la hungara kontribuo al la verko „Kiuj semas plorante..." de la aŭtora paro Tófalvi-Kníchal.

1. Francoj 3985 p. (11 romanoj de 5 aŭtoroj)
2. Hungaroj 3574 p. (20,5 romanoj de 7 aŭtoroj)
3. Britoj 2902 p. (12 romanoj de 7 aŭtoroj)
4. Nederlandanoj 1476 p. (4 romanoj de 1 aŭtoro)
5. Belgoj 1353 p. (9 romanoj de 2 aŭtoroj)

Konstateblas, ke la averaĝa longeco de la romanoj montras grandan diversecon; ĝi estas 369 p. ĉe la sola nederlanda aŭtoro (Bulthuis), 362 p. ĉe la francaj aŭtoroj, 242 p. ĉe britoj, 174 p. ĉe hungaroj, kaj 150 p. ĉe belgoj. (Mi aldonu ĉi tie, ke la averaĝa paĝonombro de ĉiuj Esperantaj romanoj estas 198, dum tiu de la lastaj 35 romanoj, verkitaj dum la okdekaj jaroj atingas nur 176. Oni spertas do certan reduktiĝon de la averaĝa amplekso.)

La supraj kvin nacioj kontribuis al la Esperanta romanliteraturo entute 13.290 paĝojn, t.e. ĉ. 71% de la tuta paĝonombro. Laŭ la nombro de la romanoj la kontribuo estas 60%-a (56,5 romanoj). Tiu ĉi kvanto estis verkita de 22 aŭtoroj entute.

Ĉ) Eldonkvantoj kaj represoj

Esperantaj libroj malofte portas indikon pri eldonkvanto – ties kialo estas verŝajne la malgranda nombro de la eldonitaj ekzempleroj, pri kiu la eldonejoj ne volonte „fanfaronas". Sporade oni tamen trovas tiajn indikojn; ekz. „Vivo kaj opinioj de Majstro M' Saud" de Ribbillard eldoniĝis en 1000 ekz., la Danlanda represo de „Kiel akvo de l' rivero en 500 ekz. Oni scias, ke la ordinara eldonkvanto de la Stafeto-libroj estis 1000 – aliaj eldonejoj devis kontentiĝi pri malpli grandaj kvantoj. Siatempe la dana eldonisto de „Ĉu vi kurias ĉine?" de Valano informis min, ke la libro eldoniĝis en nur 500 kez., dum „Varmas en Romo" de Tavanti eliris en 1000 ekz. – kaj tiu eldono dum unu jaro kaj duono plene elĉerpiĝis: dua eldono dum 1989 aperos ĉe HEA.

Pli konkretajn ciferojn mi povus vicigi ĉi tie nur pri la romanoj, kiujn eldonis HEA dum la lasta jardeko. Interkrampe mi donas la nombron de ekzempleroj, kiuj en januaro de 1988 estis en stoko ĉe HEA (pli freŝaj ciferoj mankas).

„La fermita urbo" de Nemere: 3045 ekz. (elĉerpita)
„Febro" de Nemere: 5000 ekz. (1966 ekz.)
„La blinda birdo" de Nemere (du eldonoj kune): 4000 ekz. (1697 ekz.)
„Sur kampo granita" de Nemere (du eldonoj kune): 3550 ekz. (1760 ekz.)
„La alta akvo" de Nemere: 2370 ekz. (598 ekz.)
„La monto" de Nemere: 2450 ekz. (613 ekz.)
„Serĉu mian sonĝon" de Nemere: 2780 ekz. (1515 ekz.)
„Terra" de Nemere: 2500 ekz. (1965 ekz.)
„Dum vi estis kun ni" de Nemere: 4000 ekz. (ĝi eliris dum 1988)
„Vivi estas danĝere" de Nemere: 4500 ekz. (ĝi eliris dum 1988)

„Eŭlalia" de Lorjak: 3650 ekz. (138 ekz.)
„Mariagnes" de Lorjak: 3480 ekz. (1976 ekz.)
„Adiaŭ Kuzko" de Kníchal: 2030 ekz. (1766 ekz.)
„Adolesko" de Vaha: 2000 ekz. (1241 ekz.)
„La verda koro" de Baghy: 7000 ekz. (2004 ekz.)

(El „Adolesko" troviĝas ĉ. 400 pliaj ekz. en stoko ĉe la kuneldonisto en Finnlando.)

Oni vidas, ke en la supra listo laŭ la venditaj ekzempleroj la laŭron havas „Eŭlalia" (3512 ekz.) (se ni ignoras „La Verda Koro"), ĝin sekvas „La fermita urbo" (3045 ekz.) kaj „Febro (3034 ekz.). La komparoj tamen estas iom maljustaj, ĉar ili ne konsideras la aperdaton de la opaj verkoj.

La reala eldonkvanto do – almenaŭ ĉi tie, en Orienta Eŭropo – por verko almenaŭ parte distra povas esti inter 3 kaj 4 miloj (esceptokaze inter 4 kaj 5 miloj), dum ĉe malpli facile digesteblaj romanoj ĉ. du miloj, eble iomete pli.

Pri *represoj* kaj *reeldonoj*. Ili ne tre klare diferencigeblas en Esperantujo, ja tre ofte oni parolas pri reeldono ankaŭ kiam temas pri simpla represo, do ni traktos ilin kune ĉi tie. El la supra listo ni povas konstati, ke 22 el la 94 romanoj atingis entute represon. (Tamen, tio ne tute kovras la realon: en Hungario dum la lastaj jaroj aperis pluraj represoj, kiuj pro administraj kialoj ne portis informon pri tio: „La fermita urbo" aperis en du „porcioj", „Febro" kaj „Eŭlalia" en tri, „La verda koro" en du.)

El tiuj 22 verkoj unu verko („La verda koro") atingis 5 represojn, unu („Viktimoj") 3 represojn, kaj kvar verkoj („Al Torento", „Printempo en la aŭtuno", „Infanoj en Torento" kaj „Sur sanga tero") po 2 represojn; la ceteraj 16 romanoj po 1 represon.

Pri „Viktimoj" mi spertas etan misteron en la bibliografio. Ĝi notas tri eldonojn siatempajn, kaj la trian eldonon ĝi probabligas por la jaro 1934. Tion ŝajnas dementi la fakto, ke mi posedas ekzempleron, kiu portas la indikon „4-a eldono", sed neniun indikon pri jaro. (La paĝonombro estas 237, do la sama, kiel tiu de la 3-a eldono, kiun posedas Buller.) Ĉiukaze, fine de la libro aperas reklampaĝoj, kiuj informas pri „Hura!" kiel libro *presata,* kaj la antaŭanonco pri „Sur sanga tero" indikas ankoraŭ la titolon „Infero". Ĉar „Hura" aperis en la jaro *1930*. „Sur sanga tero" en 1933, do eĉ mia 4-a eldono devis aperi plej malfrue en 1929, kaj la 3-a eldono de Buller pli frue. Konante la komercistan lertecon de Vilmos Bleier, estas neimageble, ke li represus ne ĝisdatajn reklamojn. Tio signifas, ke „Viktimoj" atingis verŝajne ne *kvar*, sed *kvin* represojn.

Mi notu ankaŭ, ke en Ĉinio aperis unu plia represo de „Printempo en la aŭtuno" en 1983. Hazarde mi posedas informojn pri la eldonkvanto de la Ĉiniaj represoj: tiu de 1981 estis 3000 ekz., la sekva de 1983 sumis 4000 ekz., laŭ la indikoj kiujn mi ricevis de s-ro Li Shijun (Laŭlum). Tiuj ciferoj tamen nur substrekas la fakton, ke la plej multe represita Esperanta romanverkisto ĝis nun restas Julio Baghy.

D) La „miraklaj" okdekaj jaroj

Estas fakto, ke dum la lastaj *ok* jaroj aperis entute 35 novaj romanoj sur entute 6155 paĝoj, do, preskaŭ tiom, kiom dum la duona jarcento inter 1930-1980. (Tiuj kvin jardekoj donacis al ni 39 romanojn, sur entute 7049 paĝoj.) La kvanta kresko estas enorma, tamen el kvalita vidpunkto mi ne kuraĝus diri la samon. Ĉiukaze, por nun ni restu ĉe la kvantaj aspektoj.

Al tiu kresko verŝajne grave kontribuis ankaŭ la evoluo teknika, kiu faris la produktadon de ne tre grandaj eldonkvantoj signife malpli kosta. Mi aludas la disvastiĝon de la ofseta presa tekniko, kaj ne malpli la reduktiĝon de la prezo de taŭgaj kompost-sistemoj (IBM-maŝinoj, komputilaj kompost-sistemoj, laser-presiloj ktp.). La produktadon mem probable influis la Premio „Raymond Schwartz" en 1980: ĝi allogis dek romanojn, el kiuj estis laŭrkronita nur unu, sed pliaj kvin konkursintaj sed ne gajnintaj romanoj jam aperis („La Litomiŝla tombejo", „La mortsonorilo de Chamblay" kaj „Klaĉejo" de Piĉ; „Adolesko" de Vaha; „La alta akvo" de Nemere). Certe multe stimulis la produktadon ankaŭ la vigla laborado de kelkaj novaj eldonejoj, antaŭ ĉio de Flandra Esperanto-Ligo, Fonto, Artur E. Iltis kaj Hungara Esperanto-Asocio – tiu ĉi lasta produktis sola 14 titolojn el la 35.

Sed la vigliĝo de la eldoneja laboro, la apero de prestiĝa konkurso estas ne kaŭzo, sed fakte konsekvenco de la movada progreso, kiu siaflanke ne malmulte ŝuldas al la favoriĝanta internacia politika klimato. Ĉar tiu procezo ŝajnas esti daŭra, oni verŝajne ne eraras asertante, ke dum 1989 ni povos saluti la aperon de la *centa* originala Esperanta romano.

Kaj tiu momento estos ne nur la atingo de ia „sporta" rekordo. Kvalita analizo verŝajne pruvus, ke la *averaĝa* nivelo de la 35 romanoj dum ok jaroj iom malaltiĝis kompare al la pli frua produkto, sed aliflanke ĝenerale kreskis la profesia nivelo eĉ de la poramuzaj verkoj, kaj aperis pli da romanoj, kiuj eltenas nacilingvan prezenton, ol iam ajn antaŭe.

La kresko de la nombro de poramuzaj romanoj certe estas negativa fenomeno el pure estetika vidpunkto. Sed ĝi signas ankaŭ ĝojindan fakton, nome, ke grave kreskis la nombro de tiuj personoj, kiuj kapablas legi en Esperanto sen malfacilaĵoj *tutan libron,* kaj ne nur mallongajn anekdotojn, verkitajn por komencantoj. Tiun supozon kreskigas ankaŭ la konstatebla altiĝo de la eldonkvantoj: verŝajne „Eŭlalia" kun siaj 3512 venditaj ekzempleroj havas absolutan rekordon en la Esperanta romanliteraturo (se oni ignoras „La verda koro", verkitan por komencantoj), kun entute ĉ. 15 mil venditaj originalaj romanoj dum 7 jaroj Nemere estas verŝajne la plej intense legata aŭtoro dum la tuta historio de la Esperanta literaturo. Do, la „romana inundo" sendube pruvas la fortiĝon de la Esperanto-komunumo.

E) Kontribuo de hungaroj

Mi ne povas kontraŭstari la tenton fine de tiu ĉi ciferĵonglado resumi la kontribuon de hungaroj al la Espe-

Atuta proza verko!

Sándor Szathmári (1897-1974) estas unu el la pintaj nomoj de la originala Esperanta prozo. Lia ĉefa verko estas sendube la romano „Vojaĝo al Kazohinio", sed li postlasis abunde ankaŭ rakontojn kaj novelojn.
Tiu ĉi ampleksa volumo enhavas ĉiujn liajn originalajn rakontojn kaj novelojn — entute 26 pecojn, sen kiuj la Esperanta literaturo estus nepre pli malriĉa.
„Perfekta civitano" havas validan direndon por ĉiuj civitanoj de ajna ŝtato, sendepende de tio, en kia sociordo ili vivas.



Sándor Szathmári: Perfekta civitano. Plena novelaro. Redakto kaj postparolo Vilmos Benczik. Eldonis: Hungara Esperanto-Asocio, Budapest, 1988. 21 cm, 45
ISBN 963 571 178 6. Prezo: 39,— ned. gld. (Por Hungario: 200 forintoj)
Oni mendu ĉe la Libroservo de UEA aŭ rekte ĉe Hungara Esperanto-Asocio.

ranta romano. Pli supre jam aperis indiko, ke sep hungaraj aŭtoroj verkis sume 20,5 romanojn (ĉ. 22% de la tuta produkto) sur entute 3574 pagĝoj (ĉ. 19% de la tuta produkto). Tiuj sep aŭtoroj estas: István Nemere (10 romanoj), Julio Baghy (6 romanoj), Imre Baranyai (Emba), Ferenc Szilágyi, Sándor Szathmári kaj Blazio Vaha (po 1 romano) kaj Éva Tófalvi („duona" romano).

Sed hungaroj kontribuis al la Esperanta romano ne nur aŭtore, sed ankaŭ eldoniste: la unua originala romano aperinta en Hungario estis „Viktimoj" de Julio Baghy en 1925, la lasta „Vivi estas danĝere" de István Nemere, en septembro de 1988. Dum tiuj 63 jaroj aperis en Hungario 24 originalaj romanoj (kalkulante nur la unuajn eldonojn), t.e. pli ol la kvarono de la tuta produkto; 14 el tiuj eliris dum la lastaj 8 jaroj. Hungaraj eldonejoj servis al ses nehungaraj Esperantistaj romanistoj: al la polo Jean Forge, estono Hendrik Adamson, svedo Stellan Engholm (du romanoj), aŭstro Hans Weinhengst, franco Lorjak (du romanoj) kaj slovako Oldrich Kníchal. Hungaraj eldonejoj diligentis ankaŭ sur la kampo de reeldonoj.

La ludado per la ciferoj estus ankoraŭ longe daŭrigebla, tamen ĉi tie mi ĉesas eluzi la eblojn, kiujn prezentas la bibliografio, kompilita de Osmo Buller. Ĉi tiun ludadon sendube devos sekvi tipologia kaj entute kvalita analizo, ja la analizenda materialo jam estas impone granda kaj nepre unika ankaŭ el kulturhistoria vidpunkto.

Vilmos Benczik

Belartaj KONKURSOJ '88

Eduard Tvarožek (Ĉeĥoslovakio)

Teatraĵo, Honora Mencio

JE LA DUA POST NOKTOMEZO...

(Libere laŭ la motivo de la rakontaĵo de John Savage „Vojo al Eskapo.")

La personoj:
DEĴORANTO en bufedo
1-A GASTO
2-A GASTO
3-A GASTO

La scenejo:

Bufedo de benzinstacio apud la aŭtoŝoseo gvidanta al la landlimo inter Teksaso (Usono) kaj Meksikio.

Sur la tablo puraj, gajkoloraj tablotukoj, la vendotablo pura, sur unu fino de la vendotablo telefonaparato, apud ĝi amaseto da diversaj bildrevuoj, gazetoj, prospektoj, sur ili telefonlibro. La ejo estas ornamita per diversspecaj afiŝoj.

La survanda horloĝo montras la tempon ĉirkaŭ la dua horo, kaj ĉar la lampoj en la ejo estas plene lumantaj, estas evidente la dua nokte.

Malantaŭ la vendotablo sidas dormetante mezaĝa deĵoranto, kiu nokte estas kaj bufedestro kaj benzinvendisto. La parto de la ejo por gastoj, en kiu estas kelkaj tabloj, estas tute senhoma. La radio ludas mallaŭte distran muzikon.

(Dum tempeto okazas nenio. Poste subite ekaŭdiĝas la bruo de proksimiĝanta aŭto. La aŭto haltas, la motoro eksilentas kaj en la bufedon eniras post momento LA 1-a GASTO, en motorista-duonsporta vesto.)

1-a GASTO (*enirinte haltas por momento ĉe la pordo, kvazaŭ surprizita, ĉirkaŭrigardas en la ejo*).

DEĴORANTO (*leviĝas malantaŭ la vendotablo*) Bonan vesperon! Per kio mi povas servi...?

1-a GASTO Bonan vesperon! Ĉu mi povas ricevi kafon?

DEĴORANTO Certege! Bonvolu sidiĝi. (*Li foriras tra la pordo malantaŭ la vendotablo.*)

1-a GASTO (*ĉirkaŭrigardas, poste elektas tablon apud la scenejrando, deprenas siajn ŝoforgantojn kaj ĵetas ilin sur la tablon, faras kelkajn paŝojn, streĉas siajn brakojn kaj faras kelkajn simplajn gimnastikajn movojn por forigi la rigidecon de sia korpo post la longa, laciga ŝoforado; poste li eksidas).*

DEĴORANTO (*envenas kun la kafo sur pleteto, metas la pleteton antaŭ la gaston*) Bonvolu... (Li restas stari apud la tablo.)

1-a GASTO (*alflaras la kafon, plenpulme enspiras ĝian agrablan aromon; lia vizaĝo montras kontentan surprizon*).

DEĴORANTO Ĉu vi deziras kremon?

1-a GASTO (*surprizite suprenrigardas, poste kapjesas*) Jes, mi petas.

DEĴORANTO (*foriras*).

1-a GASTO (*metas sukeron en sian kafon, kirlas ĝin rigardante la tason enpense; poste li trinkas glutaĵon kaj mienas kontente*).

DEĴORANTO (*venas kun kruĉeto da kremo, starigas ĝin sur la tablon*) – Bonvolu...

1-a GASTO Mi ne ĉesas miri, homo! (*Rigardas la deĵoranton.*) Mi veturas ekde tagmezo kaj jam eksentis lacecon. Kutime mi ĝin venkas per kafo – sed kie ĝin preni? Bonŝance, mi ekvidis vian stacion kaj haltis. Mi supozis kaj timis, ke mi trovos bufedon kun malpuraj tablotukoj, plenan de muŝoj, en kiu kafo havas la kromguston de benzino aŭ de mi ne scias kio... Sed ĉe vi eĉ post la tuttaga servo estas pure kaj iel gaje, kaj la kafo gustas kaj odoras bonege. Eĉ kremon mi ricevis – nun, je la dua post noktomezo...! (*Li skuas la kapon kvazaŭ ne komprenante, kiel tio estas ebla, kaj ektrinketas la kafon.*)

DEĴORANTO (*kun eta kliniĝo*) Mi ĝojas, ke vi estas kontenta. (*Li preparigas por foriri malantaŭ la vendotablon*)

(*Tiam ekstere ekaŭdiĝas la bruo de alrapideganta aŭto, kiu deflankiĝante de la aŭtoŝoseo ĵetas lumon de siaj fortaj reflektoroj por momento en la fenestro(j)n; poste la aŭto forte kaj laŭte bremsas, haltas, la motoro silentiĝas.*)

DEĴORANTO (*iras al la pordo, malfermas ĝin kaj krias eksteren*) Ĉu benzinon – ?

VIRA VOĈO (*de ekstere*) Ne!

Belartaj KONKURSOJ '88

DEĴORANTO (*revenas de la pordo malantaŭ la servotablon. Tuj poste haste eniras du viroj — la 2-a GASTO, altstatura, forta, blonda, kaj la 3-a GASTO, mezstatura, brunhara, kun lipharetoj.*)

2-a GASTO (*krias jam en la pordo*) Du kafojn! (*Ambaŭ gastoj sidiĝas iom pli proksime al la servotablo kaj rigardekzamenas la ejon.*)

DEĴORANTO (*alportas la kafojn kaj metas ilin antaŭ la 2-an kaj 3-an GASTOJN*). (*La 2-a kaj 3-a GASTOJ haste enmetas sukeron en sian kafon kaj kirlas ĝin; ili faras tion iom nerveme, kvazaŭ malpacience.*)

2-a GASTO (*al la foriranta deĵoranto*) Ĉu vi povas montri al ni ian aŭtomapon de tiu ĉi regiono?

DEĴORANTO — Mi pensas, ke jes. Momenton, mi petas. (*Li iras malantaŭ la vendotablon kaj serĉas inter la gazetoj kaj prospektoj apud la telefono. Post iom da serĉado li trovasmapon kaj alportas ĝin.*) Ĝi ne plu estas tute nova, sed ĝi almenaŭ iom helpos... (*Li metas la mapon antaŭ la du gastojn kaj revenas malantaŭ sian vendotablon. De tie li rigardas la du gastojn.*) (*La 2-a kaj 3-a gastoj malfaldas la mapon kaj kliniĝas super ĝi. La 3-a gasto ekstaras por pli bone vidi.*)

1-a GASTO (*trankvile trinketas sian kafon kaj dume rigardas la 2-an kaj 3-an gastojn*).

2-a GASTO (*tiras sian fingron zigzage sur la mapo kaj skuante sian kapon diras al sia kunulo*) Kiel vidiĝas, de tiu ĉi flanko de El Paso estas nenia transiro...

3-a GASTO (*rigardas la mapon*) Evidente...

DEĴORANTO (*atente rigardinta kaj aŭskultinta la 2-an kaj 3-an gastojn*) Pardonu afable, sinjoroj, ke mi enmiksas min... Mi aŭdas, ke vi serĉas vojon suden. Mi eble povus helpi al vi...

3-an GASTO (*singardeme*) Kiel — ?

DEĴORANTO Momenton, mi petas... (*Li denove traserĉas la amaseton da gazetoj kaj prospektoj apud la telefono, poste diras*) Mi rigardis, ĉu mi tamen ne trovus iun pli novan mapon. Nome, en ĉiuj novaj mapoj jam enestas la nova ponto apud Hackett.1)eble iu gasto prenis la mapon kun si. Sed ne gravas, mi facile povas klarigi al vi, kiel vi venos tien.

2-a GASTO (*rigardante la mapon*) Jes, ĉi tie estas komunumo nomata Hackett. Ĝi kuŝas ĉe la rivero kaj tie la ŝoseo finiĝas. Ĝi aspektas tute malgranda kaj sensignifa loko...

DEĴORANTO Ĝi estis tia, jes, ĝis kiam estis tie konstruita ponto super Rio Grande. Depost tiam Hackett kreskis pli ol duoble.

3-a GASTO Kaj kiel ĝi aspektas sur la transa bordo?

DEĴORANTO Estas tie bona ŝoseo, ĝi kondukas rekte al Chihuahua.2)Tie ĝi aliĝas al la aŭtovojo venanta de El Paso kaj Juarez 3. (*La 2-a kaj 3-a gastoj per fingroj montrante kontrolas, kion diras la deĵoranto; poste ili interŝanĝas mallaŭte kelkajn vortojn kaj*)

2-a GASTO (*faldas la mapon, metas ĝin en sian poŝon kaj diras laŭte al la deĵoranto, kiu intertempe foriris malantaŭ sian vendotablon*) Vian mapon ni kunprenos... (*Per unu granda gluto li eltrinkas sian kafon.*)

DEĴORANTO (*estas iom surprizita, sed restas trankvila kaj diras nur*) Bonvolu nur... Mi ĝojas, ke mi povis servi al vi... (*Li eliras de malantaŭ la vendotablo, venas al la tablo de la 2-a kaj 3-a gastoj, prenas la malplenajn tasojn kaj demandas*) Ĉu la sinjoroj havas ankoraŭ iun deziron — ?

3-a GASTO (*rapide eltiras el sia poŝo grandan pistolon kaj celante al la deĵoranto ordonas al li*) Jes. Ke vi stariĝu tien en la angulon (*li montras per la pistolo al la angulo plej malproksima de la vendotablo*) kaj turnu vin kun la vizaĝo al la muro!

2-a GASTO (*eltiras preskaŭ samtempe sian pistolon kaj celante al la 1-a gasto diras*) Kaj vi restu sidanta kaj ne movu vin! (*Poste li iras malantaŭ la vendotablon, eltiras la kasan tirkeston, elprenas kelkajn manplenojn da monbiletoj, ŝtopas ilin en siajn poŝojn, forŝiras la aŭskulti-*

1 Elparolu: (h132kit)
2 Elparolu: cihuahua
3 Elparolu: ĥuares

Belartaj KONKURSOJ '88

lon de la telefono kaj iras al la pordo; li ĉirkaŭrigardas ankoraŭfoje en la ejo kaj eliras.)

3-a GASTO (*dume minacgardis per sia pistolo la deĵoranton kaj la 1-an gaston; kiam de ekstere ekaŭdiĝas la bruo de ekfunkciigita aŭtomotoro, ankaŭ li rapide iras al la pordo, ekpremas la lumŝaltilon ĉe la pordo kaj elrapidas.*)

(*Estas mallumo kaj silento. Post momento ekstere aŭdiĝas pistolpafo, frapfermo de aŭtopordo, la bruego de abrupte startanta aŭto, kiu iom post iom malfortiĝas .*)

1-a GASTO (*elkuras, sed baldaŭ revenas kaj enirante premas la lumŝaltilon; la ejo denove estas en plena lumo*) Forveturonte ili ankoraŭ trapafis unu el miaj pneŭmatikoj, kanajloj...! Kaj al vi –

DEĴORANTO (*ankoraŭ staranta en la angulo kun la malplenaj kafotasoj sur pleteto en la manoj, sed jam turniĝinta al la 1-a gasto*) Ne ĉiam indas esti ĝentila kaj helpema al homoj... (*Li iras trankvile, sed rapide malantaŭ la vendotablon, malfermas maskitan pordeton en la muro, elprenas telefonaŭskultilon kaj diras al la 1-a gasto*) Por ĉiu eventualo ni havas ankoraŭ unu telefonon... (*Poste li elektas numeron kaj post momento diras.*) Bonan vesperon, sinjoro inspektoro! Ĉi tie benzinstacio 327 ĉe la vojkruciĝo, parolas deĵoranto Langman. Pardonu, ke mi ĝenas... Rabatako... La tuttagan enspezon – proksimume 900 dolarojn, mi ne povas diri precize... Jes, tion mi povas al vi diri tute precize: du viroj, unu altstatura, forta blondulo, la dua estis de meza kresko, kun brunaj haroj kaj liphareto. Ili venis kaj forveturis en granda flava sporta ŝevroleto... Ne diru! Ĉu vere? Ne, ne al El Paso: ili forrapidegis en la direkto al Hackett... Mi scias... Kiu? Mi! (*Li ridetas.*) Hahaha...! Ne dankinde. Bonan nokton kaj bonan ŝancon! (*Li remetas la aŭskultilon, fermas la telefonkaŝejon. Al la 1-a gasto:*) Imagu al vi, tiuj du uloj elrabis ankaŭ poŝtoficejon en Wichita.[4] Nun ili volas fuĝi al Meksikio.

1-a GASTO – Mi tre eraris pri ili. Komence mi pensis, ke ili eble estas brutkomercistoj aŭ grenkomercistoj... Nu, estas malfacile diveni laŭ aspekto. (*Dum li parolas, li venas al la vendotablo.*)

DEĴORANTO (*iras al la difektita telefono, prenas en la manon la elŝiritan aŭskultilon kaj rigardas ĝin.*)

DEĴORANTO (*revenas post nelonge el la pordo kun du novaj kafoj sur pleteto kaj portas ilin al la tablo de la 1-a gasto.*) Espereble ne malutilos al vi ankoraŭ unu kafo. La unua ja plaĉis al vi... (*Li invitas per gesto la 1-an gaston eksidi denove kaj metas la kafojn sur la tablon.*) Komence ankaŭ mi pensis, ke ili estas iaj komercistoj aŭ io tia. Sed ilia konduto estis iel stranga, la movoj kaj parolmaniero maltrankvilaj. Kaj poste, kiam ili estis rigardantaj la mapon, mi ekrimarkis en la poŝo de la lipharulo la konturojn de pistolo multe pli granda ol kian oni portadas por sindefendo. Tiam mi vidis, ke io ne estas en ordo koncerne ilin.

1-a GASTO (*aŭskultas kaj senintence, aŭtomate preparas sin eltrinki ankaŭ la duan kafon, poste tamen iom malgaje kaj riproĉe diras al la deĵoranto*) Vi vidis, ke io ne estas en ordo, kaj tamen vi volonte helpis al ili...

DEĴORANTO (*ridetante, kun ŝercema subtono*) Oni ja devas esti helpema al vojaĝantoj...

1-a GASTO Mi komprenas, ke vi lasis al ili la mapon, sed prenu min la diablo, se mi, havante suspekton pri ili, rakontus al ili pri la nova ponto...! Ja vi tute intence helpis al ili fuĝi en eksterlandon!

(*En tiu momento ekaŭdiĝas ekstere la bruo de alrapidegantaj aŭtoj kaj du aŭtoj en proksima sekvo preterrapidegas; la bruo forsonas.*)

DEĴORANTO (*kirlanta trankvile sian kafon, al la 1-a gasto, kiu atente aŭskultis la aŭtojn*) La polico jam persekutas ilin...

1-a GASTO Ili havas grandan sportan aŭton, nun la polico jam havas nenian ŝancon kapti ilin. Se vi estus silentinta pri la ponto, estus almenaŭ espero –

DEĴORANTO Estas nenia –

1-a GASTO (*interrompas abrupte, jam kolerete, lian parolon*) Ĝuste tion ja mi diras!

1-a GASTO (*skuetas mirigite la kapon kaj rigardas demande la deĵoranton*).

DEĴORANTO (*finas sian frazon klare, kun akcento sur ĉiu vorto*) ... ĉar estas neniu vojo trans la riveron – ĉar estas neniu ponto en Hackett!! (*Li plu ridetas.*)

1-a GASTO (*unue rigardas lin mirigite, poste ekkomprenas kaj ankaŭ ekridetas*).

KURTENO

4 Elparolu: ŭiĉita

Muziko: Antoaneta Atanasova (Bulgario)
Teksto: Ŝerafima Djutĉin (Bulgario)

Belartaj KONKURSOJ '88

Premio An-okin pri Kanto

La sciuro



Belartaj KONKURSOJ '88



Belartaj KONKURSOJ '88

Krys Ungar (Brirtio)
Nova Talento

FEBRUARO

Rivero pluvombrela bunte fluas
Laŭ stratoj glime grizaj. Ventoj fridaj
Platanojn skuas — gutoj disĵetitaj
Apaĉajn harskulptaĵojn majkonstruas.

La tagoj pasas, sed la pluvo pluas
Tamtame sur tegmentojn. Televidaj
Reklamoj bruas — revas sunavidaj
Urbanoj; longe ili jam enuas.

Subite, ĉielarko sin etendas,
Ridetas promesplene. Jen la suno
Tra l' nubĉifonoj okulsignojn sendas.

Forflugos fine tiu vintra puno.
La Dam' Printempo venkon nun atendas,
Por beni nin per viglo kaj fortuno.

AŬTUNA KORKANTO

Fuĝas la somero antaŭ la aŭtun'.
Sub ĉielo pala kaj minace ŝtala,
Al nebula fumo cedas la vivlumo
De l' batalvenkita abdikanta sun'.

Larmas pluvogutoj el la firmament',
Trempas la kamparon, verŝas koramaron.
Tial pro kolero ŝvelas la rivero
Ĝis ĝi fine iĝas tondra ŝaŭmtorent'.

Baldaŭ la vivaron kaptas malesper'.
La libeloj lastaj per klopodoj hastaj
Specon sian semas; sopireme tremas
Kaj en mortekstazo falas al la ter'.

Arbfolioj sekaj tordas sin en danc',
Kvazaŭ vinebrie (ĉu amorpasie?);
El la hejm' ŝtelataj, de la vent' pelataj
Maĝraŭ sia volo soras tra l' distanc'.

Voĉo via eĥas en la ventsusur',
Flanke de' folioj flugas pensoj miaj
Al la sunaj horoj plenaj je memoroj,
Dum l' animo veas, „Ho, se nur, se nur..."

Baldur Ragnarsson (Islando)
Originala Puezio
Honora Mencio

Baroj

Survoje hejmen
mi ne povis ne miri

pri la sekreta poezio de la flakoj
tiel trankvilaj
en la mezo de la nokto

mi atentis
ankaŭ pri la sono de miaj paŝoj
kaj la subita brilo de botelo
kuŝanta ĉe la defluilo

Ĉu vortoj
povus forigi la barojn?

Longe mi staris
esplorante la denson de metalo
inter miaj malŝlosontaj fingroj



József Rác: Pajaco

István Ertl (Hungario)

Originala Poezio
Tria Premio

Belartaj KONKURSOJ '88

El la Libroj de Forgeso kaj Komenco

(...) Ekmigri urĝis. Minace malpliiĝis la provianto,
bestoj saŭronaskontaj sin paŝtis en la grenejo.
Matene denove aperis la nubokolosoj
kaj, venĝante iamajn ofendojn kontraŭ la ĉielo,
venenis deknaŭ senkulpajn novaskitojn.
La tribo, post ol ŝtonumi la sentaŭgan ŝamanon,
decidis forlasi siajn kavernojn humidajn.

Komenciĝis pilgrima migrado, en libroj
kanonaj kaj apokrifaj mitiĝonta.
Survoje obstaklis obusoj, kelkaj
solecaj transvivantoj — ĉi-lastaj nelonge —;
necesis eviti la insidajn kadavrojn de metropoloj,
kaj fine nepris klabi kaj manĝi la kadukiĝintojn.
(La dezerto ne planas nek pardonas.)

Post jaro (aŭ pli, Ĉar la tagojn kalkuli
scipovis nur la ŝamano ekzekutita)
ili atingis la maron cindran kaj strange trankvilan.
„Thalatta!" — ekkrils la ĉefo kaj ordonis
ĉarpenti flosojn el traboj kaj lianoj —
lianoj verme prosperis tiujare.

Aŭroro griza aŭguris vojon peripetian
por la fragila flosaro —

ĈI-LOKE EĈ LA SINOPTIKOJ MALKONSENTAS

---

kaj tiel perdiĝis plejparte la gento preferita,
lasante por la posteuloj
krom kelkaj trabsplitoj relikviĝintaj
la miton taŭgan por fondi
la historion de l' epoko
postciviliza.

(...) O ra epoko luladis iam la homaron:
R iĉe vegetis por nutri ĝ in pigre vivantan
A rboj abundaj kaj fruktoj facile fekundaj
E n la ĝ ardeno senlima, ĉi Teron kovranta.
P astro, paŝtisto nomiĝ is neniu (aŭ ĉiuj).
O rfe, leĝ ere sin tenis pluviva la gento;
K rom kio en la sindona naturo troviĝ is,
O ni deziris nenion, nenion bezonis.

M izero nur poste ekregis por puni mortulojn
I ndajn, malindajn egale, pro kaŭzo necerta.
Z orgoj forigis feliĉ on, satecon malriĉ o
E ksigis. Kaj arda malamo ekpelis subite,
R abie la gentojn eksterni aliajn naciojn.
O rdo senhoma, sterila rezultis —

I nter ni, tamen-vivantoj, troviĝ os, por kiuj
N e ĉi ebeno dezerta signifos la finon.
S ur l' oceanoj jam flosas insulo, en kiu
U voj kaj pomoj, melonoj kaj prunoj atendas
L a bravajn migrintojn premie, sed ĝ is tiu tempo
O mbroj, obstakloj ne ĉesos... nek nia obstino.

(...) La tagoj similis aŭ samis.
Kaj venis noktoj, por ilin reprodukti.
La haŭton de la plandoj ĉifonigis
marŝado surŝtona, - glacia kaj - sabla;
ŝtonon, glacion kaj sablon
la frosto igis strange unuforma.
— Ne eltenos alian tagon — diris iu pri alia,
kaj li mem ne travivis la novan tagon.
Inoj kaj idoj ekploris unue, sed verŝi larmojn
estas malŝpari akvon, eĉ se salitan.
La gorĝoj ne eligis kanton, eĉ la parolo
fariĝis seka klakado turmenta.
Kelkaj depinĉis tigojn, folioj̆n de l' raraj arbustoj,
sed la fibroj kvazaŭ ligniĝis,
kaj la gustumantoj ilin elvomis spasme.
Kiam beboj ekmortis, sucĉi ne povantaj,
la tribestro ordonis al dek viroj
tamen esplori urbegon, kiu embuskis horizonte —
ili revenis:
por morti; eble prave ili estis akuzitaj
pro eltrinko de boteloj enurbe trovitaj.
Kaj tiam, ĉar neniu pri tio pensi kuraĝis,
ekpluvis... plupluvis... pluvadis senpaŭze.
Kaj estis en tiu tago, ke ili, dankemaj, alprenis
la nomon de l' Tribo de l' Pluvo.
(...) Lando dezerta. Vasta.
Neniu signo de vivo; sed ankaŭ la morto
ne manifestas.
La suno ne plu arde okulas, ĝi dissendas
lumon pale unuecan.
En ĉi terenon neniam-epokan
kiu do venus?
Neniu, krom por kiuj „kie"
iĝis „nenie".
Rande de l' horizonto sin ektrenas

Belartaj KONKURSOJ '88

strio malhela,
kiu reeĥas la muton senhoman
per voĉoj homaj.
Estas la tribo; ilin vivigas
pela soifo.
Kiu mortas, tiu l' aliajn
penige punas:
enterigi, cindrigi ne eblas,
kaj la malsato...
Kaj la malsato.
Turmento, deziro, peno, laco, muto.
Muto, ĉar krioj la vivon
nepre eligus.
Paŝoj stumblas, vertiĝo bremsas
l' antaŭeniron.
Momentoj eniĝas flankvojojn de l' menso
kaj forgesiĝas.
Ĉiu forgeso iĝas komenco,
ree kaj ree kaj ree.

(...) Dhewo mem elawdu
Dhewom me cum lawdu
chiam portan porcom
afom chiam donam!

Dhewo e Parenai
e Thyphoi aut enai
templois wiays sacrois
cai marois cai montois
meom pred yom prenu!

Dhewo wentom endu
[wentom] bonom lendu
cai non tormom grandom
terai maroi pacom
thiam wem ne lawdem!

(...) Mevoj rikanis ĉirkaŭsvarmante la turon
aliepokan, kiu traboris la fundon
profundoceanan por ĉerpi fluidojn fetorajn
kaj gasojn — vantaĵoj homaj, sekve pasintaj:
la borturo ne plu laboris.

Trakrakis la ŝtalon de stangoj kaj fostoj rigidaj
la flustro sterila de ventoj.
Esploraj palpoj de monstroj multbrakaj
enketis enradikiĝojn de l' turaj piedoj.
(La ŝarkoj tamen evitis ĉi metalan krisignon,
riproĉon de nenies konscienco.)

Sur la platformo, en komputiloj nervozaj disvagis
nur hazardaj penseroj de l' lasta gavotanto.
La korpo giganta sen cerbo kovadis
intencojn insidajn: transvadi la akvoamason
indiferentan, invadi kontinenton, kie sin kaŝas
obeontoj...

Radaroj mortis. Kaj tamen konjekte
perceptis la sentumoj reziduaj
ĉeeston de homa ekzisto proksime,
vagantojn sur flosoj, teron serĉante.
KAJ LA AKVO FARIĜIS KAJ MALSTROMO EKESTIS
KAJ LA NORDA MARO AGITIĜIS SEP TAGOJN KAJ NOKTOJN

Éva Gál: Strateto

Meva Maron* (Britio)

Originala Prozo
Tria Premio

Belartaj KONKURSOJ '88

Rubusoj

por O.

Urbeto sur ĉefvojo de Dublino al Belfasto. „Transmonda ĉiel' ambaŭfine de l' strat'" – se ne intervenus la terŝveloj kiujn lasis la glaciepoko en pejzaĝo „kiel korbo da ovoj". Dekstre masto por radioelsendoj, maldekstre la radiosondstacio kiu poste fifamiĝos kiel malliberejo. Memoroj pri l' milito en Birmo, esperoj tralabori vintron en Kanado por aĉeti varmajn botojn kaj mantelon. La strato krute norden deklivas, premite inter du bienoj, la provincestra kaj l' arbara. Tia kruco en tempospaco...

Sed rakonti mi komencu. Mojra serĉas Kevin. Ĉu Kevinon skribi? Ne, pli bone simple Kevin: knabo. Knabon. Kevin Groŝon Mojra serĉas. Kiu loĝis ĝis sepjara aĝo en Belfasta korto en kaĝo. Li kondutas kiel homo kun Mojra. Nur kun ŝi. Kaj li forkuris. Norden. Antaŭ la krenelan fortikaĵon kaj malantaŭ falsgotikajn preĝejturojn laŭ la bordo de l' artefarita lago al muro. La muro de l' arbara bieno. Kaj li sekvas tiun muron. Tra vepro, kompreneble. Sed li estas hejme: rampe, kaŭre...

Mojra sekvas sian vojon. Ne al "l' urbo de l' insulo", Ballynahinch, sed – la vojon al Mojra. Ĉar ekzistas ankaŭ tia urbo. Kaj batalo: kie reĝo Sŭini freneziĝis en la jaro 637 („kiel virinoj draŝas linon, / mian popolon...") kaj komencis loĝi en arbokronoj, manĝi akvokreson (nur) kaj verki belegajn poemojn.

Pura sabloŝtona muro ĉirkaŭ l' provincestra bieno. Nu, repurigita: tiajn murojn konstruis senlaboruloj dum la tridekaj jaroj. Mojra haltas. Kontraŭ ŝia domo kreskas inter la strato kaj la muro juglandarbo, malofta tie ĉi. Juglandoj: mola verda ŝelo kun interno tre malmola, kiun oni fendas en du boatetojn – kaj jen la nukso mem, du krispaj duonsferoj kiel cerbo... Laŭdire trans la muro restas tomboj de l' kvakeroj: unu tagon dum la jaro eblas vagi dum du horoj en la bieno. Do ni serĉu iam... Serĉi, serĉi: ne, ne, Kevin tien ĉi ne venis, neniu ĉe ni. La kapo doloras. Kaj plue laŭ la strato nur maljunulino loĝas, el la familio de Mejn-Rid, verkisto el rakonto de Ĉeĥov pri knaboj kiuj Amerikon sopiras...

Dume Kevin en la vepro trovis ke la nigraj beroj aŭ grapoloj kiuj purpurigas lipojn kaj fingrojn estas tre bongustaj. Nun li haltis. Jen pordego, farbita verde. Kaj apud ĝi dometo. Kalke blanka muro. Fumo el tubo. Li komencas timi. Io tamen jukas lin malfermi la prodeton kiun li rimarkis en la granda verda prodo. Trae: strato. Trans la strato heĝo kun la nigraj beroj, kun paseroj flirte... Venis aŭto, li reglitis tra l' pordeton, riglis kaj rekuris kaj rekaŭris en la vepron.

Li ne vidis bluajn montojn trans la heĝo, aliajn bluajn montojn, ne tiujn fine de l' ĉefstrato; kaj vidinte li ne scius nomi ilin Mornaj. La montaro restis nevidebla ankaŭ al Mojra, eĉ de supre de l' unua hilo (Pardonu la piĉismon! Vere mankas tamen ĝuste tia vorto: en l' irlanda karn, knok, sliv, ben... Nur mont', montet', montego – tro mizera vortprovizo!), sur l' unua terŝvelo sur l' alia vojo kiu rekte suden gvidas: supren kaj malsupren do, de hilo al hilo, dum la vojo al Dublino pli serpentas por komplezi al la kamionoj kiuj vekis Mojran nokte kiam ŝi komencis instrui malsupre, en l' eksdomo de l' pastro, al handikapitoj. Kiom da jaroj nun? Oni diris, ke nur kvin, pli longe oni ne eltenas: tro kaprompa kaj korŝira metio...

Rustaj ujoj, ŝtofĉifonoj kaj haladzo: la ciganoj ne plu haltas ĉe la kampo en kiu staras monumento al iama bienestro por ke li rigardu de la supro ĉion posedatan. Nur ŝnurligita kapro scivolas, kies ruĝaj vangoj venas tra l' vojrandan koton en mantelo framb- aŭ ĉu erikkolora? Kiu kaŭre ŝrumpe sub la kapdoloro tretas lekantetojn, kiujn geinfanoj plektis en girlandojn, ungtruante tigojn, kaj lasis sur la kota vojo...

Kiel oni vidas malproksiman finon de tunelo, Mojra sub la kapdoloro vidis foran bildon: teron sub piceoj en aprilo tapiŝas anemonoj, molaj pingloj subpiede kaj pendantaj etaj blankaj kloŝoj: trinki trinki trinki blankon blankon...

Aliflanke de l' kaduka muro de l' arbaro, nur unu metron alta anstataŭ tri en kelkaj lokoj, Kevin venis post eriko kaj post klara akvo brile trafluanta brunajn ŝtonojn al la loko kie en aprilo blankas anemonoj – kaj sinkis en la molajn pinglojn, sur la molaj pingloj kuŝis, rulis sin...

Scivole venis eta blanka hundo kaj singarde snufis, kiu estas tiu, kiu sube kuŝas. Longe ili unu l' alian rigardis: Kevin etendis brakon, la hundo retropaŝis kaj flarante realproksimiĝis. Fine Kevin releviĝis kaj la blanka hundo forimpetis, gvidante tra falintaj fungoplenaj trunkoj – jam falfoliaj arboj, ne piceoj – al malalta ruba breĉo en la muro. Kevin sekvis, post hezito li malkaŭris kaj transpaŝis, vidis trans ferkrado la konatan mantelon... Li haltis en konsterno, dum la hundo returnis la kapon, scivolante kial l' ulo ne plu sekvas.

Mojra gapis al la bluaj montoj – la konataj, trans Belfasto – respiris anemonan freŝon, puŝis verdfarbitan feran kradon en kampon, trenis sin tra koton kiun elirante tretis la bovinoj, tretis bluon de l' jam pala ĉielo en huftru-flakoj, ambaŭ ŝuoj suĉaĉis... Kevin kuras post la hundo, Mojra ĉirkaŭbrakas lin, rubusŝmiritan, kotŝmiritan...

Laŭ ĉefvojo de Belfasto al Dublino retrenas sin bovinoj post vespera melko.

*Supozeble pseŭdonimo de Kris Long.

Emilia Lapenna (Jugoslavio)

Dedičita al Adamo Goralski Pawlikovski la mecenato de la Esperanta teatra arto

Belartaj KONKURSOJ '88

Teatraĵo, 3a premio

LANĈO

Unuaktaĵo teme ligita al la epoko de Zamenhof. Okazas dum unu horo en unu Varsovia aŭgusta tago, 1887.

PERSONOJ:

Doktoro Ludoviko Lazaro Zamenhof
Marko, lia patro
Rozalia, patrino
Feliks, frato
Klara, edzino
Aleksandro Zilbernik, lia bopatro

Simpla ĉambro, dekstre skribotablo, maldekstre negranda tablo kovrita per libretoj, pakpapero, ŝnuroj, tondilo. Kelkaj seĝoj, du iom antaŭe, sur ili de tempo al tempo eksidas la du patroj. Unu modesta libro-bretaro plena de libroj kaj paperaĵoj.
LL Zamenhof sidas ĉe sia skribotablo kaj legas leterojn, eniras Klara.

KLARA Karulo, vi tro legas, vi tro strečas okulojn. Ĉu multaj leteroj venis? Ne, ne tro multaj, kaj, kaj, hm...

LLZ Jes, mi scias kion vi volas demandi. Ĉu venis respondo de iu grava persono. Ne, gravuloj silentas.

KLARA Silentas ĝis nun, sed ne silentos eterne. Vi vidos, mi estas konvinkita ke baldaŭ respondos via Odo, aŭ Korolenko, aŭ Kotarbinski.

LLZ Kial vi ne diras tuj ke eble respondos Max Müller. Ho, se tiel estus, kia feliĉo por nia afero. Tuj mi enmetus lian opinion.

KLARA Enmetus kiel aldonaĵon nur se tiu opinio estus favora.

LLZ Ne povas esti ne favora, li ja estas lingvisto, li ja scias kio estas karaktero, konstruo kaj melodio de la lingvo kaj kiom necesa estas hodiaŭ la internacia lingvo. Ne, mi eĉ rifuzas la penson ke Max Müller ne kapablus kompreni avantaĝojn de mia propono.

KLARA Propono?

LLZ Por nun propono, hja, ne ekzistas popolo parolanta la internacian lingvon. La lingvo vivas nur en buŝoj de la popolo. Kaj kie estas nia popolo?

FELIKS (eniras) La popolo venos al vi, ĝi devas veni, nepre, nepre, nepre.

LLZ Ho, Feliĉjo, bonvenon, ŝajnas, ke vi rapidis, ĉu?

FELIKS Hm, jes, jes, mankison Klara, saluton al granda frato „Barono Ludoviko de Nowolipie".

LLZ Lasu gimnazian šercojn, diru kie vi estis. Klara atendas vin, kelkajn pakaĵojn ŝi jam pretigis.

FELIKS Bone, bone, bone, ĉion ni solvos, ĉio hodiaŭ estos ekspedita, ne zorgu via frata moŝto. (Aliras al la tablo kie Klara jam pakas).

LLZ Ne piku. Kie vi do estis? Vi ne respondis.

FELIKS Mi, mi kie estis, hm, fakte, jes, fakte nenie mi estis.

KLARA Lučjo ne insistu, eble li volas prisilenti ian galantan sekreton.

FELIKS „Mensogo por la amo" de kiu ĝi estas? De iu Lab, Lab, Lab, nu, mi ne povas rememori. Bedaŭrinde, galanta mia sekreto ne estas.

LLZ Tamen sekreto, do diru, kie vi estis?

FELIKS Nu, mi promenis antaŭ nia gimnazio.

LLZ Antaŭ gimnazio? Kaj kion vi serĉis tie en la feria tempo? Krom pedelo tie estas neniu.

FELIKSA Hja, tie mi solvadis kvadratigon de cirklo.

LLZ Feliĉjo, vi bone scias ke vi ne kapablas mensogi. Ne inventu gimnazion, kvadratigon de cirklo kaj similajn stultaĵojn.

KLARA Lučjo, ne insistu, ni ĉion finos, nur mi volus ordigi plejparton antaŭ la alveno de via patro.

FELIKS Ho, ĉu la patro venos? Do tiam mi diros al vi kie mi estis ĉar antaŭ li certe mi ne parolos pri tio.

LLZ Nu, diru fine, kie vi estis?

FELIKS Če Herr Heilig. Vi scias ke lia libro-vendejo situas vidalvide de la gimnazio.

LLZ Ĉu vi bezonis iun libron? Kial vi ne diris?

FELIKS La libron mi ne bezonis. La libron mi portis al li. Vian libreton „Mejdunarodnij jazik".

LLZ Ho, kial?

FELIKS Ke li metu ĝin en montro-fenestron, ke la homoj vidu kion inventis mia granda frato.

LLZ Hm, kaj kion vi atingis tie?

FELIKS Kion mi povus atingi če tiu rigidanima skeleto? Li diris: „Wos, wos?" Mi ke eksponi la libron en iu nekonata lingvo? Jesus-Maria. Mi? Mein Gott". Per multaj vortoj mi klarigis al li ke tiu estas la nova lingvo, apartenanta al eĉ ne unu popolo, do neniu povas esti ofendita pro la lingvo en tiu libreto. Fine li tamen česis ĝemadi dirante: „Nu gut, alles gut, se pan Straslivko metos vian libron en montrofenestron, faros tion ankaŭ mi."

LLZ Tiu kapablas absolute nenion memstare decidi. Veršajne li demandas iun, ĉu mi rajtas terni?

FELIKS Kion fari, homoj estas tiaj.

LLZ Ne ĉiuj.

FELIKS Eble ne ĉiuj, sed pan Straslivko estas la sama timulo. Dekfoje li demandis min, ĉu la cenzuro permesis la eldonon de tiu libro? Ĉu mi vidis la stampon? Jes, mi vidis belan, grandan, caran stampon, nu, pan Straslivko, ĉu vi volas meti la libron en fenestron? Jes, li volas, kial ne, ja ĝi estas permesita per la cara stampo, sed metu ĝin unue en sian montro-fenestron Herr Heiling, li tuj, tuj post tio, propramane, faros la samon. Nu jen, ĉu tio ne estas kvadratigo de cirklo?

MARKO (eniras) Kvadratigo de cirklo? Pri tio vi okupiĝas. Ĉu unu novbakita studento ne povas trovi pli saĝan laboron ol ne solvadi nesolveblajn problemojn? Šalom, bonan tagon, mankison Klara.

LLZ Bonan tagon patro Marko, bonvolu, eniru, sidiĝu.

KLARA Fartu komforte sinjor' Marko.

MARKO Ne longe mi restos. Mi venis nur vidi ĉu iu grava persono respondis al tiuj viaj „promesoj". Kia senmodesta pretendo, promesojn donos al vi, nekonata juna doktoro, universitataj profesoroj. Hja, vere, oni devas esti pli ol naiva por esperi ion similan.

FELIKS (kun Klara apud la tablo pakas librojn) Sed patro Marko.

LLZ Felĉjo silentu, patro Marko rajtas havi sian opinion.

FELIKS Sed tio ne estas opinio, tio estas subtaksado.

MARKO Feliks, kiel vi kuraĝas tiel paroli? Mi pravas. Mi nepre pravas. Ĉu respondis al vi via kara kolego Odo? Ne, sinjoro Odo stud-laboras en Parizo, li sukcesis veni Parizon kaj tie eksperimenti en unu renoma instituto. Kaj vi okupiĝas pri iaj lingvaj strangaĵoj. Kia internacia lingvo! Ĉu ne sufiĉas la latina, la lingvo de la scienco?

LLZ Patro Marko, la homoj ne konsistas nur el sciencistoj, simplaj homoj bezonas komunikilon, pli facilan ol estas la latina.

FELIKS Jes, jes, miloj da simplaj homoj.

MARKO Vi silentu, kion vi scias, nazmukulo pri simplaj aŭ nesimplaj homoj? Pli bone estus, ke vi ion lernu. Bone ke vi helpas al Klara, sed tiu tuta pakado kaj ekspedado estas komplete vana laboro, krome multekosta. Elazar, kiom da mono vi elspezis por presado kaj nun por poŝtmarkoj, kiom da necesaj aĵoj vi estus povinta aĉeti por via nova hejmo. Jen, rigardu, vi havas nenion. Kie estas foteloj, kie bildoj, kie tapiŝoj, kie speguloj? Anstataŭ aĉeti tion, vi ĵetas monon en buŝon de presisto kaj poŝto. Nekredeble!

KLARA Sinjor' Marko, iom post iom ni aĉetos fotelojn kaj tapiŝojn, sed nun urĝas ekspedi tion.

MARKO Urĝas, urĝas, al vi urĝas sed al respondantoj de viaj ,,promesoj" ne urĝas. Neniu degnis respondi.

LLZ Nes estas tiel, pluraj jam respondis.

MARKO Respondis, kiuj? (Li prenas leterojn de sur la tablo) Iu instruisto, iu ĵurnalisto, iu kontoristo, sed eĉ la kara kolego doktoro Bujwid ne respondis.

LLZ Li certe respondos, mi ne dubas pri tio.

MARKO Certe, certe, ne konsolu vin per trompaj esperoj (prenas liston). Ho, Dio, ĉu al tiuj vi intencas sendi vian naivan ,,promeson"? Al Friedrich Nietzsche, al Jules Verne, kion vi volas de tiu verkisto, kiu per siaj fantaziaĵoj frenezigas knabojn, al lordo Baden-Powel, nu certe lia ,,butler" eĉ ne transdonos vian leteron al li, kio, kio, kiu estas tiu Lumi138re? Ĉu tiu franca kafejisto, kiu per sia magia lanterno amuzas siajn gastojn? Nu, ĉu subtenon de kafejistoj vi bezonas?

LLZ Kial ne, li kapablis inventi ion novan.

MARKO Kaj vi tuj opinias ke nova inventisto bezonos vian novan lingvon. O-o-o kaj kiu estas tiu Baha, ho ĉielo, tiu estas el Persio.

LLZ Jes, li estas fondinto de la nova filozofia kompreno de la mondo, humanisma kaj internacia.

MARKO Ne fantaziu, mia filo, vi povus havi malagrablaĵojn pro ricevitaj leteroj el tia lando kia Persio. Nu certe tiu Baha ne respondos.

FELIKS Tion oni ne povas scii anticipe.

KLARA Felĉjo, lasu ke patro parolu.

FELIKS Sed la tutan tempon li parolas.

MARKO Kaj ĉu necesus ke vi parolu kaj ke mi aŭskultu viajn 19-jarajn saĝaĵojn? Atendu ĝis vi atingos la rajton paroli. Nu, kiu estas plia sur tiu listo? Ho, ĉielpordo, ĉu al li vi skribis? Al grafo Tolstoj? De li vi atendas respondon? De tiu eminenta strangulo el Jasnaja Poljana? Jes, li certe respondus al vi, se vi proponus al li ian novan ŝovelilon, aŭ iun plugilon kiu mem plugus la teron kaj liaj vilaĝanoj povus mediti kun li dume la tritiko mem kreskus sen homa ŝvito. A, tio certe estus io interesa por lia grafa moŝto, sed via internacia lingvo, de tio liaj vilaĝanoj povas havi nenian utilon. Ne atendu respondon de li.

LLZ De ĉiuj mi atendas respondon. Vi vidos, mia skribotablo estos kovrita per leteroj kaj mi ne havos tempon respondi al ĉiuj.

MARKO Elazar, Elazar, ne ridigu min, ho kiel unu doktoro povas esti tiom naiva!

ZILBERNIK (eniras) Ŝalom al ĉiuj.

KLARA Paĉjo, paĉjeto mia, bonvenon.

LLZ Bonvolu senjor' Sandro, eniru, sentu vin bone ĉe ni.

ZILBERNIK Ĉiam mi sentas min bone kie estas mia kara Klarinjo. Karulino, en via kuirejo mi lasis kelkajn skatolojn da sapo, vi certe tion bezonos.

KLARA Ho paĉjo, koran dankon.

LLZ Senjor' Sandro, ne necesis porti tion, por nun ni havas ĉion nepran.

MARKO Ne parolu sensencaĵon. Kiel ,,ĉion nepran"? Kie estas tio ,,ĉio nepra"?

ZILBERNIK Ne koleru, sinjor' Marko, estas mi ĉi tie kiu helpos al ili. Nenio mankos al ili du.

MARKO Nu, senjor' Sandro, vi estas bona patro, pri tio neniu dubas, sed ege, ege mi miras ke vi permesis al mia filo elspezi monon por presado de tiu al neniu necesa libro. Kaj ankaŭ nun li ĵetas monon por poŝtmarkoj, por papero, por ŝnuro.

FELIKS Ĉu oni povas paki sen papero kaj ŝnuro?

MARKO Vi silentu, mi jam diris.

ZILBERNIK Kara junuleto pravas, oni ja ne povas paki librojn per aero kaj afranki per aranea reto. He, se tio eblus, mi pakus tiel mian sapon kaj prišparus multe. Papero, ŝnuro kaj poŝtaĵo dike kostas min, sed estas bone havi aĉetantojn ekster sia urbo. Ne estas bone simili al senjor' Isai, kiu vendas sian sapon nur en angulo de la vendoplaco. Tiu eĉ ne kapablas trovi aĉetantojn inter dommastrinoj de najbaraj stratoj.

KLARA Mia paĉjo estas grandkomercisto.

ZILBERNIK Klara, Klarinjo, ne trogiu, he, se mi havus la saĝon kian via edzo, eble, eble.

MARKO Senjor' Sandro, mi vere ne komprenas kial vi flatas al mia filo? Kion saĝan li faris? Skribis tiun libreton, tio povas nur malutili al li.

ZILBERNIK Ni ne permesos ke io malutilu al li, jes, saĝa estas via filo, sinjor' Marko, saĝe li komprenis kia plago estas kiam la homoj ne komprenas unu la alian. Kaj kiom ridindaj estas tiuj situacioj. Ho, fraĉjoj, ankaŭ nodiaŭ mi tion konstatis.

FELIKS Rakontu, rakontu senjor' Sandro.

ZILBERNIK Vidu, vidu, ankaŭ la junan fraton jam mordas vermo de lingvaj problemoj.

FELIKS Jes, jes, la lingva diverseco estas la plej granda baro inter la homoj.

MARKO Silentu, kion vi scias pri lingvaj baroj? Prefere vi lernu. La germanan vi ne bone konas, la francan eĉ malpli, la jidan vi parolas malpli bone ol la kuirista helpanto de sinjor' Oton.

ZILBERNIK Ne koleru sinjor' Marko, ne koleru, junulo pravas, plenkreskaj homoj estas ege ridindaj ne povantaj interkompreniĝi. Ho, ho, kiom mi ridis hodiaŭ sur la vendoplaco. Tie en sia angulo sidis senjor' Isai kaj per sia kriĉa voĉo tra la barbo grakis ,,fajnsajf, fajnsajf". Subite aperis de ie rusa giganto, aŭdis lin kaj ektondris ,,ĉto to fajn, vi juda monstro, parolu pa ruski". Senjor' Isai preskaŭ mortis pro la timo, komencis balbuti ,,fajn haraŝo, fajn haraŝo via rusiš moŝto mia sajf haraŝo". La giganto mildiĝis dirante ,,tak, tak, vi juda nigra muso, davaj tutan keston". Isai pro timo konfuziĝis, ne komprenis kion volas la ruso kaj komencis tiri sian keston sur ĉaron volante forkuri. Tio terure kolerigis la ru-

Belartaj KONKURSOJ '88

son, li komencis blasfemi opiniante ke senjor' Isai ne volas vendi al li la sapon. Ambaŭ kriis unu al la alia, ruso ,,davaj, davaj", senjor' Isai ,,jes, jes, jes, ne, ne, ne", ruso ĉiam pli kolera ektondris ,,kion jes, jes kaj ne, ne, ĉu vi volas vendi aŭ ne?" Fine intervenis iu tria, kaj senjor' Isai komprenis ke tiu grandulo volas aĉeti tutan keston de liaj sapoj. Poste li plenan horon ĝemis ,,Malbenita rusiŝ taŭro kiel li timigis min". Tiam mi alkriis ,,malbenita nekompreno, ĝi estis la kaŭzo de via timo".

MARKO Nu, Feliks, ĉu vi aŭdis? Vidu, kiel estas necese bone scii la germanan kaj la rusan.

LLZ Kaj la polan kaj jidan kaj latinan kaj litovan kaj kiom da lingvoj ankoraŭ? Nur en tiu ĉi anguleto de la mondo ĉiu devas scii kvin, eĉ ses lingvojn. Kaj Amerikanoj scias nur la sian.

MARKO Lasu Amerikanojn, ili vivas en granda lando.

LLZ Ĉu Ruslando estas malgranda? Granda aŭ malgranda lando, lingva babilono ĉie ekzistas.

FELIKS Jes, ĉie, sed tion forigos via lingvo, Lučjo. Via Esperanto.

MARKO Ĉu? Tiu liliputa libreto venkos la grandan babilonon? Nu, kredi ion similan tio estas nur fantaziajo, sed multe, multe pli tragika: blinda kredo al nekredeblo.

ZILBERNIK Sinjor' Marko, denove vi koleras. Lutek tute pravas, neniu povas scii dekon da lingvoj. Jen hodiaŭ en mia foira placo estis italoj. Italaj komercistoj venis vendadi sian dolĉan varon. Tre bonaj frandaĵoj. Seka vinbero, migdaloj, salitaj olivoj ho, jes, Klarinjo, mi aĉetis ion por vi. Vidu, vidu, hja, mi oldiĝas, preskaŭ mi forgesis pri tiu eta bonodora aĵeto.

KLARA Bonodora, pačjo?

ZILBERNIK Jes, italoj kriaĉis ,,benisimo, benisimo". Mi iel komprenis kion tio povus signifi kaj aĉetis por vi. Estas lavenda oleo. Jen ĝi.

KLARA Ho, koregan dankon, ĝi bone odoras, sed estas iom nekutima, forta kaj tute aparta odoro.

FELIKS En farmacio oni diras ,,Lavandula".

MARKO O, la farmacia novico jam kvazaŭ el maniko elverŝas faknomojn de plantoj.

ZILBERNIK Tiuj italoj diris ,,lavenda oleo". Multaj aĉetis.

LLZ Jen patro Marko, italoj venis nian urbon. Tuj komencu lerni la italan, eble venos pluraj, eble venos multaj, ni ja devos scii la italan.

ZILBERNIK Nu, la interkompreniĝo ne estis facila. Tiuj niaj barbulaj fraĉjoj per sia forgesita hispana lingvo, volis paroli kun ili. Sed ne estis facile. Ĉiuj ĉirkaŭe nur ridaĉis. Ankaŭ mi. Italoj kriis ,,va bene, va bene", niaj sciis nur ,,senjor' italiano, senjor' italiano", kriaĉis, kriaĉis, sed ne sukcesis kompreni unu la alian.

FELIKS Al mi tre plačas la itala lingvo.

MARKO Kion vi scias pri la itala? Ĉi tie oni ne lernas ĝin.

FELIKS Ĉi tie ne. Ne estas la itala la sola afero, kiun mi scias kaj ne lernis en la gimnazio.

MARKO Ho, he, vidu, vidu kaj kiuj estas tiuj ekster-lernejaj scio-fontoj de mia kara filo?

FELIKS La italan gramatikon mi trovis inter la libroj de mia granda frato.

MARKO Kiom da mono vi elspezis por tiuj diversaj lernolibroj. Nun, kiam vi finverkis vian lingvon, tio estas morta kapitalo, tio servos al vi por nenio.

ZILBERNIK Denove vi koleras sinjor' Marko. Se vi volas lerni la italan, nu, komplika ĝi estas. Ankaŭ tiuj homoj estas komplikaj. Almenaŭ por mi šajnas strange ke simplaj foirejaj čarvendistoj havas du nomojn.

FELIKS Du nomojn? Kial?

ZILBERNIK Kial, tion mi ne scias. Sed tiu brunulo de kiu mi aĉetis la bonodoran boteleton por Klara, estas Ĝankarlo. Unu juna virino vokis ,,Ĝankarlo, Ĝankarlo" kaj li respondis ,,Subito, subito". Mi komprenis ke lia nomo estas Ĝankarko kaj poste mi demandis nian saĝulon senjor' Spalato, li ja scias ĉiujn lingvojn, kion signifas tiu ,,ĝan". Karlo estas nomo ekzistanta ankaŭ ĉe ni, sed kial meti tiun ,,ĝan" antaŭe? Ĉu tio estas ia nobela titolo? Ĉu en Italio nobeloj vendas varon sur la vendoplaco? Certe ne, diris la saĝa Spalato. Ĝan estas unua nomo, Karlo la dua, multaj italoj havas du nomojn tio estas kutimo en tiu lando kie kreskas lavenda.

MARKO Nun ne nur en Italio. Jen, mia kara saĝa filo ankaŭ ornamas sin per du nomoj Ludoviko-Lazaro hja, tio sonas pli bone ol Elazar, la nomo kiun mi donis al li.

FELIKS Sed sinjoro patro, al ni ĉiuj devige estis alkroĉita la dua kristana nomo.

MARKO Sed aliaj tiun duan nomon ignoras kaj via frato akcentas ĝin.

FELIKS Ĝi pli bone harmonias al lia nova lingvo.

MARKO Hja, tio vere jam estas tro. Nomoj havas nenian ligon kun lingvoj. Mi estas Marko kaj kiom da Markoj ekzistas en Germanio, Francio, Anglio, en Ameriko.

KLARA Ludoviko sonas pli bone ol Lazaro.

MARKO Nun ankaŭ vi, Klara, komencas filozofiadi pri la lingvoj.

ZILBERNIK Lasu filozofiadon, karuloj. Estu nia kara doktoro Ludoviko, Lazaro aŭ Elazar, li estas saĝa kapo. Mi tion scias, mi, simpla sapfaristo, mi, kiu ellernis sole legi kaj skribi, sed homojn mi konas. Kiam mi lernis la metion, ili batis min per botoj, ili vangofrapis min, ili kraĉis sur min, sed ĉiam mi sciis kiu estis devigita fari tion pro mono aŭ obeemo, kaj kiu batis ĉar en li nestas besta naturo, kiu batas por plezurigi la propran malbenitan koron. Ho, kiom mi malamis tiajn, sed la skolo estis bona. Nun mi konas homojn. Min ne superruzus iu ventkapulo, iu pajla kapo šajniganta gravulon, iu sen groŝo en poŝo ĵetanta konsilojn kvazaŭ granda financisto. Ne, mi ne estas viktimo de tiaj. Bone mi scias ke nia Lutek estas homo escepta, malmultaj estas tiaj.

MARKO Senjor-Sandro, ĉesu komplimenti, vi eĉ infektos min, mi sentos fieron ke mi havas tiel saĝan filon.

ZILBERNIK Fieri vi devus, kaj anstataŭ fieri vi konstante koleras.

ROZALIA (eniras) Sanon kaj feliĉon al ĉiuj. Kiu koleras, ĉu mia Marko? Ho, ne. Li havas tian parol-manieron.

LLZ Mankison panjo. Venu, venu, sidiĝu.

KLARA Bonvolu, sidiĝu, vi certe lacas.

FELIKS Kiseton kara panjo.

ZILBERNIK Šalom, patrino Rozalia.

ROZALIA Ankaŭ vi estas ĉi tie. Grandan societon mi trovis kaj mi supozis ke hejmas nur nia juna paro.

MARKO Ili ja hejmas, vi vidas kiom da laboro estas en tiu čambro: libroj, papero, pakaĵoj, poŝtmarkoj, leteroj de via filo, monto da senutilaj paperaĵoj!

ROZALIA Lutek, Lutek, ĉiam vi laboras, tro vi laboras, vi ja bone scias kiom vi devas gardi viajn okulojn, neniel tro streči ilin.

LLZ Mi scias, mi scias, kara panjo. Estas ja nenia granda laboro cerbumadi kaj skribi kelkajn adresojn.

MARKO Centojn da adresoj vi skribis. Centojn.

KLARA Ankaŭ mi helpis.

MARKO Vi povas bedaŭri vian laboron. Eble de ĉio estos nenia rezultato.

Belartaj KONKURSOJ '88

FELIKS Mia kara patro estas nesanigebla oponanto. Kiel nenia rezultato? Jam estas rezultato sur la skribotablo. Respondoj estas ĉi tie.

MARKO Respondoj de kontoristoj. Ĉu vi ne komprenas, ke tio estas malsukceso, ne sukceso.

LLZ Eble mi kulpas. Eble mi ne elektis la ĝustajn adresojn. Eble mi devis peti opinion de tute aliaj homoj.

KLARA Luĉjo, ne kulpigu vin, respondoj venos.

FELIKS Venos, venos, tute certe. Nun, kiam ni ankoraŭ forsendos tiujn pakaĵojn, respondoj torente alflugos!

ZILBERNIK Kara knabo, kiel brile kapablas esperi lia koro.

ROZALIA Lutek, karulo mia, jen mi elprenis el mia sako...

LLZ Dankon, dankon panjo. Ion mi devas tuj noti.

ROZALIA Sed Lutek, rigardu kion mi alportis.

LLZ Jes, jes panjo, tuj post kiam mi notos. Iun mi forgesis en mia listo. Hodiaŭ mi renkontis mian amikon Teo kaj li atentigis min pri nia universitata kolego el Moskvo. Ni nomis lin Antoŝa. Li, same kiel mi, skribis ion por iaj gazetoj, mi por „Ruskij Jevrej" kaj li por kiu gazeto, nun mi ne rememoras. Monon li bezonis, ne por plezuro, sed por la vivo, egale kiel mi. Teo diris ke li nun fariĝis jam sufiĉe konata verkisto, ke liaj rakontoj aperas en renomaj revuoj. Nu, kio estas lia nomo? Antoŝa, Antoŝa, jes, Ĉeĥov, nepre mi skribos al li. Sed la adreson mi ne scias, tamen mi notos la nomon Ĉeĥov.

ROZALIA Ĉu vi nun povas rigardi? Vidu belan laktopanon mi alportis al vi. Ĉiam vi ŝatis ĝin. Kiel etulo vi pepis „latopano, panjo, latopano". Ho, kiel malgranda bubeto vi estis.

MARKO Ĉesu jam dorloti tiun maturan homon, li ja estas doktoro, ne knabeto.

ROZALIA Por mi li ĉiam restos mia malgranda knabo, ofte malsana.

MARKO Ne parolu nun pri tio.

ROZALIA Klara scias, ke Lutek estas sentema je sano.

ZILBERNIK Mia Klarinjo sanigos vian filon. Ŝi havas tiel molan manon, kiam ŝi masaĝas mian nukon, doloro malaperas kvazaŭ fortranĉita.

KLARA Sed paĉjo, ne bezone ke mi masaĝu Lutek, li ja estas juna, liaj okuloj estas iom feblaj, ne la nuko.

ROZALIA He Klara-kara, pardonu, kompreneble, la laktopano estas ankaŭ por vi, nur mi ne scias ĉu plaĉos al vi mia panfarado, vin instruis kuiri via patrino.

KLARA Patrino Rozalja, eĉ ne gustumante, mi scias, ke via laktopano estas bonega. Perfekte vi kuiras.

ZILBERNIK Se mia Klara donas tian komplimenton, certe patrino Rozalja estas majstrino pri kuirarto.

MARKO Nekredeble, nekredeble, nun plonĝas komplimentoj ankaŭ por mia edzino. Ja mi vere devus esti la plej feliĉa homo en la mondo: mi havas genian filon kaj genian majstrinon-edzinon. Ho, se la vero estus tia, sed ĝi ne estas.

ZILBERNIK Ne estas, ĉar vi mem ne volas scii kian filon kaj kian edzinon vi havas.

LLZ Mi scias kian panjon mi havas. Mi scias ke eĉ ne unu laktopano en la tuta Varsovio egalas al tiu de mia kara patrino. Koregan dankon, panjo.

KLARA Ankaŭ mi aliĝas al la danko. Mi ne sukcesis ion bonan baki dum tiuj tagoj de ekspedado.

ROZALIA Ne laciĝu, karulino, mi bakos kukojn por vi dum daŭras tiu laboro.

MARKO Kia laboro? Kia laboro?

ZILBERNIK Homo, homo, kia laboro? Ekspedado de libroj.

MARKO Ĉu tio estas laboro? Tio estas vana, plorinda, bedaŭrinda foruzo de la tempo, valora por nenio. Strange, kiel vi tion ne povas kompreni.

FELIKS Sinjoro patro, mi komprenas ke vi pravas kiam venos eĉ ne unu respondo, eĉ ne unu interesiĝo pri la nova libro, eĉ ne unu mendo, jes, tiam vi pravas, sed...

MARKO Sed nun vi bonvolu silenti. Rozalja, ĉu vi donis ĉion al via kara genia filo?

ROZALIA Marko, Marko, ne faru ŝercojn adrese al la propra infano.

LLZ Panjo kara, ĉu estis malfacile al vi porti tiun sakon?

ROZALIA Ho ne, ne, mi devis eliri, mi devis fari aĉetaĵojn, vi bone scias ke viaj gefratetoj ĉiam ion bezonas.

LLZ Kaj ĉu vi ĉion aĉetis?

ROZALIA Jes, jes, mi aĉetis pomojn, iom da prunoj, unu vendadis belajn, tiuj tre frue maturiĝis. Mi aĉetis ankaŭ iom da butero, nu, ili devos kontentiĝi per tio.

LLZ Ĉu ili deziris pli?

ROZALIA Ne, rekte ili ne. Mi scias ke ili estos kontentaj.

LLZ Tamen ŝajnas ke vi ne aĉetis ĉion, diru panjo, eble mi povos helpi.

MARKO Ne bezone, pomoj, prunoj, butero, nuraj frandaĵoj, kion ili volus pli?

ROZALIA Sed vi scias kiom delikata estas Idalka, ankaŭ ŝiaj deziroj estas delikataj.

MARKO Ĉu ĉiun deziron de la propra infano oni devas plenumi? Nu, se vi tiel farus, neniam estus fino de iliaj deziroj.

FELIKS Ne parolu tiel, sinjoro patro, neniam ni deziris ion oran aŭ arĝentan.

MARKO Ĉu eĉ tio necesus? Neniam vi estis malsataj, neniam nudpiedaj.

ZILBERNIK Sinjor' Marko, mi ofte diris ke vi estas bona edzo kaj patro, tamen iom da komprenemo por deziroj de la propraj infanoj, oni ja devas havi.

LLZ Nu, panjo, diru, kion deziras Idalka?

ROZALIA Lutek kara, ŝi ne ploros, ŝi komprenos ke mi tion ne povis aĉeti.

LLZ Diru panjo, ne hezitu, kion vi ne povis aĉeti? Vi ne aĉetis, ĉar vi ne havis sufiĉe da mono. Ĉu?

ROZALIA Monon mi havis, vere, sed ankaŭ ne kuraĝis aĉeti.

LLZ Nu diru fine, kia mistera varo ĝi estas?

ROZALIA Migdaloj, jen migdaloj, ĉar Idalka freneze ŝatas kukon farĉitan per migdaloj, kiun ŝi manĝis ĉe sinjorino Helena.

MARKO Kion, migdalojn? Ĉu por mia kara eta filino ne sufiĉe bonas juglandoj? Italajn migdalojn ŝi volas, vidu, sinjorino Helena puŝis tiun luksaĵon en ŝian buŝeton. Ŝi nutru siajn infanojn per migdaloj, ne infektu la mian per prodigaj deziroj.

ZILBERNIK Kiaj prodigaj deziroj? Ĉiuj infanoj ŝatas migdalojn, la eta Idalka ne estas escepto. Ŝi ricevos siajn migdalojn. Kiu vendas tiujn kernojn?

ROZALIA Ne, ne, ne, senjor' Sandro. Idalka ankaŭ pomojn ŝatas, ŝi forgesos migdalojn.

MARKO Vi estu bona paĉjeto por viaj infanoj kaj la miajn ne dorlotu nenecese.

FELIKS Migdaloj estas nenia dorlotaĵo. Ĉiuj infanoj devus manĝi tiun sekan frukton.

MARKO Ĉiuj? Kaj kiu donus monon por tiu multekosta itala varo?

FELIKS Infanoj ne kulpas ke nur kelkaj, ne ĉiuj, povas ĝui migdalan kukon. Ĉe la olda lamulo oni aĉetas tion.

ZILBERNIK Bone, la oldan mi konas, li estas nek tiom olda, nek tiom lama kiom li ŝajnigas. Super ĉio li estas ruza profitemulo. Bone li scias oferti varon, kiun aliaj ne havas.

MARKO Senjor' Sandro, ne parolu tiel pri nia olda komununa frato.

ZILBERNIK Kiel vi, reagas ankaŭ aliaj kaj ne ripročas pro liaj pipraj prezoj. Ĉu riproči al unu olda povra invalido? Sin-

Belartaj KONKURSOJ '88

jor' Marko, konas mi bone homojn. Bone mi scias kiu vere meritas kompaton kaj kiu nur eluzas la homan naivecon.

MARKO Estu tiel senjor' Sandro, pri ĉio vi scias plej bone. Ĉu entute ekzistas io al vi nekonata?

ZILBERNIK Jes, ekzistas, mi konas la oldan lamulon sed ne scias kie estas lia vendejo, tio certe estas ia kaduka truo.

FELIKS En la strato Krolewska, en la kelo, la tria domo post la angulo.

MARKO De kie vi tion scias tiel precize kvazaŭ vi estus helpanto de la oldulo.

ZILBERNIK Tiu certe ne havas helpanton, tro avara li estas por doni solan groŝon al iu alia.

ROZALIA Senjor' Sandro, vere ne necesas aĉeti migdalojn, mi tre bedaŭras, ke mi tion menciis.

LLZ Ne bedaŭru panjo, vi faris nenion malbonan.

ZILBERNIK Nu, ĉu vi aŭdis patrino Roza? Tian skatolon, kia estas mia sapo-pakaĵo ricevos via Idalka plenan de migdaloj.

ROZALIA Sed senjor' Sandro.

ZILBERNIK Kompreneble, patrino Rozalia, mi ne metos migdalojn en skatolon por sapoj, hja, dommastrino mi ne estas, sed mi scias ke migdaloj estus tre malbona farĉaĵo por kukoj se odorantaj ĵaŭ la sapo. Ne, ne, nur same grandan skatolon ŝi ricevos, ne sapo-keston. Tuj mi vokos mian homon. (malfermas iomete la pordon) Jan, aŭdu, ĉu vi aŭdas? Ivan, I-v-a-n, ĉu vi dormas, Janik, vekiĝu! (el ekstere aŭdiĝa o-o-j) Preparu ĉevalojn, ni veturos al la strato Krolewska. Ĉu vi komprenis? Verŝajne li aŭdis kaj komprenis. Miaj karaj, mi estas foriranta.

ROZALIA Senjor' Sandro koregan dankon, ho, kiel ĝojos mia Idalka.

MARKO Ĝojos, ĝojos, nur dorlotu infanojn, vi vidos kiajn enormajn dezirojn vi per tio instigos ĉe ili.

ZILBERNIK Ne komencu denove, sinjor' Marko. Nek por vi, nek por mi la vivo estis dolĉa. Kial do ne ebligi al niaj infanoj iom da dolĉa gusto se oni tion povas atingi per simpla aĉeto de migdaloj. Nu, ne grumblu.

KLARA Paĉjo mia, kiel bona vi estas. (El ekstere tra la nefermita pordo aŭdiĝas) Sinjorino, sinjorino.

ZILBERNIK Via Marijka vokas vin.

KLARA Jes, tuj Marijka, tuj. Kio, unu letero? Lučjo estas letero por vi. Bela, granda koverto. De kie tio venis. Ŝajnas el interno de Ruslando, jes, certe ne el Pollando.

MARKO Pollando ne ekzistas.

FELIKS Pollando ekzistas, pola ŝtato ne ekzistas.

MARKO Ĉu en ĉi tiu mondo troviĝas io kion vi ne kapablus viamaniere komentarii?

LLZ Jes, la letero estas el interno de la lando. Ĉu el Moskvo? Tie mi skribis al kelkaj. Certe respondas unu el tiuj. He, ĉielo, homoj, homoj, kia feliĉo! Jasnaja Poljana. Ĉu vi komprenas kion signifas tio? Jasnaja Poljana, grafo Tolstoj respondas, li la granda verkisto, la konata pensulo, vidu, sinjoro patro, la respondoj tamen venas, eĉ de eminentaj personoj.

MARKO Sed tralegu unue kaj tiam jubilu, eble li ne akceptas vian lingvon, eble li ofende skribas, ĉar akra li scias esti.

KLARA Legu Lučjo, legu, eĉ se estas kritiko, ni ja devas havi forton kaj kuraĝon akcepti kritikojn.

ZILBERNIK Certe li kritikas, li ja estas saĝa homo.

LLZ Ne, li ne kritikas, li esprimas sian opinion, ĝi ne estas laŭdo.

FELIKS Ne estas laŭdo?

LLZ Ĉu nepre devas esti laŭdo? Estas tre favora opinio, jen „ke la homoj de diversaj popoloj akceptu unu artefaritan plifaciligitan lingvon internacian kaj ke ĉiuj lernu ĝin. Mi plene konsentas pri la granda signifo de la internacia lingvo kaj ankaŭ mi mem tre volonte kunlaboros en tiu agado, laŭ miaj fortoj. Mi esprimas mian konsenton pri traduko en Esperanton de kiu ajn el miaj verkoj."

FELIKS Li kunlaboros, ho sankta stelo, grafo Tolstoj pretas kunlabori. Ĉu ekzistas pli bona novaĵo ol tiu en la tuta mondo? Lev Nikolajeviĉ, ni tradukos ĉiujn viajn verkojn, certe. Mi volus salti ĝis plafono pro ĝojo.

ZILBERNIK Ne saltu, dancu, kantu, jen mi muzikos (elprenas buŝharmonikon, eksonas melodio de la pola mazurko muzikata per tia instrumento)

FELIKS Senjor' Sandro vi scias muziki, vi estas „Janko muzikanto". Vivu senjor' Sandro.

MARKO Nek pli, nek malpli „Janko Muzikanto" de Sienkiewicz.

FELIKS Jes, de nia granda pola verkisto. Ni tradukos tiun prozaĵon ke la tuta mondo ekkonu la verkon de nialanda talentulo, ĉu ne, mia granda frato? Ni dancu! (Brakprenas Klaran kaj ili dancas mazurkon)

FELIKS (dancante kantas laŭ la melodio de mazurko)

Ho eksonu nova kanto
Pri la lingvo Esperanto
Pri ligil' internacia
Revo nia, amo nia!
Revo nia, amo nia!
Revo nia, ami nia!

(Kunkantas Klara. Dancante kaj kantante ili riverencas al la publiko, kurteno falas.)

Izolda Macskássy: Revado

Rifuĝintaj infanoj gaste ĉe la ĉefministro

La 23-an de decembro Miklós Németh, ĉefministro de Hungario akceptis grupon de infanoj, rifuĝintaj el Transilvanio pro la t.n. „sistemiga" (vilaĝdetrua) plano de la rumana registaro. La infanoj ricevis donacon, kaj la ĉefministro promesis fari ĉion eblan por mildigi la sorton de tiuj ĉ. 13.000 rifuĝintoj – plejparte hungaroj – kiuj dum la lastaj jaroj venis al Hungario.
Sur nia foto: la ĉefministro salutas la etajn gastojn.

La „verduloj" ne kapitulacas

Kvankam la hungara parlamento dum unu el siaj aŭtunaj kunsidoj decidis daŭrigi la konstruadon de la giganta hidrocentralo ĉe Nagymaros, la hungaraj verduloj ne kapitulacas. Ili komencis grandskalan kolektadon de subskriboj por atingi plebisciton pri la afero, ĉar ili opinias, ke la decido de la parlamento ne respondas al la vera opinio de la loĝantaro.
Sur nia foto: aktivuloj de Rondo Danubo kolektas subskribojn dum dimanĉa posttagmezo ĉe unu el la plej trafikplenaj lokoj de Budape-





Terorista minaco

En decembro nekonata persono telefone minacis eksplodigi unu el la flugmaŝinoj de la Skandinavia flugkompanio SAS. REzulte de tiu minaco – kiun oni devis preni serioze – oni rigorigis la kontroladon de la pasaĝeroj kaj precipe tiun de la pakaĵoj en la Budapeŝta flughaveno Ferihegy. Tio certe molestas la pasaĝerojn, sed la sekureco devas havi prioritaton antaŭ aliaj vidpunktoj.
Sur nia foto: „rentgenbildo" de valizo.



Internacia Komerca Centro

En Budapeŝto estis konstruita impona Internacia Komerca Centro, en kiu ricevos lokon komercaj reprezentejoj de eksterlandaj entreprenoj. La belan konstruaĵon projektis la hungara arkitekto József Finta, la konstruan laboron plenumis modele la Jugoslavia entrepreno SGP Pomorje-Jeklotehna.
Sur nia foto: alpinistoj purigas la vitrokupolon de la Centro.

MERKATADO EN HUNGARIO
DE PRODUKTAĴOJ,
TEKNOLOGIOJ,
ENTREPRENADOJ EN LA
KONSTRUINDUSTRIO

EKSPOZICIOJ • FAKKUNVENOJ • PREZENTO DE FIRMAOJ • VARPREZENTO
KONFERENCOJ • PROPAGANDO • PROSPEKTOJ • FOTOJ • VIDEOFILMOJ

INFORMCENTRO PRI KONSTRUFAKO
(ÉTK)

Tiu entrepreno servas kiel informejo pri la hungara konstrufako. Pere de siaj oficejoj en la ĉefurbo kaj sep grandurboj de Hungario la Informcentro observas ĉi-rilate la tutan landon. Rektaj kontaktoj kun multaj fakaj informejoj tra la mondo/ Referencojn haveblaj ankaŭ ĉe U.I.C.B. (Internacia Federacio de Konstrufakaj Centroj) kaj C.I.B. (Internacia Konsilio pri Konstrufaka Esplorado kaj Dokumentado), kies membro estas ÉTK.

INDAS KUNAGADI KUN **ÉTK**!

Budapeŝto, VII., Hársfa u. 21. H-1074
Poŝta adreso: Budapest Pf. 83, H-1400.
Telekso: 22-6564
Telefono: + 36 1 117-317



revuo de revuoj

Ofte estas aŭdeblaj movadaj opinioj, kompreneblaj plendoj, ke nuntempe forte malfaciliĝis altiri la atenton de la publiko – almenaŭ kompare al la „iamaj belaj tagoj". Fakte neniam estis facile atentigi kaj varbi al la Internatia Lingvo – kiel ajn utile ĝi povus servi la homojn, iliajn interesojn. Ĉu iliajn interesojn? – ni haltu por momento! Estas ege diversaj la „interesoj" – *lerni* lingvon eĉ se facilegan... Bonvolu tion bone konscii! Cetere pro negranda intereso, pro varbaj malfaciloj samrajte plendas multaj aliaj sociaj, kulturaj movadoj. Efektive tiel aspektas preskaŭ ĉie en la mondo la medio homa, sur kiu la Esperantomovado devas sin konstrui. *Ekstere* do la situacio ne vere subtenas E-on, estas tro multaj kiuj ne kaptas ambaŭmane al la kontraŭ-Babelaj avantaĝoj. Almenaŭ *interne*, en niaj rondoj indas stari pli firme!

En Flandrujo (INFORMILO, 7.) *Ivo Durwael* plenrajte avertas pro la mankanta memfido, kaosa riproĉemo „supren" flanke de ne-esperantaj parolantoj de Esperanto... Maltrankvile li devas fingre montri al tiaj partoprenantoj de E-kunvenoj, kiuj eble ne konscie, eble nur senpripense „sukcesas" ŝoki novulojn de la rondo „amika". Multloke eblas rimarki simile malagrablan fenomenon. La nin vizitanto gasta trovas ĝenan breĉon inter nia entuziasma, amiktona propagando kaj la interne trovita, malkontenton disradianta etoso. Mi pensas, ke indas priparoli komune tiun konduton, levi voĉon kontraŭ la plezure ŝokemuloj kaj malesperigantoj.

En la cetere tre atentinda „Lingva angulo" de THE WORKER ESPERANTIST (5-6.) mi surprizite legis – por sincere diri – la konsternajn instigojn al Novzelandanoj kaj Aŭstralianoj, formi „sudan dialekton" de Esperanto. Kaj simile sonis al Azianoj, havantaj „rajton" tiurilate, (?), ĉar Esperanto pro sia grandparte latinida vortaro iĝas kvazaŭ okcidenta dialekto... Redaktoro el la koncerna regiono, *Jozefo Major* (NOVZELANDA ESPERANTISTO, 9.) facile repuŝas tiun, verdire ne tre forte lanĉitan ideeton. Estas ja konate, ke la internaciaj vortoj plejparte devenas el hindeŭropaj, grave latinidaj lingvoj. Dume la aglutineca strukturo de nia lingvo analogas al la orientaj lingvoj, kaj tiu „dueco" markas la ne-regionan situacion de Esperanto. Feliĉe. Kian utilon alportus dialektoj surbaze de nebulaj „rajtoj" laŭ kontinentoj aŭ regionoj? La grandiozan ideon de internacia lingvo povas venkigi nur firma kunteno de la lingvo, decide kontraŭagante ĉian ajn dissplitemon, permesante nenian dialektiĝon kaj ne-indan ludadon. *Abunde kaj redunde* rifuzas pluraj artikoloj preskaŭ samtempe la intencojn – aŭ tezojn – de „Praga skolo" (ESPERANTO, 11.) kaj tiel de-batas ĝin ankaŭ LITERATURA FOIRO (113.). Emancipiĝon de Esperanto, ekzemple inter literaturistoj nacilingvaj, la skolanoj kredas pruvi per milionvorta super-PIV... Mi dubas, ĉu almontro de Plena Gramatiko iun ajn konvinkus pri samrangeco de nia lingvo. Kaj abundo de sennuancaj sinonimoj certe ne subtenas valoron de literaturaĵo fare de aŭtoro, kiu ne kapablas trovi la jam grandiozajn esprimeblojn kun siaj nuancaj gradoj en nia kultivita lingva materialo. Ekzistas, aperas foje bezonoj, nepre arta neceso, mi ripetas: fojfoje, kaj ne daŭre, kaj konstante, do iam krei neologismon certacele. Samkiel en ĉiu lingvo etna aperas tiaj bezonoj.

Kiel imitindan/imiteblan iniciaton mencias *Aldo de 'Giorgi* la vastan eldon-agadon de HEA (L'ESPERANTO, 10.) en la Italia E-revuo. Sed ne nur la propre Esperantajn librojn, ties surprizajn vendo-ciferojn li trovas tre atentindaj, sed aparte, kaj pleje, la *monfareblon* por financi la E-librojn. Eldoni kaj disvendi centmilojn da ekzempleroj de hungarlingvaj libroj aperas kiel furora metodo en la E-libromerkato, li skribas, ja tie la bravaj eldonistoj baraktas ĉiam pro nesufiĉa kapitalo. La verkoj tradukitaj el Esperanto – ankaŭ pro la volumo-finaj propagandiloj – alportis apenaŭ atenditajn, brilajn sukcesojn eĉ por la kursa varbado en Hungario. Bonvolu nun pormomente reiri al la komenco de tiu ĉi artikolo, kaj indas pripensi la „ĉiamajn" malfacilaĵojn. Eblas do strebi por transsalti ilin...

Ĉu vere? Tion provas respondi esperantistoj en Duala, kiuj eldonis somere (KEA MAGAZINO) E-gazeton en Kamerunio. La movado tie – kiel skribite – estas reala afero, kaj pruvas tion la seriozaj artikoloj, mallongaj sed informaj, ne laste la korespondemuloj el diversaj tavoloj kaj profesioj. La falsan konstaton, ke nia lingvo ne estas vere internacia pro sia Eŭropeca vortaro, ĉi-supre ni jam menciis; sed la situacio, ke ĝi ekzistas plejparte en la malnova kontinento, estas ja ŝanĝenda per energiaj agadoj, ĝuste laŭ la maniero de la Kameruniaj kuraĝaj samideanoj. TEJO-TUTMONDE (5.) dece okupiĝas pri la sekvindaj metodoj, precipe koncerne la junularon, kontraŭ la eŭrocentrisma situacio. TEJO jam *kvarobligis* siajn ekstereŭropajn kongresojn, tamen la konsciaj vekigoj de Esperanto tra la kontinentoj „foraj" nur transpaŝis la necesan sojlon kaj ili estas ankoraŭ forte progresindaj.

JE LA SERVO DE LA KOMERCO KAJ DE LA LOĜANTARO

UZU NIAJN SERVOJN!

GRANDA RUTINO – RIĈAJ SPERTOJ

TUTLANDA RETO – MODERNAJ TRANSPORTILOJ KAJ EKIPAĴOJ

LA EMBLEMO DE VOLÁN ESTAS GARANTIO DE LA BONKVALITA LABORO



ĈIUVOJE – KONDUKE KAJ AVANE

Niaj servoj estas mendeblaj

– en ĉiuj transport-peraj oficejoj de la lando,

– en la servopunktoj de la transportdispona reto de VOLÁN

ADRESARO DE LA ENTREPRENOJ DE VOLÁN

VOLÁN TEFU	1054 Budapest, Tüköry u. 3.
DUNA VOLÁN	1055 Budapest, Bajcsy-Zsilinszky u. 74.
NÓGRÁD VOLÁN	3100 Salgótarján, Rákóczi út 247.
BORSOD VOLÁN	3527 Miskolc, József A. u. 70.
MÁTRA VOLÁN	3300 Eger, Lenin u. 194.
SZABOLCS VOLÁN	4400 Nyíregyháza, Korányi F. u.12.
HAJDU VOLÁN	4031 Debrecen, Szoboszlói u. 4-6.
JÁSZKUN VOLÁN	5001 Szolnok, Landler J. u. 24.
KÖRÖS VOLÁN	5600 Békéscsaba, Szarvasi út 103.
KUNSÁG VOLÁN	6000 Kecskemét, Csáktornyai u. 4-6.
TISZA VOLÁN	6724 Szeged, Bakay N. u. 48.
GEMENC VOLÁN	7100 Szekszárd, Tartsay Vilmos u. 4.
PANNON VOLÁN	7622 Pécs, Bolgár Néphadsereg útja 33.
KAPOS VOLÁN	7400 Kaposvár, Füredi út 180.
ALBA VOLÁN	8002 Székesfehérvár, Börgöndi út 14.
BALATON VOLÁN	8201 Veszprém, Pápai u. 30.
ZALA VOLÁN	8901 Zalaegerszeg, Gasparich út 16.
VASI VOLÁN	9700 Szombathely, Körmendi út 92.
VÉRTES VOLÁN	2800 Tatabánya, Csaba u. 19.
KISALFÖLD VOLÁN	1134 Budapest, Szabolcs u. 17.
AŬTOBUSO VOLÁN	1134 Budapest, Szabolcs u. 17.
VOLÁN Transporta Entrepreno de Amasaj kaj Minejaj Varoj	1052 Budapest, Haris köz 6.
VOLÁNSPEC	1149 Budapest, Nagy Lajos kir.útja 210.
VOLÁNPACK	1108 Budapest, Kozma u. 4.
VOLÁNTOURIST	1051 Budapest, Október 6. u. 11-13.
VOLÁN Elektronika kaj Komputteknika Filio	1113 Budapest, Karolina út 65.
VOLÁN Instrua kaj Faka Perfektiga Filio	1108 Budapest, Ujhegyi út 14.
VOLÁNCAMION Filio	1118 Budapest, Muskotály u. 11.

Bernard Golden (Hungario)

Belartaj KONKURSOJ '88

Premio „Luigi Minnaja"

Piĝinoj, kreolaj lingvoj kaj planlingvoj

1. Difinoj de terminoj

Antaŭ ol ekzameni la rilaton inter piĝinoj, kreolaj lingvoj kaj internaciaj planlingvoj, estas necese pritrakti kvar terminojn uzatajn en la fakliteraturo pri tiu ĉi temo.

a. piĝino. La artikolo en Plena Ilustrita Vortaro estas revizienda. La unua difino priskribas nur la ĉin-anglan piĝinon (Chinese Pidgin English), dum la dua estas lingvistike malpreciza. Piĝino estas porokaza helplingvo, rudimenta leksike kaj strukture, konsistanta el elementoj de du aŭ pli da etnolingvoj. Ĝi estiĝas nature kaj spontane por ebligi parolan komunikadon inter malsamaj etnaj grupoj havantaj difinitan celon, ekzemple komercadon, rilatadon inter mastroj kaj laboristoj, sklavigadon k.s. Piĝino estas nenies gepatra lingvo, kaj ĝi konvenas nur por limigitaj sociaj situacioj. Kiel lingvo-sistemo ĝi estas relative efemera, ĉar ĝi funkcias nur dum la daŭro de la kontakt-situacio.

b. kreola lingvo. Kreola lingvo spontane evoluas kiel ekspansio de piĝino, kiu enradikiĝas kaj stabiliĝas rezulte de ŝanĝiĝintaj socilingvaj cirkonstancoj. Ĝi fariĝas la primara lingvo de la generacio sekvanta la parolantojn de piĝino. Tiuj infanoj ne havas bezonon uzi la denaskajn lingvojn de la gepatroj kaj ne havas eblon alproprigi la lingvon de la dominanta kulturo, plejofte tiu de kolonianoj.

c. sabiro. Ĝi estas nuntempe formortinta piĝino, kiu estiĝis en la Proksima Oriento dum la periodo de la krucmilitoj kaj poste estis uzata en mediteraneaj havenoj kaj Nordafriko. Baze ĝi estas piĝinigita provenca lingvo, influita leksike de la franca, kataluna, itala, hispana, greka kaj ankaŭ diversaj lingvoj de Levanto*, precipe la araba. La nomo sabir devenas de la hispana verbo saber (scii).

d. lingŭafranko. Ĝia etimo estas la du italaj vortoj lingua franca (pluralo: lingue franche), signifanta la frankan (t.e. eŭropan) lingvon. Ĝi estas sinonimo de sabir, do ĝia primara, historia difino estas la sama. La termino estas uzata ankaŭ ĝenerale por priskribi iun ajn interlingvon uzatan kiel komunan aŭ komercan lingvon inter popoloj parolantaj en lingvoj ne reciproke kompreneblaj.

2. Ignorado de piĝinoj kaj kreolaj lingvoj fare de lingvistoj

Same kiel en la kazo de planlingvoj, dum longa tempo lingvistoj ne inklinis okupiĝi pri piĝinoj kaj kreolaj lingvoj, ĉar ili ne rigardis ilin veraj lingvoj kaj ne opinis, ke sciença esplorado pri ili alportos utilajn donitaĵojn. Antaŭjuĝoj de kleruloj rilate ĉi-specajn lingvojn baziĝis ne nur sur iliaj lingvistikaj trajtoj – parolsistemoj leksike malriĉaj kaj strukture rudimentaj – sed ankaŭ ĉar mankis al ili prestiĝo en la sociaj situacioj, en kiuj ili estis uzataj. Reinecke (citita de Hymes, 1971:3) nomas piĝinojn kaj kreolajn lingvojn marĝenaj* lingvoj pro la cirkonstancoj de ilia origino, kaj la sintenoj rilate ilin montrataj de parolantoj de la dominantaj lingvoj, t.e. la lingvoj, el kiuj originis la piĝinoj kaj kreolaj lingvoj. Tiaj marĝenaj sociaj situacioj troviĝis en la novaj teritorioj de Afriko, Azio kaj Ameriko, esploritaj de eŭropanoj kaj poste ekspluatitaj por komercaj celoj. Piĝinoj kaj kreolaj lingvoj servis kiel komunika rimedo inter mastroj kaj subuloj en la epoko de la sklavkomerco, sur komercaj ŝipoj, en tropikaj plantejoj, en minejoj kaj en koloniaj armeoj. Ĝenerale la vivkondiĉoj de la indiĝenaj popoloj estis limigitaj kaj malmildaj.

Lingvistoj rigardis tiujn lingvojn kiel kuriozaĵojn, beb-lingvajn formojn de etnolingvoj. Kvankam piĝinoj kaj kreolaj lingvoj estiĝis pro la urĝa bezono inter diverslingvaj grupoj komunikadi por konkretaj celoj, regis la supozo, ke ili ne estas lingvoj adaptitaj al specialaj situacioj sed estas degenerajoj, lingvoj ne posedantaj proprajn sistemojn sed montrantaj deviojn de aliaj sistemoj. La deveno de tiaj lingvoj estis klarigita ne en la kadro de historiaj kaj sociaj procezoj sed kiel rezulto de manko de scio, maldiligenteco kaj malsupereco de la homoj uzantaj ilin.

Ĉar piĝinoj kaj kreolaj lingvoj estiĝas ĉiam en situacioj de kontakto inter membroj de malsamaj kulturoj kaj lingvoj, ili estas nomataj ankaŭ kontakt-lingvoj. Ankoraŭ unu termino estas komerc-lingvo, kiu emfazas unu el iliaj primaraj funkcioj, la faciligon de komercaj rilatoj inter diversetnaj grupoj. Tamen estas emfazende, ke ne ĉiu komerc-lingvo estas klasifebla kiel piĝino aŭ kreola lingvo, ekzemple la haŭsa de Okcidentafriko.

Malgraŭ la tabuo kontraŭ serioza esplorado de piĝinoj kaj kreolaj lingvoj, jam fine de la 19-a jc. kelkaj lingvistoj komencis okupiĝi pri tiuj lingvo-sistemoj. Ekde la 1880-aj jaroj la germana lingvisto Hugo Schuchardt aperigis studaĵojn pri anglaj kaj portugalaj kreolaj lingvoj kaj la saramaka kreola lingvo de Surinamo (vd. la bibliografiajn referencojn ĉe Szerdahelyi, 1977:364-349). Dum la lastaj jaroj de la 19-a jc. Horatio Hale, usona esploristo, publikigis priskribon de la piĝino de la nordokcidenta marbordo de Nord-Ameriko, konata kiel Oregon Trade Language (Oregona Komerc-lingvo) aŭ Chinook Jargon (Ĉinuka Ĵargono) (Carlevaro, 1984; Golden, 1985). Piĝinoj kaj kreolaj lingvoj kiel apartaj lingvaj tipoj estis efektive distingitaj antaŭ proksimume duonjarcento rezulte de esploroj faritaj de la usona lingvisto Leonard Bloomfield.

3. Piĝinoj kaj kreolaj lingvoj kiel modeloj por planlingvo

Antaŭ unu jarcento venis la unua rekono de la valoro de komparado de piĝinoj kaj kreolaj lingvoj por decidi pri la esencaj trajtoj de internacia planlingvo. La rekomendo estis farita en la raporto de la komitato de la Amerika Filozofia Societo (American Philosophical Society), kiu estis nomumita en 1887 por ekzameni la sciencan valoron de Volapuko (Brinton kaj aliaj, 1888).

La raporto komenciĝas per pritrakto de la dezirindeco de universala lingvo, priskribo de ĝiaj karakterizaĵoj kaj respondo al la demando, ĉu la lingvo de Schleyer plenumas la postulojn. En la unua alineo estas menciitaj la internaciaj komunikadaj rimedoj, kiuj estiĝas rezulte de ĉiutagaj naturaj bezonoj, kiam estas proksimaj komercaj rilatoj inter landoj havantaj malsamajn lingvojn. Ekzemploj estas la lingŭafranko (sabiro) de Mediteraneo kaj la angla piĝino de la havenoj de Ĉinio, „dialektoj, kiuj fontis el la urĝeco de komercaj bezonoj". Citinda estas la sekva frazo: „Tiuj ĉi miks-lingvoj estas nomataj „ĵargonoj", kaj havas tre altan intereson por la sciença lingvisto kiel ilustraĵoj de la principoj de la evoluo de homa parolo." La angla lingvo estas menciita kiel „ĵargono" de specifa tipo. La komitato opinias, ke por la adoptado aŭ kreado de universala lingvo, oni ne hezitu formi ĝin el sufiĉe malsamaj lingvaj fontoj. En la dua alineo estas ankoraŭfoje emfazite, ke la ekzisto de pluraj ĉi-specaj ĵargonoj en diversaj partoj de la mondo atestas la dezirindecon de la simpla formo de interkomunikado, kiu povus esti adoptita ĝenerale. En la diskuto pri simpligo de la gramatiko, ekzemploj estas ĉerpitaj el franc-kreolaj lingvoj.

En Suplementa Raporto eldonita samtempe, la komitato esprimis sin kontraŭ la ekzisto de paradigmaj fleksioj, ĉu de

Belartaj KONKURSOJ '88

substantivoj, ĉu de verboj, kaj apogas lingvon de la analiza tipo. La grava provo de la evoluo de la lingvo estas, ke la frazo esprimu la penson, kiun oni volas transdoni kaj nenion pli. Kiam tio ĉi estas atingebla simple per vortordo en la frazo sen ŝanĝoj en tiuj vortoj, tiaj ŝanĝoj estas ne nur senutilaj sed pezaj kaj malhelpas la pensadon. La komitato atentigis, ke tiuj paradigmaj fleksioj, estantaj vestiĝoj de la barbara stadio de la parolo, estis forĵetitaj kiel senutila rubaĵo en la evoluo de ĵargonoj. Ankaŭ Couturat kaj Leau (1903:507-508) laŭdis alian trajton de sabiroj: „La fakto, ke sabiroj formiĝis spontane kaj nature en diversaj landoj por kontentigi bezonojn de internacia komerco, estas ankoraŭ unu argumento favore al „kunmetitaj lingvoj" [t.e. mikslingvoj], ĉar tio montras, en kiu senco la problemo povas kaj devas esti praktike solvita."

Dum longa tempo la rilato de piĝinoj kaj kreolaj lingvoj kun planlingvoj estis preteratentita de interlingvistoj kaj esperantologoj sed ne tute de kelkaj planlingvistoj, t.e. aŭtoroj de planlingvoj. Ili, informiĝinte pri la ekzisto de piĝinoj kaj kreolaj lingvoj en diversaj partoj de la mondo, estis impresitaj de la pli simpla strukturo de tiuj lingvoj, ilia kunmetado per elementoj venantaj de diversaj etnolingvaj fontoj, kaj ilia celo servi kiel rimedo por komunikado trans etnajn kaj lingvajn limojn. Sekve, estas kompreneble, kial la termino „piĝino" aŭ unu el ĝiaj sinonimoj estis alprenita por nomi planlingvon, funkciantan kiel helplingvo, ĉi-kaze ne inter relative malmultaj diversetnaj homoj en limigita socia situacio, sed internaciskale por ebligi senliman interkomunikadon de ĉiuj popoloj sur egalrajta bazo kaj kun la celo forigi lingvan diskriminacion. Mi kompilis la sekvan liston de tiaj planlingvaj projektoj, kiuj, paradokse, malgraŭ tio, ke ili estis publikigitaj – do ekzistis en skriba formo – efektive fariĝis eĉ pli efemeraj ol la veraj piĝinoj mem!

a. Weltpitshn. Oiropapitshn; En 1915 d-ro Adalbert Baumann publikigis sian naciisme inspiritan simpligon de la germana lingvo nomatan Wede, kiu signifas Weltdialekt (Monddialekto). Malpli bone konataj estas ankoraŭ du similaj transformoj de la germana, Weltpitshn (1925-1926) kaj Oiropapitshn (1928). La uzo de la vorto pitshn (piĝino – la literado spegulas la germanan prononcon de „ĝ" kiel „ĉ") en la nomoj de Weltpitshn (Mond-piĝino) kaj Oiropapitshn (Eŭropa piĝino) estas malĝusta, ĉar la du planlingvoj ne estas miksitaj aŭ kompromisaj projekto sed simpligitaj versioj de nur unu lingvo, la germana, kies ortografio kaj gramatiko estis modifita.

b. Lingua Franca Nuova. Unu el du planlingvaj projektoj havantaj la terminon lingŭafranko en sia nomo estas Lingua Franca Nuova, publikigita de Serafin Bernhard en 1888. La nomo estas itallingva, signifanta novan lingŭafrankon, kaj en la titolo de la germanlingva gramatiko ĝi estas nomata ankaŭ Universalsprache (universala lingvo). La titolo de la dua eldono de la gramatiko (1891) estas Welt-Italienisch Franca (Mond-itala lingŭafranko). Ĝi estas konfuzita kaj malbone prezentita aposteriora sistemo, apenaŭ reguligita formo de la itala lingvo. Temas, do, pri nemiksita lingvo, preskaŭ same malfacila kiel la itala mem. Pro tio ĝi ne plenumas la rolon de piĝino aŭ lingŭafranko.

c. Lingua Franka. Portas la nomon lingŭafranko ankaŭ unu el la pluraj manuskriptaj projektoj de Petro Stojan. Ĝi estis verkita anonime en 1911.

d. Sabir. Ankaŭ la termino „sabiro" estis uzata kiel la nomo de projekto de universala lingvo fare de Pierre Moralda (1932). Ĝi estas preskaŭ nekonata, ĉar mi trovis referencon en nur unu verko pri la interlingvistiko (Monnerot-Dumaine, 1960: vd. „Errata et Addenda" ĉe paĝo 193 – sur 4-paĝa faldfolio aldonita al la libro). Sabir estas naturalisma projekto miksita kun artefaritaj elementoj, havanta fonetikajn difektojn kaj kelkfoje malbone elektitajn bazajn vortojn. Tekstoj en Sabir indikas, ke ĝi ne havas piĝinan strukturon. La leksiko konsistas plejparte el latinidaj morfemoj, sed enestas ankaŭ kelkaj germanaj kaj slavaj.

e. Uni. La aŭtoro de Uni, publikigita en 1974, estas Elisabeth Wainscott. El ĉiuj planlingvaj projektoj pritraktitaj en tiu ĉi sekcio, Uni plej similas al piĝino, kaj J. Klein, la eldonisto, reliefigas tion en la antaŭparolo: „Uni estas piĝina lingvo. Ĝi estas uzata same kiel persono el Ĉinio dirus angle „Me belong Peking" [mi apartenas Pekino], kio signifas, ke li estas el Pekino. La celo de Uni estas permesi esprimadon de simplaj pensoj, por ke oni havu eblon paroli dum vojaĝado" (Wainscott, 1974:vi). Kaj la leksiko kaj la gramatiko estas simpligitaj. Bazaj substantivoj estas triliteraj; tio memorigas la principon de Johann Martin Schleyer rilate unusilabecon de radikoj en Volapuko, konsistantaj el konsonanto, vokalo, konsonanto. La leksiko de Uni konsistas el aprioraj kaj aposterioraj elementoj, ĉerpitaj el diversaj lingvoj, ne nur hindeŭropaj; kelkfoje ili estas draste modifitaj same kiel okazis en Volapuko. Aliaj trajtoj de Uni estas 20-litera fonetika alfabeto sen diakritiloj; mankas la afrikatoj „ĉ" kaj „ĝ", la frikativoj „ŝ" kaj „ĵ" kaj la duonvokaloj „j" kaj „ŭ". Uni havas nur naŭ gramatikajn regulojn. La leksiko konsistas el 464 + 590 bazaj vortoj (= 1054 vortoj) kaj prefiksoj kaj sufiksoj. Jen frazo en Uni kun laŭvorta traduko.

UDI SIMAT IN AVI AF CALIFORNIA FO-TAG ATI.
Ni iris en aviadilo de Kalifornio frue-tago tag-tri.
(Rimarko: ATI konsistas el la prefikso A- (tago) + TI (tri) = merkredo.)

Signifplena biografia donitaĵo pri Elisabeth Wainscott, la aŭtoro de Uni, estas ŝia 20-jara restado kiel rusa rifuĝinto post la unua mondmilito en Ŝanhajo, Ĉinio. Tie ŝi certe aŭdis kaj eble ankaŭ lernis la ĉin-anglan piĝinon, kaj tio klarigas la piĝinecan aspekton de Uni.

4. Kelkaj terminologiaj kaj tipologiaj demandoj

a. Mikslingvoj. Ĉar piĝinoj, kreolaj lingvoj kaj ankaŭ granda nombro de aposterioraj planlingvoj konsistas el leksikaj kaj sintaksaj elementoj havantaj diversajn devenojn, ili estas kelkfoje nomataj mikslingvoj aŭ miksitaj lingvoj kiel en la sekva citaĵo: „La piĝinoj enhavas elementojn el pluraj lingvoj, kun simpligita gramatiko (...) Esperanto ne estas pli multe „mikslingvo" ol piĝinoj (...)" (Lindstedt, 1982; 2-3). En hungarlingva verko pri la internacilingva demando, la tria parto titoliĝas „Mikslingvoj" kaj priskribas diversajn specojn de lingva miksaĵo, t.e. piĝinojn kaj kreolajn lingvojn (Antal, 1984: 175-206). Nur lingvo evoluanta kaj uzata en absoluta izoleco povas resti pura. La parolantoj de lingvoj, kiuj havas kontaktojn kun parolantoj de aliaj lingvoj, baldaŭ trovos, ke ankaŭ ilia lingvo fariĝas miksita. Tamen, pli precize laŭ faka vidpunkto, la termino „mikslingvo" estas aplikebla nur al alta grado de miksado. Antal (paĝo 177) nomas tiajn lingvojn estiĝintajn sub deformitaj socipolitikaj kondiĉoj, lingvaj misformiĝoj, hibridoj.

b. Planlingvoj kiel piĝinoj. Kelkfoje okazas, ke lingvistoj, kiuj estas kontraŭ la nocio de funkcianta planlingvo, malestimige nomas ĝin piĝino aŭ mikslingvo, ne posedanta la esencajn trajtojn de utila homa lingvo. Blanke (1985:12, piednoto 2) citas G.A. Klimow, kiu samnivele klasifas piĝinojn, Esperanton kaj Idon kiel „nur limigite uzeblajn helplingvojn". La usona lingvisto Mario Pei karakterizis Pasilingua de Paul Steiner kiel „spritan piĝinon kunmeti-

Belartaj KONKURSOJ '88

tan mozaikmaniere el anglaj, francaj, germanaj kaj latinaj elementoj" (citita de Rónai: 1969:170-171). Steiner proponis imiti la artefaritajn lingvojn de spontana formiĝo kiel lingŭafrankon, piĝinon kaj Ĉinukan Jargonon, estiĝintajn en natura maniero el la bezono de reciproka komprenado (Couturat kaj Leau, 1903:280 k. sekv.). Li asertis, ke lia projekto estas angla lingvo kun latinida aŭ ĝermana prononco kaj gramatikaj finaĵoj propraj al Pasilingua. Tamen, la strukturo tute ne estas piĝineca.

c. La „piĝina celo" de internaciaj planlingvoj. Szerdahelyi (1979:34) en sia pritrakto de diversaj tipologioj de interhomaj lingvomodeloj, mencias la provon konstrui aŭtonoman tipologion de internaciaj lingvoj. Unu el tiuj tipologioj estas la t.n. kod-sistemo de A. Münnich, hungara komputerikisto (la originala fonto ne estas indikita). Laŭ Münnich la celo de la modeligo de planlingvoj povas esti (1) piĝina, (2) naturalisma, aŭ (3) racia, depende de la grado de komplikeco kaj esprimpovo de la nova lingvo; jen ĝi distancas disde la riĉeco de etnaj lingvoj, jen ĝi provas esti egale esprimpova, jen ĝi superas etnajn lingvojn. Sekve, se la „piĝina celo" estas pli grava, la aŭtoro, dezirante precipe facilecon de lernado, planas malpli da gramatikaj kaj leksikaj elementoj, ol troviĝas en etnaj lingvoj. Ekzemploj de planlingvoj konstruitaj konforme al la „piĝina celo" estas Wede (vd. ∧ 3.a), Latino sine flexione (simpligita latino) kaj Basic English (leksike rudimenta variaĵo de la angla lingvo). En la sama verko Szerdahelyi semas nomenklaturan konfuzon, ĉar li uzas alian terminon por du el la lingvoj, kiujn Münnich klasifas kiel „piĝinajn": „Simila al la kreado de naciaj (regionaj) lingvoj estas la kreado de minimum-lingvoj (ekz. Latino sine Flexione de PEANO) kaj bezik-lingvoj (ekz. Basic English de OGDEN). La diferenco estas en ilia funkcio: la unuaj celas kontentigi la bezonojn de iu etna komunumo (ŝtato) dume la duaj celas plenumi internacilingvajn funkciojn" (Szerdahelyi, 1979:26-27). Rimarku, ke la vorto „bezik-" spegulas la hungaran misprononcon de la angla vorto basic (elp. BEJsik), signifanta „baza".

d. La tipologia pozicio de piĝinaj kaj kreolaj lingvoj: En tipologia skemo de lingvoj, titolita „Ĉefŝtupoj de konscia aŭ arta lingvokreado", kompilita de Detlev Blanke (1985, Tabelo 1), La polusoj estas (1) lingvoj montrantaj liberan historian evoluon sen lingvoplanado (ekz. primitivaj senliteraturaj lingvoj, dialektoj) kaj (2) ĉe la alia ekstremaĵo, lingvoj sen spuroj de historia evoluo, karakterizitaj per racia kaj maksimuma planado (inter ili estas simbolaj sistemoj, muzika notacio, komputeraj lingvoj ks.). Ne estas klare, kial unu el la lingvistoj, A. Sakaguchi, kies verko estas uzata kiel fonto de donitaĵoj por la tabelo, metas piĝinojn, kreolajn lingvojn kaj lingŭafrankojn sur la skalon preskaŭ meze inter la neplanitaj lingvoj kaj la profunde planitaj lingvoj. Kial ili montras pli da konscia planado ol naciaj normlingvoj, minimum-lingvoj kaj la klasikaj lingvoj de la antikveco? Kiel estis akcentite en la difinoj de piĝino kaj kreola lingvo en ∧ 1a kaj b, tiuj lingvoj estiĝas spontane kaj nature, do ilia ĝusta loko en la tipologia skemo estas pli proksima al la neplanitaj lingvoj kiel dialektoj kaj la komuna ĉiutaga lingvo.

e. Komuna funkcio de piĝinoj, kreolaj lingvoj kaj planlingvoj. La plej grava trajto, kiun piĝinoj, kreolaj lingvoj kaj planlingvoj havas en komuno, estas ilia interetna uzo por komunikaj celoj. Dénes Szilágyi (1931/1979:165), unu el la sekvantoj de Giuseppe Peano, diris la samon antaŭ pli ol duonjarcento. Li atentigis, ke lingŭafranko (sabiro), angla piĝino, Ĉinuka Jargono kaj similaj lingvoj ne estas internaciaj lingvoj; tamen ili havas la identan funkcion. En la lasta analizo li supozas, ke tiuj lingvoj estas individuaj produktaĵoj, sed ili diferencas en esenca maniero de internacia lingvo. Tiu ĉi estas formita konscie, dum naturaj lingvoj estiĝas nekonscie.

5. La biologia bazo de lingvokreado kaj lingvolernado

Lingvistoj farinte komparajn studojn de piĝinoj kaj kreolaj lingvoj tra la tuta mondo, rimarkis plurajn similecojn inter ili. Precipe, la gramatiko de ĉiuj kreolaj lingvoj estas pli simila unu al la aliaj ol al aliaj lingvo-tipoj. Tri kialoj estis prezentitaj por klarigi la kialon de tiu simileco.

a. Kreolaj lingvoj estas simplaj lingvoj. Tiu ĉi hipotezo ne estas apogebla, ĉar ĉiu homa lingvo en sia komenciĝa stadio estas simpla.

b. Ekzistas historiaj rilatoj inter ĉiuj kreolaj lingvoj, specife ili havas komunan antaŭanton. En la pasinteco kelkaj lingvistoj opiniis, ke ĉiuj piĝinoj originis kiel kunfandiĝo de la portugala lingvo kun iu loka indiĝena lingvo en diversaj partoj de la mondo, sed nuntempe tiu hipotezo estas elmodiĝinta. La geografia distribuo de kolonioj, kie kreolaj lingvoj estiĝis, sugestas, ke kreolaj lingvoj disvolviĝis sendepende unu de la aliaj. Sekve, oni argumentas, ke se pluraj piĝinoj evoluas sendepende, rezulte de similaj postuloj de komunikado, ili alvenas al similaj lingvaj solvoj.

c. Ekzistas neŭrologia bazo, kiu determinas la gramatikon de la similaj lingvoj. Bickerton (1983) raportas rezultojn de lastatempaj esploroj sur la tereno de piĝinoj kaj kreolaj lingvoj, kiuj montras, ke la baza infan-gramatiko, t.e. la beb-lingvo, kaj la strukturo de kreolaj lingvoj havas multajn komunajn elementojn. Oni supozas, ke la homo estas biologie inklinigita uzi la lingvon, do ekzistas denaska universala gramatiko subkuŝanta en ĉiuj personoj, regata certagrade de neŭrofiziologia disvolviĝo. Tiu gramatiko estas speco de komputera mekanismo, iumaniere efektivigita neŭrologie, kiu havebligas al infano lerĝan gamon de gramatikaj modeloj. La infano poste devas „selekti" gramatikajn modelojn, kiuj respondas al la denaska lingvo. Tiu teorio provas klarigi, kiel infanoj povas lerni en mallonga tempo sistemon tiel kompleksan kiel la homa lingvo. En komunumo uzanta piĝinon, neniu gramatika modelo estas komparebla kun la denaska gramatiko de la infano, do ĝi ne estas subpremita. Ĝi estas vestita per iu ajn leksiko, kiu estas havebla en la koncerna loko, kaj tiu procezo estigas kreolan lingvon. En piĝino oni atingas la universalaĵojn de komunikado, kaj kreola lingvo provizas infanon per simpla kaj sufiĉe specifa gramatika modelo. Tia lingvo estas kvazaŭ stampita en la menso, do estas pli facile por infanoj lerni kreolan lingvon ol alian tipon. Kreolaj lingvoj estas inventitaj de infanoj de miksaj geedziĝoj; la geedzoj mem parolas piĝine. Bickerton (1983) trovis, ke en Havajo la lingvo de enmigrintoj estis ĉiam piĝino; estis nur iliaj infanoj, kiuj parolis en la kreola lingvo.

6. Novaj kriterioj por krei facilan planlingvon

Laŭ la hipotezo en ∧ 5.c, se planlingvistoj deziras krei planlingvon egale facilan por ĉiuj homoj en la mondo, ili devas doni al ĝi strukturon similan al tiu de kreolaj lingvoj, en kiuj speguliĝas la denaska infan-gramatiko. La leksiko estas evidente sekundara, ĉar iuj ajn vortoj el plej diversaj fontlingvoj povas esti uzataj kun la baza gramatika strukturo, ĝuste kiel okazis en la historie dokumentitaj kreolaj lingvoj.

Belartaj KONKURSOJ '88

Alia aspekto de la demando koncernas aktualajn klopodojn disvastigi Esperanton ekster Eŭropo, precipe en Azio kaj Afriko. Anstataŭ fari komparojn inter Esperanto kaj diverstipaj etnolingvoj por marteladi la punkton, ke ĝi ne havas ekskluzive hindeŭropan strukturon sed estas pli proksima jen al lingvoj aglutinaj, jen al lingvoj izolantaj, estos pli utile esplori, kiel Esperanto similas al piĝinoj kaj kreolaj lingvoj, por determini, ĝis kiu grado la denaska infangramatiko manifestiĝas en la sola sukcesa planlingvo.

7. Rilatoj inter piĝinoj kaj kreolaj lingvoj kaj Esperanto

Eble la unua aludo pri la utilo de ekzamenado de la proprecoj de Esperanto kompare kun tiuj de kreolaj lingvoj troviĝas en artikolo publikigita en 1971 pri Papiamento, la kreola lingvo de la Nederlandaj Antiloj, parolata sur la insuloj Kuracao, Arubo kaj Bonajro. E.N. Mulders (1971:48) skribas: „Oni povus aserti ke, se Zamenhof estus sciinta la hispanan lingvon kaj (aŭ) la papiamentan (sensenca supozo, mi konsentas), li sendube estus profitinta el ĉi tiu kono." Dek ses jarojn poste J. Régulo Pérez (1987) publikigis „rudimentan priskribon de Papiamento, tiel, ke Esperanto-lingvistoj povos libere kompari ambaŭ lingvojn. Kaj samtempe plian fojon montri la intuician geniecon de Zamenhof, kiam li sistemigis Esperanton sen scio pri la ekzisto de Papiamento (...)." Régulo Pérez opinias, ke „certe Papiamento kaj Esperanto klasiĝas inter la plej perfektaj lingvoj de la mondo", ĉar ilia strukturo konformas al la kriterio starigita de la konata lingvisto Otto Jespersen, ke „plej alte staras tiu lingvo, kiu la plej bone ellaboris la arton multon plenumi per malmultaj rimedoj aŭ, alivorte, kiu kapablas esprimi plej multe da signifo per la plej simpla meĥanismo." La punkto, kiun Régulo Pérez reliefigas, estas, ke ambaŭ lingvoj „povas klare esprimi plej altajn ideojn kaj pensonuancojn sen neceso je kiu ajn morfologia ŝanĝo ĉe la bazaj radikoj (...)." En sia artikolo Régulo Pérez koncize priskribas la gramatikon kaj leksikon de Papiamento sed ne profundiĝas en konfronta analizo por montri paralelaĵojn kun Esperanto.

La unua paŝo al konfronta analizo inter kreolaj lingvoj kaj Esperanto plej probable estis farita de Szerdahelyi (1976:74-75), kvankam en tre supraĵa maniero. Li asertas, ke en la lingvistika fakliteraturo oni ofte komparas Esperanton kun la kreolaj lingvoj, kaj ĉi-rilate li citas la libron A Comparative Study of Creole French Dialects de M.F. Goodman (The Hague, 1964). Szerdahelyi klarigas, ke „kvankam estas esenca diferenco inter Esperanto kaj la diversaj kreolaj lingvoj, tamen oni povas konstati kelkfoje surprizajn koincidojn – precipe formalajn inter la du lingvotipoj." Uzante ekzemplojn el negraj-francaj kreolaj lingvoj, Szerdahelyi ilustras similecojn de vort-korpoj, la uzon de unu sola artikolo („la"), la fenomenon de aferezo, la pronoman sistemon kaj la mankon de la antaŭaj rondaj vokaloj „ö" kaj „ü".

La samaj francaj kreolaj lingvoj estas uzataj de Benoit Philippe (1985) en multe pli detala konfronta prezento de komunaj trajtoj kun Esperanto. La studaĵo pritraktas la fonetikon, fonologion, vortprovizon, morfologion kaj sintakson de francaj kreoloj parolataj en Haitio, Gŭadelupo, Maŭricio kaj Reunio kaj aliloke en Antiloj kaj la Hinda Oceano. La lastaj du sekcioj estas dediĉitaj al diskuto pri komunaj faktoroj en la estiĝo de francaj kreolaj lingvoj kaj Esperanto kaj socilingvistikaj paralelaĵoj karakterizantaj ambaŭ lingvo-tipojn. Por komparaj celoj, oni konsultu studaĵon pritraktantan similecojn inter la genezo kaj socilingvistika disvolviĝo de la orientafrika lingŭafranko, la sŭahila, kaj Esperanto (Golden, 1983).

8. Esperanto kiel tutmonda lingŭafranko en la estonteco

Werner Bormann (1987:102) rimarkigas, ke futurologoj* ne okupiĝas pri planlingva solvo de la problemo de lingva interkomprenado sed antaŭvidas evoluon nur sur la tradiciaj terenoj de plua lernado de fremdaj lingvoj, pli facilaj tradukoj kaj uzo de tradukaŭtomatoj. Sekve, Esperanto restas ekster tiu kadro.

Tamen, kelkaj pensuloj volas trudi la eblon de estonteca solvo de la monda lingva problemo per planlingvo. Ekzemple, la esprimo „internacia lingŭafranko" estas uzata de Andrea Chiti-Batelli (1987:89) en sia pritrakto de la maniero elimini lingvan diversecon en federe unuiĝonta Eŭropo. Li insistas, ke tia lingvo estu inventita neŭtrala lingvo por kontraŭstari al la danĝero de la angla lingvo, kiu ĉiam pli minacas fariĝi la fakta lingŭafranko sur la eŭropa kaj ankaŭ la tutplaneda nivelo. Chiti-Batelli argumentas favore al Esperanto, sed li konscias, ke granda obstaklo malhelpanta akcepton de iuspeca planlingvo estas la psikologia rezisto kontraŭ artefariteco rilate lingvon por homa uzo.

Ĝis nun, post jarcento da strebado, Esperanto ne atingis la sukceson, pri kiu sopiras la Esperanto-komunumo; alivorte, ankoraŭ ne venis la „verda venko" per oficiala agnosko kaj uzado de Esperanto kiel la internacia lingvo. Indas konsideri, ĉu tutmonda lingŭafranko povas estiĝi alimaniere ol per adopto de konscie kreita planlingvo, ĉu Esperanto, ĉu alia „pli perfekta" projekto. Ĉi-kuntekste, Verloren van Themaat (1987:694) atentigas, ke de post 1951, kiam la planlingvo Interlingua (IALA) estis publikigita, neniu nova projekto estis prezentita por konkuri kontraŭ ĝi.

Paulo Rónai (1969:137) faras iom surprizan konstaton pri la nombro de parolantoj, unuflanke de planlingvo, kiu estas kandidato por la rolo de tutmonda lingŭafranko en diversaj partoj de la mondo. Laŭ lastaj pritaksoj pli ol 30 milionoj da homoj parolas en iu el la variaĵoj de angla piĝino, kvaroble pli granda popolamaso ol la plej optimismaj taksoj pri la nombro de personoj, kiuj lernis Esperanton. Jen demando por la spekulativa futurologio*: kio okazos, se la nombro de parolantoj de angla piĝino senĉese pligrandiĝas, dum la Esperanto-movado daŭre stagnas aŭ eĉ regresos? Ĉu estas imageble, ke vera piĝino povas ludi la rolon de internacia lingŭafranko? En tiu kazo, fariĝos minaco kontraŭ la hegemonio de la angla lingvo nek alia etnolingvo, nek planlingvo kiel Esperanto, sed angla piĝino, kiu estas pli facile lernebla ol la angla kaj eĉ la simpligita angla konata kiel Basic English. Aŭ ĉu la solvo povas esti piĝiniĝo de Esperanto?

9. Relativa facileco de Esperanto kaj piĝinoj

Lingvistoj okupiĝantaj pri piĝinoj kaj kreolaj lingvoj emfazas, ke tiuj lingvotipoj estas pli facilaj ol la etnolingvoj, de kiuj ili devenas. Sammaniere, provoj estis faritaj por montri, ke planlingvo estas pli facile lernebla ol iu ajn etnolingvo. En sia argumentado favore al Esperanto kiel estonteca mondlingvo, Bormann (1987:101) marteladas la punkton, ke estas ĝuste la kriterio de facileco, kiu apartigas planlingvon de naciilingvoj; neŭtraleco estas nur sekundara faktoro. Li skribas: „Se ĝi [planlingvo] estas facila, ĝi estas io alia ol nacia lingvo en la konkurenco pri la rolo de internacie vaste uzata interkomprenilo, kaj tiam ĝi havas ŝancon esti multe uzata. Sed en tiu grado, en kiu ĝi distanciĝas de facileco, ĝi alproksimiĝas al la aliaj internacie plue uzataj (naciaj) lingvoj. Per tio ĝi perdas sian apartecon kaj tiel malaperas la kaŭzo, el kiu ĝi prenas sian pretendon partopreni en la klopodadoj pri la rolo de mondlingvo de la estonteco."

Ni nun rigardu tiun vidpunkton iom alimaniere por pritrakti la demandon pri la facileco de Esperanto rilate al piĝino. La gramatiko de Esperanto ja estas reguligita, t.e. ĝi havas malmultajn esceptojn, sed ĝi neniumaniere estas rudimenta gramatiko. Spite al la gurdado de propagandistoj pri la dekses-regula gramatiko de Esperanto, pli realecan bildon de la komplika strukturo de la lingvo prezentas la preskaŭ 600-paĝa Plena Analiza Gramatiko. La leksiko de Esperanto en la komenca periodo de lingvo-evoluo estis limigita, sed nun ĝi pli kaj pli kreskas. Do, se oni volas kompari la facilecon de piĝinoj – laŭdifine lingvoj leksike limigitaj kaj sintakse rudimentaj – kun

Belartaj KONKURSOJ '88

planlingvo kiel Esperanto, estas necese emfazi, ke en tiu grado, en kiu Esperanto distancas de la facileco de piĝinoj kaj alproksimiĝas al la aliaj internacie uzataj etnolingvoj, malaperas la kaŭzo, por ke ĝi ludu la rolon de mondlingvo en la estonteco.

Ankoraŭfoje trafe argumentas Bormann (1987:103): „Se la esperantistoj akceptus facilecon kiel esencan kriterion de estonta mondlingvo, ili devus ne tiel senripense ŝarĝi sian lingvon per reguloj (...) Estas kelkaj eroj en la Esperanto-gramatiko, kiuj estas tre malfacilaj (...)" Se oni komparas la gramatikon de Esperanto kun tiu de piĝinoj, oni tuj rimarkas, ke mankas en piĝinoj gramatikaĵoj kiel la diversaj uzoj de la akuzativa kazo, la komplikaĵoj de la refleksiva pronomo kaj adjektivo, la diferencigo inter transitivaj kaj netransitivaj verboj, la „po"-esprimo, la adverba participo ks. Tiuj gramatikaj kategorioj estas universalaj kaj konstantaj stumbligiloj por ĉiuj uzantoj de Esperanto, senkonsidere de ilia gepatra lingvo kaj nivelo de alproprigo de Esperanto. Erarojn faras kaj komencantoj kaj Akademianoj! Ja eblas argumenti, ke Esperanto, same kiel piĝino, estas simpla lingvo; tamen la granda diferenco estas, ke Esperanto havas kelkajn gramatikajn malfacilaĵojn.

En la nuna stadio de konfronta esplorado, mankas statistikaj donitaĵoj por objektive demonstri, ke piĝinoj kaj kreolaj lingvoj estas pli facilaj ol Esperanto. Tamen, oni ne riskas erari, asertante, ke piĝinoj kaj kreolaj lingvoj estas pli facilaj, ĉar ilia gramatiko atingis pli altan gradon de simpligo, en kiu preskaŭ tute mankas gramatikaj kategorioj kiel la sekvaj: ĉe substantivoj kaj pronomoj ne estas indikitaj nombro, sekso, deklinaciaj kazoj; verboj ne montras konjugacion, personon, tenson, modon, voĉon; malestas akordo inter subjekto kaj predikato.

Indiko, ke la ŝvelanta vortprovizo de Esperanto ne estas la plej grava el la du faktoroj determinantaj lingvan malfacilecon, venas de observo farita de Bausani (1970:24) pri Russonorsk, reduktita lingvo uzata en la arkta regiono dum preskaŭ unu jarcento antaŭ la unua mondmilito fare de rusaj kaj norvegaj fiŝistoj. Unu el la trajtoj de tiu piĝino estas la ekzisto de pluraj duoblaĵoj, samsignifaj vortoj el rusa kaj norvega deveno. Bausani skribas: „Niaj fiŝistoj ja komprenis (pli bone ol multaj interlingvistoj), ke la vera malfacileco de fremda lingvo troviĝas ne tiom en ĝia vortprovizo, kiom en ĝiaj gramatikaj kaj sintaksaj formoj. Tial, ili artefarite simpligis la malfacilajn strukturajn elementojn sed konservis en ampleksa formo la leksikan enhavon."

Laŭ la sama vidpunkto, ankoraŭ unu interlingvisto. Rónai (1969:139-140), laŭdas la sudafrikan piĝinon Fanagalo: „Ĝia gramatiko evidente estas treege simpla; ĝiaj reguloj estas meteblaj sur malmultaj paĝoj (...) se Fanagalo ne estas la plej facila lingvo en la mondo, ĝi almenaŭ apartenas al la plej facilaj." Kaj Rónai finas sian ĉapitron pri piĝino, sabir kaj Fanagalo per jenaj vortoj: „(...) afrikaj negroj solvis la problemon de universala lingvo konforme al sia bezono, dum la loĝantoj de la okcidenta mondo de post jarcentoj vane penadas alveni al kontentiga solvo" (140).

10. La unua paŝo al piĝiniĝo de Esperanto: Minimum-Esperanto

La planlingvo-tipo konata kiel minimum-lingvo estas morta aŭ vivanta etnolingvo, karakterizita per simpligita gramatiko kaj reduktita leksiko. La plej bone konata lingvo de tiu ĉi tipo estas Basic English, kies leksiko estas limigita al 850 anglaj vortoj. Komparu tiun nombron kun la vortprovizo de la ĉin-angla piĝino (proks. 700) kaj la novmelanezia piĝino Tok Pisin (2000). En ĉi-specaj lingvoj la grado de polisemio estas tre alta.

Pli ol unu fojon en la historio de Esperanto provoj estis faritaj por sammaniere simpligi la lingvon. La gramatiko ne estas tuŝita, sed la leksiko estas reduktita al antaŭdeterminita minimumo. La kriterio de la limigo kutime baziĝas sur la ofteco de morfemoj.

a. La „trunko" de la lingvo laŭ Kalocsay. Jam antaŭ duonjarcento Kalocsay (1931/1963: 51) skribis pri la „trunko" de Esperanto en la Universala Vortaro de la Fundamento; temas pri la vulgara vortprovizo, kiun Zamenhof fiksis „kiel eble plej striktan, sed nepre necesan por ĉiu esperantisto". Kalocsay insistas, ke devas ekzisti limigita vortprovizo: „Ĉiu, kiu volas uzi la lingvon nur por ĉiutagaj bezonoj, devas koni ĉi tiun lingvo-trunkon, sed ne bezonas nepre koni pli multe. Ĉiu, kiu volas esti certa pri tio, ke oni lin komprenos, devas uzi nur ĉi tiun trunkan vortprovizon, alie li riskas nekomprenon. Sekve, ĉiuj lernolibroj devas enhavi ĉi tiun vortprovizon, sed nenion pli."

b. La facila lingvaĵo de la revuo „Kontakto". Dua ekzemplo de la koncepto de „Baza Esperanto" aperas en la enhavo de Kontakto, ilustrita gazeto por junaj kaj novaj esperantistoj, eldonita de TEJO kaj UEA. Duono de ĉiu numero estas verkita en aparte facila lingvaĵo. Kunlaborantaj aŭtoroj ricevas de la redakcio tripaĝan instrukcion, klarigantan kiel verki por komencantoj, t.e. kiel simpligi la lingvouzon en Esperanto. Unue, oni devas limigi la vortprovizon. Sur la plej facila nivelo estas permesite uzi nur 520 el la listigitaj morfemoj. Sur la dua nivelo eblas uzi ĉiujn vortojn en la listo, entute mil. Tiu simpligo de Esperanto tuŝas ne nur la leksikon. Verkantoj estas admonitaj uzi simplajn fraz-strukturojn kun kutima vortordo kaj eviti pezajn kunmetaĵojn. Sekve, oni ne rajtas uzi ĉiujn gramatikaĵojn en la lingvo, kaj tial la Minimum-Esperanto de Kontakto akiras la duan trajton de piĝinoj: rudimentan gramatikon.

c. La „Zagreba Metodo". La tria ekzemplo de Minimum-Esperanto estas ilustrita per la didaktika sistemo konata kiel la „Zagreba Metodo", kies instru-programo estas bazita sur draste reduktita vortostoko de 300 eroj. La celo estas faciligi plej rapidan alproprigon de parto de la lingvo por tuja uzo.

Estas evidente, ke la propono de Kalocsay pri uzo de la „trunko" de la lingvo, la postuloj de la redakcio de Kontakto kaj la teoria bazo de la „Zagreba Metodo" celas forigi unu el la faktoroj kaŭzantaj malfacilaĵon por multaj lernantoj de Esperanto, nome la vortprovizon, kiu kelkfoje ŝajnas tro vasta kaj plena de balasto por ordinaraj, ĉiutagaj bezonoj. Rigardante la demandon pri Minimum-Esperanto laŭ alia vidpunkto, oni povas konstati, ke multaj adeptoj de Esperanto, kiuj ĉesigis plulernadon de la lingvo post la unua kurso, tamen restas en la Esperanta lingvokomunumo kaj daŭre komunikiĝas per la limigita vortprovizo de la elementa lernolibro kaj per evito de komplikaj gramatikaj konstruoj. Cetere, ili ne rezistas la tenton eĉ plisimpligi la gramatikon, malgraŭ tio, ke la rezultoj estas malĝustaj. Kiam pluraj tiaj diversetnaj homoj formas interkomunikantan grupon, ilia lingvouzo similas al tiu de parolantoj de piĝino. Ĉar piĝino estas nenies lingvo kaj ĉies lingvo, ne estas fiksaj normoj, kaj ĉiu parolanto individuece simpligas la fontlingvojn laŭ sia bontrovo. En la societo de parolantoj de „Baza Esperanto" aŭ Minimum-Esperanto, same manifestiĝas individuaj emoj simpligi la lingvon. Se tio ne perturbas la interkomprenadon, ĉio estas en ordo. Ĉu tiu fenomeno ne indikas, ke Esperanto estas survoje al piĝiniĝado?

11. Konsultita literaturo

ANTAL, László (red.). A világnyelv (La mondlingvo). Budapest: Gondolat: 1984. 480 pĝ.
BAUSANI, Alessandro. Geheim- und Universalsprachen. Entwicklung und Typologie. Stuttgart: Verlag W. Kohlhammer 1970. 175 pĝ.
BICKERTON, Derek. Creole languages. Scientific American. 1983 julio; 249 (1): 108-115.

Belartaj KONKURSOJ '88

BLANKE, Detlev. Internationale Plansprachen. Eine Einführung. Berlin (GDR): Akademie-Verlag; 1985. 408 pĝ.
BORMANN, Werner. Mondlingvo longperiode. 95-107 en: Serta Gratulatoria in Honorem Juan Régulo. II. Esperantismo. La Laguna (Hispanio): Universidad de La Laguna; 1987. 790 pĝ.
BRINTON, D.G.; PHILLIPS Jr., Henry; SNYDER, Monroe. Report of the Committee appointed October 21, 1887, to examine into the scientific value of Volapük. Supplementary Report of the Committee (...) Proceedings of the American Philosophical Society (Philadelphia). 1888; 25 (127):3-17.
CARLEVARO, Tazio. Oregon Trade Language: ĉu artefarita lingvo? Planlingvistiko. 1984 vintro; 3 (12): 12.
CHITI-BATELLI, Andrea. Communication internationale et avenir des langues et des parlers en Europe. Nice: Presses d'Europe; 1987 197 pĝ.
COUTURAT, Louis; LEAU, Léopold. Histoire de la langue universelle. Paris: Hachette; 1903. Fotorepreso: Hildesheim, New York: Georg Olms Verlag; 1979. 576 pĝ.
DREZEN, Ernest. Historio de la Mondolingvo. Tria eldono. Leipzig: EKRELO; 1931. Fotorepreso: Oosaka: Pirato; 1967. 240 pĝ.
GOLDEN, Bernard. La sûahila lingvo kaj Esperanto – komparo kaj kontrasto. Sennacieca Revuo. 1983; 111:12-21.
GOLDEN, Bernard. Horatio Hale kaj la Oregon Trade Language. Planlingvistiko. 1985 aŭtuno; 4 (15):19-20 kaj vintro; 4 (16):16-17.
HYMES, Dell (red.). Pidginization and creolization of languages. Cambridge: University Press; 1971. 530 pĝ.
KALOCSAY, Kálmán. Lingvo, stilo, formo. Studoj. Budapest: Literatura Mondo; 1931. Fotorepreso: Oosaka: Librejo Pirato; 1963. 142 pĝ.
LINDSTEDT, Jouko. Esperanto – kontraŭlingvo? Planlingvistiko. 1982 vintro; 1 (4):1-5.
MONNEROT-DUMAINE, M. Précis d' interlinguistique générale et spéciale. Paris: Librairie Maloine; 1960. 208 pĝ.
MORALDA, Pierre. Langue Universelle Sabir. Gap (Francio): Imprimerie Louis Jean; 1932. 137 pĝ.
MULDERS, E.N. Aruba: miniatura babelo en Kariba maro. Esperanto. 1971 marto; 64 (3 [784]):46-49.
PHILIPPE, Benoit. Kreolsprache und Plansprache. Konfrontative Darstellung von Gemeinsamkeiten zwischen den französischen Kreolsprachen und Esperanto. 1985. (Multobligita seminaria laboraĵo en la Fakultato pri Lingvistiko de la Universitato de Konstanco.) 24 pĝ. Konciza resumo en: Informilo por Interlingvistoj. 1985 aŭgusto: 7:11.
RÉGULO PÉREZ Juan. Esperanto kaj Papiamento: la plej simplaj gramatikoj. Heroldo de Esperanto. 1987;28 februaro; 63 (3 [1774]):1,3 + 23 marto; 63 (4-5 [1775-1776]):7.
RÓNAI, Paulo. Der Kampf gegen Babel oder Das Abenteuer der Universalsprachen. München: Ehrenwirth; 1969. 174 pĝ.
SAMARIN, William J. Salient and substantive pidginization. 117-140 en: Dell HYMES (red.). Pidginization and creolization of languages. Cambridge: University Press; 1971. 530 pĝ.
STOJAN, Petro E. Bibliografio de Internacia Lingvo. Genève: Universala Esperanto-Asocio; 1929. fotorepreso: Hildesheim, New York: Georg Olms Verlag; 1973. 560 pĝ.
SZERDAHELYI, István. La Esperanta morfemaro. Esperantologiaj Kajeroj. 1976; 1:61-117.
SZERDAHELYI, István. Bábeltől a világnyelvig (De Babelo ĝis la mondolingvo). Budapest: Gondolat; 1977. 414 pĝ.
SZERDAHELYI, István. Enkonduko en la interlingvistikon. 9-80 en: T. Carlevaro, G. Lobin (red.). Einführung in die Interlinguistik. Alsbach/Bergstrasse: Leuchtturm-Verlag; 1979. 263 pĝ.
SZILÁGYI, Dénes. Versus interlinguistica. Schola et Vita (Milano). 1931; 6:97-120. 163-187 en: R. Haupenthal (red.). Plansprachen. Beiträge zur Interlinguistik. Darmstadt: Wissenschaftliche Buchgesellschaft; 1976. 365 pĝ.
VERLOREN VAN THEMAAT, W.A. On the causes of the disagreements in interlinguistics. Zeitschrift für Phonetik, Sprachwissenschaft und Kommunikationsforschung. 1987; 40:693-704.
VERSTEEGH, Kees. Piĝiniĝado, kreoliĝado kaj Esperanto. Hungara Vivo. 1984; 24 (4 [116]):127-129.
WAINSCOTT, Elisabeth. Uni. The New International Language. Cleveland (Usono): Uniline Co.; 1974. 345 pĝ.
WOOD, Richard E. Sudameriko – ĉu „kontinento sen lingvoproblemoj "? Heroldo de Esperanto. 1974: 16 oktobro; 50 (14 [1567]):3.

12. Glosoj de vortoj ne klarigitaj en la teksto

futurologio – esploro de la estonteco; scienco okupiĝanta pri la hipoteza eksterpolado de situacioj atendeblaj en la estonteco.
futurologo – persono, okupanta sin pri la scienco de esplorado de la estonteco, t.e. la futurologio.
Levanto – la orienta parto de Mediteraneo kun siaj insuloj kaj najbaraj landoj.
levantano – loĝanto de Levanto.
marĝena (sociologio) – karakterizita per posedo de kutimoj kaj valoroj de du diversaj kulturoj kaj per nekompleta asimiliĝo en unu al la alia.



Desegnaĵo de Tibor Jedlinszky



MIKAELO TERNAVSKI

SEP

1

polv' de voj;... arbusto de sumako
iras mi ĉar vokas min vojaĝo
ignorataj laco kaj eĉ aĝo
kaj portata gaje dorsosako
min atendas fore pajla stako-
atributo de l'kampar-pejzaĝo
friska vento blovas al vizaĝo
kredu – mi ne pensas pri bivako
en mi restas la juneca mondo
montosupro... luno kaj rotondo
Marto... la unuaj rendevuoj...
mi ne faras al la sort' riproĉojn
vere kun dolor' mi aŭdas voĉojn
de belegaj forflugantaj gruoj

2

Multfoje mi aperis sur la Ter'.
Ekzemple jen en korpo de boao,
sed rampi ĝenis – tio estas ver'
do kuris mi en korpo de damao.
Ĝis nun delfenojn mi adoras. Ĉar
min distris bela korpo de delfeno.
Mi ludis kun naĝantoj en la mar'
kaj ŝipojn akompanis al haveno.
Enviis mi al homo. Li ja lerte
boaton povas fari. Nu kaj certe
tre bone kanti apud sia dom'.
Rezonas mi sidante en pergolo.
Ja mi feliĉas nun – laŭ mia volo, -
mi estas en la korpo de la hom'.

3

Iam diris ĉarma sorĉistin'
ke laŭ signoj de kiromancio
sinmortigos mi. Ho mia Dio
kore dankas mi pro la destin'.
Timis mi ke ie en ravin'
aŭ do vojaĝante tra Svedio –
mortos mi subite. Kara Dio,
la ulino trankviligis min.
Nun mi certe iras al la cel'.
Gaje flugas super mi vanel'.
Pravas vi, decido bonas via.
Mi naskiĝis sen konsento mia.
Tamen do mi mortos ĉe kondiĉo,
kiam mem deziros. Ho, feliĉo.

4

jen signoj kovras la granitan platon -
mesaĝo de antikva antaŭulo
ĉu li transdonis al ni sian staton
konsilon sian sencon de postulo
ĉu volis li malkovri al ni faton?
la signojn mi esploras kun skrupulo
ja li trairis jam ĉi tiun straton
kaj tutan veron sciis li – saĝulo
ne kompreneblas la enigmaj signoj
ĉu estas ili ĝojo aŭ rezigno
aŭ dolorego ĉe la vort' adiaŭ
ĉu bezonatas al ni lia sperto?
ĉu eble estas tie eĉ averto?
ho! kiel al ni helpus ĝi hodiaŭ!

5

mi vizitiis – flamas sunsubiro
kaj subite en ĉiela spac'
klare mi ekvidis kun admiro
kvazaŭ Dio staras ĉe palac'
mi ja estis meze de foiro...
kvazaŭ laca kvazaŭ sen aŭdac'
kun klinita kapo iris viro
preter mi tra tuta brua plac'
mi ekvolis tuj el-igi krion
por ke la iranto aŭdu min
por ke ankaŭ li ekvidu Dion
kaj mi kriis laŭte kaj kun miro:
Sankta Dio – mi ja vidas Vin
sed ne levis kapon tiu viro

6

MONOLOGO DE ANAĤARSIS

Revenis mi Skitujon. Kun dolor'
mi ree vidas kiel barba skito
preparas glavon – ja laŭ nia mort'
aspergos ĝin la sango de kaptito
ĉi-loke regis gajo kaj admir'
nur mi despere staras ĉe karpeno
kaj la anim' kaptita de sopir'
deziras tuj reflugi al Ateno
ĉagrenas min la stepo la ravin'
eĉ la jubila son' de tamburin'
ne plaĉas al mi la sovaĝa rito
ne ĝojas min la luksa venk-festen'
suferas mi ĉar jes mi estas skito
sed havas mi la menson de helen'

7

kaj interkisis ni ĉe akacio
mirindaj estis floroj en ravin'
jam proksimiĝas trajno al stacio
vojaĝo proksimiĝas al la fin'
anoncis mi kun ĝoja emocio
pri via bel' kaj belo de foin'
kaj sekve – ĉion sen apelacio
plenumis mi – (saĝanta paladin') –
mi havis dian voĉon en la sin'
obstine diris veron al socio
sed certe je ne multaj aŭdis min
mi tamen kreis kvankam sen sankcio
trankvile iras mi al mia fin'
ho kiel estis floroj en ravin'

ANAĤARSIS skita saĝulo kaj poeto,
6 jarcentoj antaŭ Kristo

Sándor György: Moderna mitologio

Konkurso por verkado de originalaj romanoj

La Eldonejo de Hungara Esperanto-Asocio anoncas konkurson por verkado de originala Esperanta romano. La konkurson rajtas partopreni ĉiu esprantisto el ajna lando, per romano ankoraŭ ne publikigita. Limdato por la alsendo de la konkursaĵoj estas la *31-a de decembro 1990.* Adreso: *Eldonejo de HEA, H-1368 Budapest-5, Pf. 193.*

Principe estos aljuĝitaj du premioj. La gajninto de la unua premio, nomata *„Premio Hungario"* gajnos *minimume 100.000 hungarajn forintojn* plus ties kunmetitajn interezojn inter la 1-a de marto 1989 kaj la 31-a de julio 1991. La gajninto de la dua premio, nomata *„Premio Budapeŝto"* ricevos minimume 50.000 hungarajn forintojn, plus ĝiajn kunmetitajn interezojn inter la supre nomitaj datoj. Dume oni instigos hungarajn instancojn kaj entreprenojn kontribui al la bazaj premiaj sumoj, kiujn ofertas la Eldonejo de Hungara Esperanto–Asocio, deponante 150.000 forintojn en banko la 1-an de marto 1989. Pri la eventualaj entreprenaj kontribuoj ni raportos daŭre sur la paĝoj de Hungara Vivo. (Por ioma orientiĝo: 100.000 forintoj egalas nun al ĉ. 4000 guldenoj, ĉ. 45.000 ĉeĥoslovakaj kronoj, ĉ. 14.300 GDR-markoj, ĉ. 5960 bulgaraj levoj, ĉ. 5650 sovetiaj rubloj. La premio estos pagebla principe nur en hungaraj forintoj, kiuj estas utiligeblaj nur en Hungario. Se la gajnintoj estos civitanoj de GDR, Ĉeĥoslovakio, Pollando, Sovetio aŭ Bulgario, ili rajtos ricevi la premion laŭ sia elekto ĉu en forintoj, ĉu en sialanda valuto.)

La konkursaĵoj surhavu nur kaŝnomon, la veran nomon kaj adreson oni aldonu en aparta fermita koverto, sur kiu oni skribu la kaŝnomon. La kovertoj estos malfermitaj nur post la definitiviĝo de la decido de la internacia ĵurio, pri kies konsisto informos iu el la sekvaj numeroj de Hungara Vivo.

La konkursaĵoj devas havi la minimuman amplekson de 340.000 literspacoj (ĉ. 55-60 mil vortoj), maksimuma longeco ne estas difinita. La temo estas libera, sed ĝi ne povas esti kontraŭa al la bazaj humanismaj principoj. Unu persono rajtas konkursi per pluraj verkoj, kaj li/ŝi rajtas uzi malsamajn kaŝnomoj por la opaj konkursaĵoj. Principe oni ne ekskludas la eblon, ke ambaŭ premiojn gajnu la sama persono per du verkoj.

La verkoj devas sekvi esence la norman lingvouzon de Esperanto, la vortprovizo laŭeble restu en la kadroj de PIV kaj ĝia suplemento, krom en kazoj kiam semantikaj kialoj aŭ artaj celoj necesigas aplikadon de neologismoj aŭ de nenormaj lingvaj formoj. Vortoj ne troveblaj en PIV kaj ĝia suplemento devas esti glositaj.

La konkursaĵoj devas esti tajpitaj kun duobla interlinia spaco, tiel, ke sur paĝo de formato A/4 (formato de Hungara Vivo) troviĝu 28-32 linioj, en unu linio ĉ. 60 literspacoj. La supersignoj devas aperi en sia ĝusta formo, eventuale mane aldonitaj sur ĉiuj tri kopioj.

La proklamo de la premioj okazos dum la 76-a Universala Kongreso, somere de 1991. La gajnintoj laŭeble pli frue ricevos skriban informon.

La konkursantoj konsciu, ke la kopirajto de la premiitaj verkoj – por esperantlingvaj kaj hungarlingvaj eldonoj – aŭtomate kaj sen aparta pago iros al la Eldonejo de HEA por 6 jaroj. Dum tiu periodo HEA rajtas plurfoje aperigi la premiitajn verkojn en eldonkvanto laŭplaĉa. Tamen ĝi perdos tiun rajton, se dum du jaroj post la proklamo de la premioj ĝi ne eldonos la koncernajn verkojn. Tiukaze – kaj post 6 jaroj ĉiukaze – la kopirajto reiros aŭtomate al la aŭtoro.

La Eldonejo de HEA havos opcion ankaŭ por la aperigo de la ne premiitaj konkursaĵoj dum du jaroj, kontraŭ la honorario de 30.000 forintoj. La Eldonejo de HEA maksimume tri monatojn post la proklamo de la premioj devos decidi, ĉu ĝi deziras uzi tiun ĉi opcion. Se la decido estos nea, la aŭtoro rerivos ĉiun rajton pri sia verko; se ĝi estos jesa, la Eldonejo de HEA – kontraŭ la pago de la supre nomita honorario – ekposedos la kopirajton por du jaroj, por esperantlingvaj kaj hungarlingvaj eldonoj.

Vekiĝu pli agrable per

La laŭta vekhorloĝo
kaj aliaj atentokaptiloj

Ĉu vi iam scivolis, kiel oni konstruis la unuan vekhorloĝon? Ne, ankaŭ mi ne. Tamen, se ni vekis vian scivolemon pri tiu fascina ĉapitro en la homa historio, revojaĝu kun ni milionon cent kaj du jarojn en la pasintecon kaj renkontu la junan, entrepreneman sed dormeman heroon Ron kaj la maljunan saĝulon kaj prognozulon Oskar. Miru, kiel ili inventis fajron, konsterniĝu, kiom malfacile ili elpensis kalkuladon, dividu kun ili la aventurojn malkovri la unuajn kafo-fabojn, miru, kiel ili kombinis ĉiujn el tiuj eltrovaĵoj en miraklan maŝinon, la kafvek-horloĝon.

Vi trovos tiujn aventurojn de s-roj Kanto kaj Aktera kaj aliaj en la nove aperinta libro *La laŭta vekhorloĝo – kaj aliaj atentokaptiloj*, kie ili formas la duan el kvar humuraj rakontoj.

Eble kelkaj rekonos la unuan parton de la titolo "La laŭta vekhorloĝo". Tiu amuza rakonto de la plumo (pli ĝuste, de la skribmaŝino) de Stefan MacGill estis eldonita en Nederlando en 1976, sed post du eldonoj, delonge elĉerpiĝis. Sed nun, post iom da reverkado, ĝi estas denove akirebla, kiel la unua rakonto de ĉi tiu nova verko.

Intertempe la aŭtoro ŝanĝis sian plumon en komputilon, kiu igis la verkadon de tri pliaj rakontoj nur proksimume okoble pli malfacila, nervostreĉa, riskoplena kaj harelŝiriga ol antaŭe. Tamen, super tiuj obstakloj la nun iom malpli harhava aŭtoro triumfis por enmanigi al vi ducent-paĝan libron kun entute kvar rakontoj.

"Ĉe tunelo, ĉe valo" nomiĝas la tria. Renkontiĝu kun la plej senespera kaj danĝera ŝipanaro kiu iam ajn minacis la havenojn de la mondo kaj kompatu la konsolendan kajon 24, kiu komplete kolapsis kiam kriz-katastrofe kaj konsterne senkapable skipita ŝipo kraŝis kulmine kontraŭ la senkulpan kajo-flankon.

La lasta rakonto nomiĝas simple "La heroo". El kio konsistas lia braveco? Kiom reala ĝi estas? Kiom da medaloj li ricevos? Nu, tion vi devos konstati el la libro mem.

Tiuj kvar rakontoj okupas ĉirkaŭ duonon de la libro, kiu fakte celas unuavice esti didaktika legolibro por progresantoj. La originala rakonto "La laŭta vekhorloĝo" estas relative simpla, kun ĉ. 300 radikoj. La dua "La unua vekhorloĝo" bezonas ĉ. mil. La tria kaj kvara bezonas ĉ. 1500, sed ne ĉiuj la samaj 1500! Fine de la libro staras plena vortlisto, aranĝita en kvar kategorioj: substantivoj, adjektivoj, verboj kaj ceteraj. Por la du lastaj rakontoj la vortoj havas aldone esperantlingvajn difinojn. Antaŭ la vortlistoj aperas notoj por instruistoj; la materialo estas unuavice celita por aktiva grupa uzo sub la gvido de instruisto. Tamen, tio ne malhelpas ĝian uzon en grupoj sen instruistoj, por mem-studado aŭ eĉ por plezura legado sen didaktika engaĝiĝo.

En grupa uzo, la emfazo estas je aktivigo kaj precipe paroligo de la legantoj. La libro baziĝas sur modernaj komunik-situaciaj principoj. Pri ĉiu rakonto figuras demandoj pri la rakonto, kaj krome demandoj pri la vivoj de la legantoj mem, ligitaj al la temoj de la rakontoj. Tiuj temoj estas ofte esprimitaj verbe, ne substantive, por ke la diskutado estu kiel eble plej dinamika. Sekvas gramatikaj kaj leksikaj ekzercoj, pluraj kun kaŝfrazoj. Jen io unika pri la libro: al deko da tiuj ekzercoj ni ne donas la respondojn en la libro mem, sed ni invitas legantojn solvi la ekzercojn, malkovri la kaŝfrazojn kaj ensendi ilin. Komence de 1990 la aŭtoro lotumos libropremiojn el inter la ĝustaj respondoj alvenintaj al la eldonejo el ĉiuj mondpartoj. Vere, aktiviga libro.

Krome troviĝas krucvortenigmoj, unu tabul-ludo kaj ok rol-ludoj, po du por ĉiu rakonto. Tiuj estas spontanaj sentekstaj teatraĵetoj, kiujn legantoj devas krei laŭ donitaj instrukcioj. Por ĉiu rakonto estas unu simpla ludo (por nur du aŭ tri roluloj) kaj unu iom pli ampleksa, por tri ĝis kvin roluloj. La instrukcioj por la roloj estas dismetitaj tra la libro, por ke ĉiu rolulo sciu nur la propran rolon.

La tuto estas agrable ilustrita de Pavel Rak, profesia ĉeĥa desegnisto, kaj havas koloran kovrilon.



La laŭta vekhorloĝo – kaj aliaj atentokaptiloj, Stefan MacGill (1948 -). Hungara Esperanto-Asocio, Budapeŝto, 1988. 200p. 21cm. Ilus. de Pavel Rak. Aktiviga legolibro por progresantoj kun kvar rakontoj, ekzercoj, demandoj, rolludoj, notoj por instruistoj kaj vortlistoj. Prezo en Hungario: 90 forintoj. Prezo ĉe KCE: SFR 15,3O. Prezo ĉe UEA: 21,00 gld

RECENZOJ

Kalvario de junulo

Blazio Vaha: Adolesko. Romano. Eldonis: Oy Mendoservo Ak (Finnlando) kaj Hungara Esperanto-Asocio, Budapest 1987. 21 cm, 248 p. Prezo: 18,- ned. gld. (Por Hungario: 80,- forintoj.)



„...mi aŭdis s-ron A.C. Ward, tre fama literatura kritikisto, paroli pri la emo de la moderna romano iĝi ĉiam pli proksima al aŭtobiografio. Li klarigis la aferon parte per la forpaso de religia kredo, kiu forpaso devigas la senteman animon serĉi publikan konfesvojon, ekzameni sin en publika formo literatura. Al mi ŝajnas, ke li tre trafas."

Adolesko de Blazio Vaha memorigis min pri tiu ĉi ero en El la notlibro de praktika esperantisto (1934) de K.R.C. Sturmer. Egale kion ni pensu pri la ideo de Ward/Sturmer; pri Adolesko ĝi trafas. Temas pri vivhistorio de Jozefo, nun 25-jara apostato de katolikismo, kun priskriba familia nomo: Spertozza. Sed ne temas pri kutima biografia rakonto kiom pri vasta, eĉ ĥaosa materialo por kvazaŭ verkota biografio: mallongaj epizodoj, sonĝoj, filozofumoj, taglibraĵoj, leteroj, poemoj. Registriĝas ĉiaj eroj el la vivo de Jozefo, kvazaŭ laŭ principo, ke io, nun ŝajne bagatela, eble iam montriĝos grava kaj utila. Post iu tia ero staras simple: „Ĉion ĉi mi konsideris nepre direnda."

En la unua kaj tria partoj de la verko Jozefo mem prezentas la materialon, tien reen memorvagante tra sia vivo laŭ la stiro de libera asociiĝo – prave la eldoninto notas, ke kun tiu metodo Vaha pioniras en la Esperanta literaturo. La mezan parton „aŭtoras" Otmaro, amiko kaj eksa samklasano de Jozefo, surbaze de indikoj liveritaj de tiu ĉi. Jozefo aperas do kiel kaj mi kaj li, ĉar kiel li klarigas al Otmaro: „...la leganto ne povas imagi heroon, prezentatan nur deinterne; ke nepre estas necese vidi lin kvazaŭ el ekstera vidpunkto."

Malgraŭ la titolo, la granda temo de la libro ne estas tiom kresko de infano en adoleskulon kiom unu flanko de tiu kresko: perdo de religia kredo. Tiel do ekz. seksaj ek-spertoj restas periferiaj, male al alia romano pri adolesko, „Fianĉo de l' sorto" de Rosbach, kies heroon obsedas sekso, dum Jozefon plene obsedas lukto kun religio. Mi ne scias, kiom la romano de Vaha ĉerpas el lia propra vivovojo. Ŝajnas, ke multe. Nu, Otmaro diras: „...tute ne gravas, se la heroo, fariĝonta per mia rakonto, fine tute diferencos de li; li ja celas prezenti ne sin, sed tipon, tipan situacion..."

Ne nur pri tekniko Vaha pioniras. En Jozefo de Adolesko unuafoje en nia literaturo aperas infano-junulo, kiu estas aŭtenta homo kun sentoj kaj emocioj, kun „interna pejzaĝo". Infanoj kaj gejunuloj ĉefrolis jam en la 30-aj jaroj en la Torento-libroj de Engholm, Auli de Adamson kaj Vartejoj de Barthelmess. Pri ili ĉiuj tamen validas la kritiko, kiun Tárkony celis al Engholm: „La figuroj ne havas sian propran evoluon, ili estas pupoj..."

Jozefo vivas en socialisma Miloĝio, kies geografio kaj historio post la „Kvinjara Milito" apenaŭ vualas Hungarion. Hejme li sorbas fortan kredon je dio. Li regule frekventas meson, kuras al konfesprenanto post plej eta peko, vera aŭ imaga, vizitas eklezian gimnazion kaj revas pastriĝi. Sed la ĉirkaŭa socio malamikas al religio; ateisma ideologio sin trudas de ĉiu direkto, forte kaj krude. Tia estas la ekzistadisma situacio de Jozefo, se paroli Sartre-e. Lin torturas superforta dilemo: socialismo estas la plej justa socio sed rifuzas religion. Li ekdubas pri la ekzisto de dio kaj samtempe plektas pensotufojn penante akordigi sian di-kredon kaj socialismon. En desperaj rezonadoj la knabo brile perdiĝas: „...mi devas pripensi ĉion serioze, ĉar se tute hazarde tamen ne ekzistus Dio, tiam mi eble estas reakciulo, mi efikas kontraŭ la progreso de la mondo, malhelpas, do ne konvene amas, ne amas homojn, do mi kulpas, pekas, ofendas Kriston."

Jozefo luktas por memstariĝo disde katenoj, per kiuj ligas lin religio, socio, aliaj homoj: „Mi dezirus jam finfine decidi pri miaj agoj." Liaj pripensoj randas frenezigon kaj tiun kirliĝon de lia animo Vaha scias vere intense vortigi. La finan apostatiĝon de Jozefo influas eĉ La infana raso de Auld – li estas esperantisto kaj krome okupiĝas pri iu stranga interlingvido.

Sed... la apostatiĝo de Jozefo estas nur relativa. Kiel diras Otmaro: „...li povas esti nekredanto, sed neniam li povos fariĝi nekredinto; li ne povos esti tute egala al homo, kiu neniam kredis." Ne eblas plene rompi kun sia pasinteco, ĉar ĝiaj spuroj restas.

Adolesko estas riĉa minejo por interesiĝantoj pri filozofio, religio, psikologio, edukado. Sed plej feliĉaj estas, kiuj ne devas skribi recenzon pri ĝi, ĉar por ili estas la prefaca konsilo: „...ne legu tro strečante vian atenton." Ilian ĝuon mi envias.

Osmo Buller
(Finnlando)

„Tridekamerono" en Piĉ-a lingvaĵo

Karolo Piĉ: Klaĉejo. Romano kun antaŭparolo de Henri Baupierre. Artur E. Iltis Saarbrücken 1987. 188 p. Prezo: 52,- gld.

„De mortuis nil nisi bonum": pri mortintoj nenion krom bonan, avertas klasika citaĵo. Kaj Piĉ estas morta, se kredi plurflankajn klaĉojn, kiujn mi aŭdis. Nenia oficiala sciigo ĝis la verktempo de mia recenzo: eble li ridos legante ĝin, eble li ankoraŭ loĝas en sia klaĉejo, nok ne en la Litomišla tombejo. (Certe li ridos. Almenaŭ laŭ pli novaj klaĉoj, kiuj asertas, ke li edziĝis, kaj alprenis la nomon de sia edzino. Finfine la du klaĉoj ne kontraŭdiras, ja ankaŭ edziĝo estas speco de morto... La Red.)

Mi esperas tion, kaj dume mi relegas ĉapitrojn de lia tria romano kun malkontento. Tiu malkontento povus fonti el la scio, ke jenas romano, kiun denove legos nur „elito" de la esperantistaro, ne nur ĉar meza verdulo frapfermos ĝin post kelkaj paĝoj pro nekompreno kaj kondamnos ĝiajn neologismojn senscie, kun elviscera repuŝemo, sed ĉefe ĉar la legemaj amasoj plejparte simple ne povos akiri ĝin pro la pipre-paprike-provoka prezego, kiu egalas ekzemple kvinonon de hungara meza monatsalajro. Konjekteblas do, ke apenaŭ iu, kiu legas tiujn ĉi liniojn, – almenaŭ en nepagipovujo –, jam konas la romanon. Mi resumu la agadon, respektive la klaĉadon:

Loko: ree Litomišlo, sed ĉi-foje kaduka ludomo kun tiuj tipe centr-eŭropaj galerioj, kiuj trudas al la loĝantoj trokomunan vivmanieron sen izolebla privateco. Tempo: recenzanto ne scias. Fakte povus esti la nuno, se sur p. 77. ne temus eksplicite pri „bieno", „bienestro" kaj „sinjoroj el la urbo". (Ĉu konkludi el tio intencitan sentempecon? Nedubeble, Klaĉejo pritemas homajn eternaĵojn, ĉefe seksrilatojn, dibočemon kaj morton, kun nur akcesore kulisaj civilizaĵoj en la fono.)

Personoj: ĉiuj domanoj, nomeblaj ankaŭ – laŭ la romana slango – „barakanoj". Okazaĵoj: pri ĉio ni sciiĝas el tridek sinsekvaj klaĉadoj, kiuj konsistigas la ĉapitrojn. La eventoj priklačitaj, kiel atendite, rilatas ĉefe amoradojn, ge- kaj solumadojn, malofte ankaŭ amojn. La ĉapitroj rakontas plejparte memstarajn historiojn (mi povus tial rekomendi subtitolon „Tridekamerono"), kiujn kunigas la sameco de la personoj kaj ĉefe de la medio: de la melankolie morneta ludomo. (Pič entreprenis taskon similan, kvankam proporcie pli modestan, al tiu de Hugo, en kies „Pariza Notre-Dame" la protagonisto estas la konstruaĵo mem. kaj epizodoj tamen vastiĝas al pluraj ĉapitroj, aŭ ĉar ilia amplekso bezonas tion, (XXI-XXII. Putino – Profundalo), aŭ ĉar ili fadene trasinuas la libron por doni al ĝi pli fortikan koheron (la vipado de Novakino, ŝia foriro kaj reveno al la edzo; la amo, kondukonta al nupto, de Irena kaj la studento; la evoluo de la stranga rilato inter la verkisto, Benešino kaj ties filino; ktp.). La strukturo de la romano, krom cikla, ankaŭ estas cirkla: ebriuloj de la unua ĉapitro revenas samhore en la dudekkvara; pri Novakino temas ĝuste la tria kaj dudeksepa ĉapitroj (plus) la dektria); entute do, la libro refermiĝas tie(l), kie(l) ĝi komenciĝis: foririntoj revenas, la loĝejon de mortintoj okupas novalvenintoj, eksgeamantoj cedas al geedziĝo. Vivo ŝatas ordon. Por Pič la tempo certe ne estas rekta linio kondukanta ien; etapoj ne superas, nur sekvas unu la alian. Šanĝoj povas okazi, sed ili ne aliigas esence la eterne ĉiamsaman eston: eble „Orfi forigos la lualon.. Oni destruos la klaĉejon", sed „...tio min ne timigas! (...) ni ankoraŭ ne estas tiom lacaj kaj maljunaj por ne rekomenci por ne saluti la Vivon..."

Kial do mi malkontentas pri tiu ŝajne bone konstruita romano? Vunda punkto de pluraj elstaraj romanoj originalaj – „Kiel akvo de l' rivero", „Adolesko", iom eč „La Litomišla tombejo" – estas ĝuste struktura mankoj.) Unue ĉar la kohero estas nur surfaca: la epizdoj estas lerte kunkomponitaj, sed ili mem foje ŝajnas tro eventualaj. La rolantojn Pič manipulas kiel pupojn por prezenti enscenejigon de siaj anekdotoj. Ni ja kredas, ke „ĉiuj ĉapitroj de la KLAĈEJO efektive okazis" (Postparole), sed ne, ke ĉiuj personoj, efektive tiaj, ekzistis. Al ili mankas aŭtenteco. Mi emas konjekti, ke forta egotismo de la verkinto, plej sentebla jam en „La Litomišla tombejo", malhelpis necesan samsentiĝon kun la personoj de la romano. Tiu memcentremo, kiu esprimis sin adekvate en la „Tombejo", kaj ne gravis malhelpe en lia pseŭdo-krimromano „La mortsonorilo de Chamblay", rezultigis partan fiaskon de la tria entrepreno. Post la imagita mondo en „Chamblay" kaj la esence unupersona universo en la „Tombejo", sekvis provo priskribi multpersonan medion: aperis figuroj nur dudimensiaj. (La romanon ankaŭ ne dominas Hugece la ludomo mem.)

Miaj aliaj rezervoj estas stilaj. Pič mem atentigas, ke lia trilogio „iasence estas romanoj pri la lingvo...! Eč KLAĈEJO estas tio! Storio pri Esperanto! Ĉar ankaŭ en KLAĈEJO la čefan rolon ludas ne la barako, ĝia vulgara vivo kaj ĝiaj ordinaraj geloĝantoj, sed ĉefe la konversacioj, kiujn ili disrulas tie, la maniero, laŭ kiu ili uzas kaj aplikas la lingvon, kaj la viglo, kun kiu ili kaptas kaj disvolvas ĝiajn enajn, preskaŭ miraklajn kapablojn kaj latentojn." Se akcepti tiun belan aserton, niaj supraj kritikeroj eč ne justas, ĉar Pič ne celis ĉefe etose ričan socian romanon, sed lingvan eksperimenton. (Pri tio mi dubas, ĝi ŝajnas aposteriora celdifino, limigita de tiu „iasence".) Kiel tio la romano nepre interesas, kaj novecas ankaŭ kompare kun la „Tombejo". Pri la neceso de la unuopaj priglositaĵoj, kies klarigo okupas la paĝojn 175-188 de la libro, diskuto estus longa. Al mi ŝajnas, ke ili povas esti stile validaj nur en certa kunteksto, kaj la kunteksto en „Klaĉejo" malofte konvinkas pri tio, ke nepras uzo de tiu aŭ alia novismo. Por mencii nur du ekzemplojn: strangas, ke la tute ne mortnaskita prefikso „eŭ-" (malo de -aĉ') aperas nur dum amorscenoj, kvazaŭ ĝi estus tiom ligita semantike; la difino de alia proponita prefikso „pa-" tiom nebulas, („pseŭda, neaŭtenta, nekontentiga, falsa, imitanta, nur simila, „eta"), ke mi timas ne ĝuste kompreni la vortojn formitajn per ĝi. Mi akcentu: bezonon de neologismo povas signali konvinke nur kunteksto; kunteksto tia, kiu ne okupiĝas taŭtologie pri si mem, sed pri la realo. Tiusence la teorio kaj verkopraktiko de Pič formas magian cirklon: la unuan ĝi pravigas per la dua, la duan li kreas por ilustri la unuan.

Varian stilon necesigus ekzemple, ke li paroligas grandnombran rolantaron. Tamen estas certe, ke la leganto ne rekonus ilin laŭ ilia stilo; li perceptas nur tiun unuforme vulgaran lingvaĵon, kiun Pič elkreis por la uzo de ne-ekzistanta Esperanta ludomo. Pro tio la personoj dudimensiiĝas ankaŭ psikologie. Ili ankaŭ ofte forgesas, ke ili estas ne la verkisto, kaj anstataŭ dialogi (ili) prelegas dum paĝoj (ekz. 159-163.). Ĉu estas verŝajne, ke Jernekino konas „Aŭgian stalon"? (p.163.)

Legintoj de ĉi recenzo tamen nepre pluklaĉu al siaj konatoj, ĉefe al monhavaj, ke aperis „Klaĉejo", multmanka, sed grava nova (ĉu lasta?) romano de Pič. Poste ili prenu ĝin prunte.

Glosoj:
egotismo: analizemo de la propra personeco če verkisto (Stendhal)
nok: ankoraŭ (Pič)

István Ertl
(Hungario)

Lerta detektivaĵo

Deck Dorval kaj Christian Decklerk: Kazinski venas tro malfrue. Krim-romano. Serio „Stateto" n-ro 3. 175p. Prezo por Hungario: 450,- forintoj.



Deck Dorval konsistas el 3 personoj: Jef Beeckmans, Jos Deckkers kaj Frans van Dooren (F.V.Dorno), el kiuj la lasta estas la čefa figuro. La nun traktata romano estas ilia verko, kaj kiel lingva revizianto aliĝas al la aŭtoraro Ch. Decklerk.

La vera krim.-romano okupiĝas pri enigmo de murdo. Ankaŭ ĉi-kaze tio veras. Pri Ivo Kazinski, nomata en la titolo, jam legante la unuajn paĝojn, oni ekscias: li havis la intencon mortigi aferiston Johanon Krimp, la ĉantaĝiston. Sed kiam li alvenas, estas „tro malfrue": la viro kušas jam mortinta.

Kaj ĉi tie komenciĝas la esplorado. Ĝin gvidas Ksavero Kant, čefinspektoro de la Antverpena polico, al li helpas lia subulo, Oktavo Dutri (ambaŭ esperantistoj). Eniĝas en la aferojn jurmedicinisto profesoro Jan Grum kaj vilaĝa policano Jano Tonek.

La vico de la suspektatoj estas longa. Če la unua loko staras Ivo Kazinski, la inĝenia inĝeniero, inventisto. Verŝajne la murdito ĉantaĝis lin. Sed povas esti suspektata Filip Doman, kies edzino estis amdonantino de Krimp, same lia edzino,

Liliana mem, kiu ĵaluzis pri la mortinto. Oni povas suspekti ankaŭ pri sinjoro Odilon Horst, patro de la nomita damo, kiu viro restis en amikeco kun Doman, la forlasita edzo. Oni aligas al tiu ĉi nomaro Irenan Lens, sekretariinon de Kazinski, nevinon de Krimp, estintan en malbona rilato kun la onklo. Same havis motivojn por la murdo ankaŭ alia virino, Gilda Ronse, iama amorantino de Johano Krimp. Ne eblas tute ekskludi suspekton pri Arturo Kazinski, la filo de Ivo, enamiĝinta al Irena. Sed kiu scias, eble Maria Kojn, la domzorgantino mortigis sian mastron.

Ĉi tie komenciĝas la spurado. De ĉapitro al ĉapitro malkovriĝas novaj faktoj, solviĝas la enigmoj, ĝis en la lastaj paĝoj de la romano la leganto komprenas ĉion, kompreneble, ne sen surprizoj.

Ĉar temas pri romano originale verkita en Esperanto, oni devas paroli iom pri la lingvaĵo, stilo de tiu ĉi verko. Mi ne volas aprobi, nek kritiki la vortuzadon de la verko. Ĉe-fine de la libro la leganto trovas „Glosoj"-n. Temas pri listeto de vortoj, nekonataj por la ĝenerala esperantlingvano. Ĉe pluraj oni trovas indikon pri la fonto PV, PIV, PG (Parnasa Gvidlibro), LT (Litomiŝla Tombejo), ES (Elpafu la Sagon), NG (Neologisma Glosaro), Z (Zamenhof).

Estus superflue rekomenci la minimume duonjarcenta disputon (eĉ kverelon) pri la t.n. neologismoj. Kiu povas enradikiĝi, al tiu bonvenon en nia vortaro, kiu ne, tiu sen ia ajn helpo formortos.

Alia afero estas la gramatikaj malkorektaĵoj. Ekzemple „Dutri elbabilis pri am-afero, kiu finis (anst. finiĝis) malbone." (p.154.) „Li iris en la armeo (anst. armeon) kaj iĝis oficiro." (sampaĝe) Kial vi enigas tiom da personoj diversaj en l' afero (anst. aferon) (p.121.) Bonan tagon, la Sinjorojn!" (anst. al la Sinjoroj) (p.117.) Grum retiris sin en sia konko (anst. en sian konkon). (p.81.)

Mi pensas, ĉiu el la bone parolantaj esperantistoj subtenas mian opinion, nome: similaj eraroj en Esperantlingva libro ne rajtas esti. Sola konsolo, ke ili ne estas tro multaj. Do, la ŝatantojn de enigmotipa detektivromano tiuj riproĉoj ne devas forpeli de la libro. Legu kaj amuziĝu!

P.A. Rados
(Hungario)

Pli ol nura krimromano

Serĝo Elgo. Ŝia lasta poŝtkarto. Romano. Eldonis Kooperativo de Literatura Foiro, Chaux-de-Fonds, Svislando, 1988. 225 p. Prezo por Hungario: 290,- forintoj.

La verko, apartenanta al la ĝenro „psikologia krimromano" rakontas historion el iu fantazia lando de Eŭropo. La spino de la agado: el Pontonovo malaperas Izabela, filino de Roberto Hanĉo, la plej riĉa burĝo de la regiono. Tuj komenciĝas la esplorado. Du detektivoj ekzamenas la spurojn: Waddi,

la arabdevena, iom senfantazia strebulo kaj inspektoro Kramer kun brilegaj kapabloj pri psikologio.

La serĉado eliras el la faktoj, ke la junulino alvenis al la avino per la vespera trajno, iom kuŝis sur sia lito, poste foriris. De la vojo ŝi sendis poŝtkarton por la patrino, kaj malaperis.

La unua suspektato estas Teo, ofta vizitanto de la loka diskoteko. La bela junulo asertas: li estis kune kaj amoris kun Izabela post ŝia foriro de la avina domo.

La dua suspektato estas pentristo, Paŭlo Zilberŝtajn, kiu pro sia juda deveno, alkoholismo, tro moderna stilo de la bildoj estas malŝatata de la patrino de Izabela.

Dum la esplorado Kramer enketas la familianojn de Izabela Hanĉo, ŝiajn instruistinojn kaj samklasanojn el la gimnazio. Li legas eĉ ŝian taglibron kun la plej intimaj pensoj kaj notoj pri amrenkontoj kun amorado. La policisto kaj kune kun li la leganto ekkonas la neordinaran, talentan, belan knabinon, kiu plej verŝajne jam mortis. Paralele la romano priskribas la tragedion de la familio Hanĉo, la seniluziiĝon de la patro, la originon de la patrino, la veran devenon de la du gefiloj.

La policistoj vizitas ankaŭ la „marĝenulojn", strangulojn, vivantajn propravole ekster la socio, kiuj estas suspektataj pri forrabo de Izabela. Evidentiĝas, ke Teo, la facilanima knabo ne povis renkontiĝi kun Izabela, ĉar li estis aliloke, kontraŭ Zilberŝtajn mankas la pruvaĵoj. Dume la patro ricevas kun la harbuklo de Izabela leteron, kiu ĉantaĝas lin pri mono, sed la ĉantaĝanto ne alvenas al la indikita loko. Ankaŭ tria viro same aliĝas al la suspektatoj: Marĉelo, la ŝoforo. Oni trovas puloveron de Izabela kaj kadavron de knabino. La gepatroj rekonas en ĝi la filinon. Kaj tiam venas la plej neatenditaj turnoj de la historio...

Okaze de krimromano estus preskaŭ krimo kontraŭ la verko kaj ĉefe kontraŭ legontoj kaj la libroservoj rakonti, kio okazos poste. Anstataŭ tio la recenzanto volas laŭdi la talentan verkon kun interesa agado, la verkiston pro la kapablo per malmulte da vortoj karakterizi la heroojn, la stilon kaj la vortoj karakterizi la heroojn, la stilon kaj la lingvaĵon, kiu estas facile komprenebla, bona Esperanto.

Nur unu rimarkon ĉe la fino. La verkinto de tiu ĉi artikoleto estas kontraŭulo de tiaspecaj novaĵoj, kiel „morgo", anstataŭ „morgaŭo", „soriri" anstataŭ „supreniri" aŭ „ascendi", „sobiri" vic' al „descendi, subiri".

Sed tiuj vortoj tamen eĉ min tute ne ĝenis ĝui la libron, do mi ne volas konvinki Serĝon Elgon por ne uzi ilin. Des pli ne, ĉar mi scias: tiuspecaj strebadoj por „novigi Esperanton" ĉiam estis kaj estos vanaj.

P. A. Rados
(Hungario)

Romano pri la „bona morto"

Nemere, István: Dum vi estis kun ni. Originala romano. Eldonis: Oy Mendoservo Ak kaj Hungara Esperanto-Asocio. 21 cm, 165 p. Prezo: 21,- gld. (Por Hungario: 80,- forintoj.) El Okcidenta Eŭropo oni mendu la libron ĉe Oy Mendoservo Ak, el aliaj mondopartoj ĉe Hungara Esperanto-Asocio.



Laŭ mia memoro ne pasis multaj jaroj (maksimume deko), de kiam mi aperigis en Heroldo kelkajn plačajn noveletojn de iu István Nemere. Post tiam nian libran merkaton eksplode inundis pluraj romanoj de la iom hermita hungara prozisto: ekzakte naŭ ĝis nun (kaj mi scias ke aliaj manuskriptoj kuŝas atende ĉe eldonistoj). Kaj nemalmultaj el tiuj fariĝis furoraj, kelkaj atingis eldonnombrojn malofte spertitajn antaŭe kaj jam ĝuis profitodonajn tradukojn en naciajn lingvojn.

En siaj verkoj Nemere alfrontis plej diversajn temojn: psikologiajn, sociajn, detektivajn, scienfikciajn, politikajn ktp. En multaj romanoj la problemoj interferas: amo-amoro kun sondado de la homa psiko, politikaj kaj sociaj rilatoj inter individuoj kaj instancoj aŭ kolektivoj, paco kaj milito, rasismo kaj re-

volucio, etikaj demandoj ĉiamaj kaj nuntempaj, kaj tiel oble plu.

En la ĉi tie ekzamenata verko ĉeftemo estas la problemo de eŭtanazio.

Al la centra prokurora oficejo en departementa ĉefurbo alvenas anonima letero, sendita el malgranda urbo Somkút. En ĝi estas deklarite, ke iu virino mortigis sian malsanan patrinon. Ĉar Somkút estas la naskiĝurbo de la juna prokuroro Zoltán, tiu petas de sia ĉefo la permeson enketi mem pri la afero.

Ĉar ĉe la librokomenco estas skribite, ke temos pri eŭtanazio, mi iom bedaŭris ke, el tiuj premisoj, estas facile diveni kiel la faktoj disruliĝos. Sed Nemere estas lerta manipulanto de la intrigoj, tiel la kanvaso montriĝis iom pli komplika kaj ne tiom antaŭimagebla. Kaj, memkompreneble, tiujn sekvojn mi ne malkaŝas ĉi tie. Mi nur diros ke, dum sia enketado, la diligenta prokuroro ekscias marĝene pri kelkaj etaj-grandaj misfaroj en la urbeto, pri kazoj de koruptado kaj malversacioj ĉe publikaj funkciuloj kaj senskrupulaj manipulantoj, adultoj kaj ĉiuspecaj miskondutoj, kio memorigis al mi la iaman skandalan romanon La pekoj de Peyton Place kaj rivelas kiel vere nenio novas sub la suno, kaj kiel tiaj gangrenoj ne estas karakterizaĵo nur de tiu aŭ tiu alia lando aŭ mondparto.

La rakonta stilo de nia hungara romanisto estas tia, ke li kaptas la atenton kaj scivolemon de la leganto iom post iom, trenante lin en la implikojn tra tutaj paĝoj de lerta „suspence". Dume la rolantoj observas la ĉirkaŭan mondon, rimarkas kaj priskribas detale la subtilaĵojn de l' naturo kaj sondas la homan animon, rezonadas kaj filozofiumas, pesas okazintaĵojn kaj perspektivojn, tiel ke, ekzemple, ĝis la 22-a paĝo la rakonto neankoraŭ eniris praktikajn faktojn kaj agojn.

Nemere ne estas supraĵa kaj estemporanea rakontisto. Kiam li alfrontas iun temon, li sin preparas adekvate. La kernan temon de ĉi tiu libro li ekzamenas kaj argumentas funde, el vidpunktoj de juro, medicino, religio (katolika) kaj de komunhoma etiko. Sian propran starpunkton li ne malkaŝas, kvankam ĝin oni povas fine indukti.

La rolantoj de la romanoj de Nemere ĝenerale ne tro protagonistas; ili estas normalaj homoj, kiajn oni povas renkonti ĉie en la mondo, kun virtoj kaj kvalitoj, malvirtoj kaj febloj de la ĉiutaguloj. La ĉefrolantino ne similas al Marilyn Monroe aŭ al Madonna, la „li" ne atletas holivude, la detektivo foje eraras, ĉio sume, nenio estas aŭ tute blanka aŭ tute nigra. En ĉi tiu romano nur la patrino de Zoltán aspektas iom perfekte superhoma sed, ĉe la fino, oni malkovras, ke ankaŭ ŝi ...

Apartan atenton meritas la lingvaĵo uzita de nia romanisto. Ĝi estas leksike kaj konstrue esenca, senbalasta sed ĝenerale kristale klara, sen troaj snobaj preciozismoj (li forhuŝis la pensojn, jen trafa esprimo, laŭ mi) kaj, pri kio koncernas neologismojn, se ni esceptas la kursive reliefigitan kamikazeo, li uzas nur jam delonge enradikiĝintajn. Tial finlibra glosaro ne enestas, ĉar nenecesa. Tamen mi ne taksas, ke lia verkstilo estas teda, monotona, sennuanca, plena je ĝenaj ripetitaĵoj, kiel drakone asertas la apostoloj de iu memnomita skolo naturalismema, laŭ kiuj sen adopto de abunda sinonimaro ne eblas krei artliteraturan verkon. Jen, kvankam persone mi lokas min mezvoje inter la pledantoj de pli riĉa kaj nuancoza vortaro kaj la skemisme ĝisostaj fundamentistoj, mi kredas ke ĝuste la verkoj de Nemere (kaj ties disvastiĝanta sukceso ĉe nia leganta publiko) estas la plej evidenta pruvo pri la funda nevalido de la aprioraj postulatoj de tiuj sinonimemuloj.

Fine, se perlupee serĉi mankojn kaj pekojn, nu, mi trovis neglektindajn preserarojn, kelkajn nenecesajn uzojn de la artikolo, iujn forgesojn de la subjunkcio ke, unu gravan eraron pri posesivo (oni akuzis vin, ke vi murdis sian patrinon).

Lasta rimarkigo estas laŭ mi grava: la libro aperas dank' al speciala kontrakto inter Hungara Esperanto-Asocio kaj eldonejo Oy Mendservo AK, en Finnlando, kio inaŭguras certe promesplenan kunlaboron kaj espereble permesos pli vastskalan disvendadon, same en Orienteŭropo kiel en la ceteraj landoj.

Aldo de Giorgi
(Italio)

Ankaŭ la deka romano retenas la nivelon

István Nemere: Vivi estas danĝere. Romano. Eldonis: Hungara Esperanto-Asocio, Budapest, 1988. 21 cm, 159 p. Prezo: 21,- ned.gld. (Por Hungario: 90,- forintoj.)

Pro kaŭzoj de enlanda politiko kaj por ŝmiri Alĝerion en komercaj negocoj, la franca registaro volas urĝe arestigi kaj reportigi al Francio Georges Clever, „Bučiston" de la milito en Alĝerio kaj unu el la komplicoj de la fifama OAS. Aŭ tiel almenaŭ ŝtatprokuroro Gerradi prezentas la aferon al Daniel Skagen, aventuristo kaj eksgvardiano de afrikaj ŝtatestroj. Kontraŭ bela monpremio Gerradi varbas Skagen por kapti la militkrimulon. Skagen kolektas grupon da aventuristoj kaj la ĉasado startas. Post sovaĝa persekutado, en kiu abundas sango kaj kadavroj, la predo falas en kaptiloj, sed liveri lin Parizen kondukas al novaj nervoŝiraj scenoj. Kaj en Parizo tiel Skagen kiel Gerradi trovas sin en kaĉo, tute malsimila al la finalo, kiun ili projektis.

La ĉeesto de militkrimulo en „Vivi estas danĝere" memorigas pri alia romano de Nemere — miaopinie lia plej bona — nome „Sur kampo granita" (1983). Same kiel por ĝi, ankaŭ por tiu ĉi la aŭtoro kaptis ideon el la reala vivo. Georges Clever ja memorigas pri Klaus Barbie, la Bučisto de Lyon, kies proceso antaŭnelonge vekis febran priatenton. Sed temas nur pri komenca ideo, ne pri romanigo de la kazo Barbie. Ankaŭ pri alia skandalo lastatempa ĝi sugestas: la sinkigo de ŝipo de Greenpeace, ĉe kiu la franca sekreta servo same libere konceptis la limon inter leĝo kaj krimo kiel oni tion faras ankaŭ en tiu ĉi libro.

Kvankam „Sur kampo granita" kaj „Vivi estas danĝere" ambaŭ turniĝas ĉirkaŭ eksa militkrimulo, la du libroj funde malsamas. En la pli frua la aŭtoro konfrontis la leganton kun etikaj problemoj, sed nun ne temas pri io tia, kvankam unufoje Skagen preskaŭ enkondukas tion parolante: „Furoras militoj, naskiĝas militkrimuloj. Kelkiuj homoj sub la influo de eventoj, ebloj aŭ simpla devigo fariĝas regantoj super la vivo de aliaj. Kelkiuj tiuokaze fariĝas sangozaj sovaĝbestoj." (p. 99.) Tiu filozofumado tamen ne iras pluen, kaj tio eĉ ne necesas, ĉar ĝi jam estis tiel funde farita en la nokta simpozio de „Sur kampo granita".

En „Vivi estas danĝere" temas sole pri distra legaĵo, strečromano, kiun certe kun granda apetito voras tiuj, kiuj serĉas por tempopasigo aventurojn, en kiuj ĉiumomente okazas io kaj la intrigo impete deruliĝas. Ankaŭ min Nemere — denove — alnajlis per tiu ĉi verko, tiel ke mi devis finlegi ĝin unuside. Tiel brile li fabulas, sed ja li estas la sola Esperanto-aŭtoro, pri kiu eblas diri, en ambaŭ sencoj de la vorto, ke li verkas profesie. Por li verki estas senĝene.

La nuna verko estas jam la deka Esperanto-romano de Nemere. Per ĝi li fariĝis la plej produktinta Esperanto-romanisto, ne nur laŭvolume, sed ankaŭ laŭ la paĝnombro. (Tamen ne. Bulthuis ankoraŭ superas lin je 34 paĝoj. — La Red.)

Tiu jubileo trudas la demandon, kie kaŝiĝas la sekreto de lia granda populareco. Mi supozas, ke ĝuste en la profesieco, t.e. majstrado de la verkista metio. Sed ĝi certe troviĝas ankaŭ en tio, ke en liaj romanoj ni retrovas scenojn, kiujn ni konas el televidaj novaĵoj, kaj ke li problemigas temojn, pri kiuj homoj nuntempe pensas. Tial ankaŭ tiuj el liaj romanoj, kiuj ne estas same pretendaj laŭ la celo kiel ekz. „Sur kampo granita", tamen ne impresas kiel bagatelaj. Kaj certe influas ankaŭ la lingvo: kiel en tiu ĉi verko, la Nemere-a lingvo ĉiam estas simpla, facilflua, senartifike ĉiutaga. Kiel tia ĝi altiras ankaŭ lingve nespertajn. Tiel do Nemere edukas legantojn por nia

beletro entute, sekve plenumante la rolon de la nuna Baghy.

Al la ĉi-foja verko farendas unu lingva piednoto: la vorto „hostaĝo" devas esti „ostaĝo".

Osmo Buller
(Finnlando)

Romano – sen alveno

John Francis: Misio sen alveno. Stafeto, Antverpeno-La Laguna, 1982. 159 p. Prezo: 21,- ned. gld.



Sciencfikciaj verkoj, eĉ romanoj, ne malmultas en nia originala literaturo, de „Saltego trans jarmiloj" de Forge ĝis la febraritme aperantaj libroj de Nemere. Eblus eĉ aserti, ke sciencfikcio estas tia tereno, kie la Esperanto-verkado ne postrestas kvalite la mondan nivelon. Sed kio fakte estas sciencfikcio? Nu, unu el la literaturaj terminoj, kiuj spitas bone konturitan difinon, kaj pri kiuj ni ĉiuj tamen havas bone difinitajn ideojn... Kaj kial ni devis komenci ĉi tiun recenzon per tiel ĝenerala demando? Ĉar unuavide, kaj ankaŭ duavide, ne klaras, ĉu la romano de la renoma kvaropano, por kiu ne fremdas „vakua firmamento", kiu „senvive sin etendas" (La kosmo), estas sciencfikcia aŭ ne.

Kvankam la subtitolo infurmas simple: „Romano verkita en Esperanto", la teksto tuj kreas sciencfikcian etoson per brilaj aŭtomobiloj, stranganomaj rolantoj kaj kosmovastaj perspektivoj. La elira situacio estas asigno de la unua misio al novbakita diplomito de la „Kolegio de Intendantoj", elitlernejo de la plurgalaksia „Unio". Nome li devas helpi progresigi la ekonomion de la fora planedo Soltria (kiun la suspektema leganto tuj identigas kun la Tero, sed, kiel lerta truko de la aŭtoro librofine montras, tio estas iometa eraro) kaj estri tie la „Projekton Spaco", celantan elserĉi novan

loĝeblejon por la kreskanta soltrianaro. Jen do „la misio". Sed kial „sen alveno"? Ni nun alvenis al la punkto, kutima por krim-, aventur- kaj sciencfikciaj romanoj, kiam la recenzanto anstataŭ plua rakonto de la historio, devas konsili al la leganto propran legadon. Mi faras tion tamen kun kelkaj rezervoj.

La romano ne havas ĉefrolanton. Aŭ propradire: ĝi ekhavas lin komence kaj rehavas lin fine (en la persono de la „misiisto"). Li tamen ne sukcesas interesi nin profunde: reprezentanto de pli perfekta socio, li mem tro perfektas. Eĉ liaj amrilatoj kun inoj en diversaj mondoj ne tuŝas nin: dum lia spacveturilo traarkas nenombrite multajn dimensiojn, li restas dudimensia, kiel ĉiuj aliaj figuroj de la romano – krom Ford Kaŭser, la senambicia bonvivanto, kiu fariĝas centra figuro en la mezo de la romano, por poste resinki inter la figurantaron. Bedaŭrinde, ĉar „lia" parto estas la plej bone verkita en la libro. Tiu triono de la verko kiu priskribas intrigojn, klopodojn kaj kontraŭklopodojn inter la ĉefoj de du konkurencaj organizoj en ties monda centro, tute ne ŝvebas en kosmaj distancoj – ĝi karikaturas (ne! prefere mi diru: portretas), trafe, la meandrojn de la „granda politiko" de niaj tempoj, de nia Tero, – en kiu politiko publikaj interesoj ofte servas por maski la proprajn. Kaŭser gajnas nian simpation ĝuste per tio, ke li neniel diferencas de tiu speco de homoj – li tro malperfektas. Krome liaj am-aventuroj estas pli vigle bildigitaj ol tiuj de la „misiisto", intendanto Halman...

Same ĝuindaj paĝoj estas tiuj, kiuj pentras la inferecan ĝangalmondon de esplorata planedo, kie bestoj ŝajnas plantoj kaj plantoj ĉasas bestojn, pluvoj inundas torente kaj ĉiu momento alportas novan danĝeron por la ekspediciantoj: poezio kaj suspenso miksiĝas ĉi tie en ĝustaj dozoj.

Sed: la romano malhavas strukturon. Apartaj blokoj ne sukcesas kunmetiĝi en unuecan tuton. (Ŝajne ofta manko de esperantaj romanoj, validaj ankaŭ por miaj du plej ŝatataj: „Kiel akvo de l' rivero" de Schwartz kaj „Adolesko" de Vaha.) La aŭtoro foje troklarigas aferojn, kiuj ne plu havos gravecon (ekz. pri la „Kolegio de Intendantoj"), surscenejigas kaj malaperigas rolantojn iom kaprice. Ŝajnas eĉ, ke diversaj partoj de la romano kontentigas postulojn de diversaj legantaroj: jen frandaĵo por intrig-amantoj, jen pinĉaĵo da amoro, jen poezieca priskribo, jen ekonomieca listigo...

Nesurprize de fama aŭtoro, lingvaj aŭ stilaj malglataĵoj apenaŭ ie makulas la tekston. Tamenaj eraroj eble ŝuldiĝas al gepatralingva influo: „Ĉu vi ankoraŭ trovis ĝin?" (p.19.) anstataŭ „Ĉu vi jam...?" aperas eble pro mistraduko de „yet"; en dialogo sur p. 139: „ – Mi komprenas)...) – Ne, vi ne (...)" la respondo ŝajnas speguli laŭvorte kaj superflue la anglan „No, you don't". Same, eĉ pli ĝene, sur p. 114: „Halman komprenis lian maltrankvilon: iu iĝonta malfunkcio devis anticipe ripari sin. La fakto ke ĝi ne, ke ĝi rimarkeblis..." Prefere legu: „La fakto, ke ĝi ne riparis sin..." Paŭso de angla „The fact that in didn't..." en Esperanto malhelpas la komprenon. Sur p. 37. legeblas neglosita (ne estas glosoj en la tute ne neologismema romano) „ŝaperono" („ĉeestanto nedezirata de geamantoj"). Sed multe pli da misoj oni ne trovus en la bonstila libro; male, belajn stilerojn jes, kiel la originalaj vortoligoj „rajpa varmego" kaj „maceri la cerbojn" (p. 130.).

Resume: la romanon indas legi pro interesaj kvindek paĝoj (pp. 27-78.) kaj pro suspense belaj tridek (pp. 81-112.). La rampantan komencon kaj la haste kunflikitan finon – prefere forgesu. La misio de John Francis estis kuraĝa entrepreno – sed sen alveno.

István Ertl
(Hungario)



GAJA PAĜO



LARMIGA?

– Hu! Ege min ĝenas tiu damnita polvero – ĵus ĝi falis en mian okulon – ĝemas pilkludisto en la vestejo.
– Provu eklarmi, tio helpos – proponas lia trejnisto.
– Estus ja bone, sed kiel?
– Facilas! Pensu pri via hieraŭa aĉa ludado...

JES, EĈ KOLERIGA

– Mi serioze avertas vin, ke koruptado estas severe punata!
– Ho, kion vi intencas diri per tio?
– Nu tion, ke ni estu singardaj! Mi ne volas atestantojn, kiam vi donas al mi la ŝmirmonon.

IOM SAME

– Feliĉe, venkis la justeco! – informas klienton kun ĝojo lia advokato.
– Terure! Tiam bonvolu apelacii!

MEMKRITIKO

– Kolego, mi aŭdis, ke ĉiuvespere vi restas soleca...
– Lasu min, kolego, ĉar mi ne emas havi interrilatojn.
– Ho, eĉ kun virinoj ne?
– Nu, imagu al vi la strangan inon, al kiu mi plaĉas...

KIA FRAŬLO!

– Edziĝu jam, kara mia filo! En via aĝo mi jam estis edzo.
– Estis facile al vi, paĉjo. Vi edzinigis mian patrinon, sed kiel mi edzinigu fremdan inon?

VIRINOJ NE LEGU TION

ĉar mi en drinkejo aŭdis la jenan filozofiadon:
– La edziĝo similas al loterio – asertis iu drink-frato al la alia.
– Plena eraro! En loterio foje eblas ja gajni...

ANKAŬ TIE

frapis ne-junulinon la kruda ĝentileco:
– Memoru, karulino, ke mi dankas vin pro la granda feliĉo...
– Ĉu vere? Kial?
– Nu simple, ĉar vi neniam estis la mia...

STADIONON FORLASANTE

edzo kaptas la manon de la edzineto. Kun plezura rideto ŝi ekvoĉas:
– Dankon, karulo. Vi ne volas perdi min, ĉu ne, tenante mian manon?
– Tute ne tial. Mi ja ne volas vin longe serĉadi.

BANĈAMBRON FORLASANTE

tute nuda la sinjorino rimarkas, ke ekstere fenestro-purigisto grandokule rigardas ŝin kun admiro. Ŝi haltas, surprizite rigardas la eksteran fremdulon – do la fremdan eksterulon – kiu fine ekdiras:
– Kio? Ĉu vi neniam vidis purigiston?

EBLE ŜIN

demandis la kuracisto: – Ĉu helpis vian farton, sinjorino, la plifortiga kuracilo, kiun mi preskribis al vi?
– Eĉ grandioze, doktoro! Helpe de ĝi mi akiris mirindajn horojn de malforteco...

ĈESU!

– Iru al la ĉambro de nia filino, paĉjo – ordonas la edzino –, kaj rigardu, kion ŝi kaj ŝia amiko faras, kaj diru severe, ke ili tuj ĉesu tion fari!

VIRA AFERO

– Terure sola mi sentas min, amiko!
– Sed vi ja havas edzinon, eĉ ĉarman amikinon!
– Nu jes, tamen mi devas jam akiri iun plaĉan inon...

Ervin *Fenyvesi*

El Gaja Paĝo

ni citas anekdoton. Du viroj konversacias. La unua diras: H.2. La alia respondas: V.1. (Ensendendaj linioj)
Inter la solvintoj ni lotumos premiojn.
Limdato: du monatoj post la alveno de la revuo.

Horizontale: 13. Poseda pronomo, 14. Rilata al montaro inter Eŭropo kaj Azio, 15. Germana verkisto, aŭtoro de fama milita taglibro (Ludwig), 16. Trinkaĵo de la Olimpaj dioj, 18. Virnomo (R), 20. Deziranta alies posedaĵon, 21. Alta vira voĉ', 23. Pezo de pakaĵo de varo (R), 25. Havantaj formon de ovo aŭ elipsoido, 27. Ne tralasu likvaĵon! 29. Rusa imperiestro, 31. Malgrandan parton, 32. Idino (R), 33. Femalo, 34. Faroj, 35. Elportu, permesu, lasu, 36. Vokaloj de H. 18., 37. Mezurunuon de elektra rezistanco, 38. Tia estas fresko, 39. Verba finaĵo, 40. Surakva veturil', 41. Genr' de papagoj (kun artikolo), 43. Antaŭ mendoj por Hungara Vivo, 46. Malplena (R), 47. Lasta vort' de preĝ', 48. Plipurigi substancon (R), 49. Prepozicio, 50. Prefikso, 51. Karesa formo de H. 18. en kelkaj lingvoj, 52. ...karlo: en princlando Monako, 54. Loĝanto de Eŭropa lando, 56. DS, 57. Estis en ia sanstato, 58. Publika oficisto, 60. Unuaranga.

Vertikale: 2. Du prepozicioj, 3. Dolĉa alkoholaĵo, 4. Deklinacia kazo, 5. Rapide iri (R), 6. Sistemon de montaraj kavoj, 7. EA, 8. Rapida mov' svingi sin antaŭen, 9. Loĝanton de norda lando, 10. Ago sin movi, 11. Afable, 12. Sufikso por parto, 17. Identaj vokaloj, 19. Ege malproksimaj (du vortoj), 22. Ĉambroj, 24. Tio, kion oni akiris, 26. Multaj ĝardenaj nutraĵoj, 28. Specio de siringo (R), 30. Membro, 34. Korinklinoj, 35. Teksaĵon, 37. Malproksiman, senkomence! 38. Fortega inklino, 40. Katolika altrangulo, 41. Direktis ŝipon kontraŭvente, 42. Pli utila



(R), 44. Ne profesiul', 45. Hordoj, 49. Plene ripozi, 51. Bruligebla marĉa materialo (R), 52. Turka gren', 53. Pene delokigi al si, 55. Kolorigil', 57. FRD, 59. Tabelvorto, 60. Eko de peko!

I. Z.

Solvo de la krucenigmo en la numero 1988/3:

Ĉielarko; Mihok; Aŭtuna foliaro; Tri kamaradoj; Kancero de animoj (Pardonu nin pro ĉi tiu eraro: la ĝusta titolo de la rakonto estas „Kancero de animo", do en singularo.); Migranta plumo; La mar' furiozas. (Verkoj de Julio Baghy.)

Premion gajnis per lotumado:

S-ro Grzegorz Ciemny, Bydgoszcz, PL; s-ro Hans Hofmann, Jena, GDR; s-ino Margrethe Thorsen, Bronhŏj, Danio.

Pardonon! La solvo en la n-ro 1988/4 estas kompreneble tiu de la krucenigmo en la n-ro 1988/1. kaj ne la false indikita!

EKZAMENO SEN RISKO

Ekzamenanto: Márton Fejes

Doktoro Braun vivas en ni Kripto

de Julian Modest

Du teatraĵojn enhavas tiu ĉi libro de la konata proza kaj dramverkisto.

1. En kiu jaro estis Klaus Hard oficiala korespondanto de „Vespera Kuriero" en Montario?
2. Kiun donacon portis Gustav al Lina?
3. Kiun profesion havas Gustav?

Limdato: du monatoj post la alveno de la revuo.

Solvo de la demandoj en la n-ro 1988/3;

1. La slavdevena familia nomo de Spertozza signifas: kudristo, kudrista, tajloro.
2. La adiaŭleteron al Jozefo skribis Senjo.
3. La titolo de la citita poemo: „Estis vintro".

(Adolesko, romano de Blazio Vaha)

Premion gajnis per lotumado: s-ro T. Dahlenburg, Brüel, GDR; s-ro Sergej Korda, Tiraspol, SU. La librojn ni jam sendis al la gajnintoj.

Korespondi deziras

S-ro Neil Batt, Parizo, F: Ni devas respondi, ke en Esperanto nenio troveblas pri la granda hungara muzikisto Ferenc Liszt. – Ne nur el lingva vidpunkto (fakterminoj!) vi komprenas do la gravecon de niaj diversfakaj artikoloj kaj reklamoj, ofte teknikaj; havas vere grandan valoron, ke ili konfirmas la uzeblon de Esperanto en negocaj kaj fakaj rilatoj, ĉar entreprenoj volonte pagas por tiel disvastigi informojn pri siaj agadoj kaj produktaĵoj! Ke tiuj pagoj helpas nian revuon aperi en eleganta, kolora aspekto (malaltpreze!) tio kompreniĝas de si mem. Dankon pro tiuj pensoj!

S-ino Kornélia Nagy, Odorhei Secuiesc, R: La spritaj scenoj (Sekreto de l'feliĉo) distrantaj emeritojn en vilaĝoj estis lerte tradukitaj – tamen ilin bedaŭrinde povas utiligi nek „Világ és Nyelv" (ĉi-jare jam ne aperis), nek nia revuo. Pro la salutinda originala celo ni deziras veran sukceson al la bravaj kulturagantoj, kiuj surscenigas ilin hungare inter nefacilaj cirkonstancoj. Varmajn bondezirojn al vi, okaze de via emeritiĝo!

S-ro Ivars Barševski, Sovetsk, SU: La ĉarma alridantino surkovrile de nia n-ro 1988/2 akiris plaĉon en via rondo. – Niajn reklamojn bonvolu trakti ankaŭ kiel lingvajn ekzercojn, kiuj kondukas foren de la ĉiutaga konversacio, aŭ de via fako. Anstataŭigi ilin per ĉapitroj de „Kulturo de Amo" verŝajne malplaĉus al multaj legantoj; eĉ se tiu libro dulingva vendiĝis jam en rekorda nombro de 286 mil ekzempleroj. Tio havas grandan varbefikon ankaŭ por Esperanto! Pripensu, ke manke de pagitaj reklamoj H.V. estus eldonebla nur en magra amplekso de 14-16 paĝoj, multe pli simple; aŭ la abonprezo triobliĝus, ĝenante certe vin kaj multajn! ĉie ajn revuoj varbas reklamojn informoplenajn, kaj ne laste, favore al la poŝo de la abonantoj.

S-ro Xiao Yong-Sheng, urbo Ŝaŝi, prov. Hubei, Ĉinio: Nia leganto, biblioteka inĝeniero, prezentis al ni interesan recenzon longan pri moderna ĉina jarlibro, sed bedaŭrinde sen ia ajn rilato al nia movado. Tia tradukaĵo bedaŭrinde neniel konvenas al H.V. Permesu al ni doni la konsilon, ke tia proza teksto bezonas multe pli da lingva rutino – kiel ajn facila ŝajnas nia lingvo – ĉar tradukado estas multe-multe pli malfacila tasko ol ĉiuj aliaj lingvo-uzadoj, interparolo aŭ eĉ prelego.

S-ino J.C. v. Veenendaal, Amsterdam, NL: Ni legis plezure vian artikolon pri la komencaj jaroj de TEJO kaj ĝia gazeto La Juna Vivo, redaktita de via patrino, E. van Veenendaal-Bouwes. Pri ŝia sindone entuziasma agado ni jam rememoris omaĝe en n-ro 1988/3 (sendita al vi). La duonjarcenta jubileo de TEJO bezonas kompiladon de ĝia frua historio, do ni atendas la sekvajn artikolojn pri ĝi de vi, kiel atestanto kaj partopreninto. Varmajn salutojn!

S-ro Anatolij Surnakin, Moskvo, SU: La bondezirojn ni transdonis al la esperantista familio Polgár, kies tri junaj filinoj: Zsuzsa, Judit kaj Zsófia vekis tutmondan furoron per grandioza venko de virina team-ĉampionado en ŝak-olimpiko, Saloniki. En nia n-ro 1985/4, p. 124/5 jam aperis intervjuo kun Susana; pri ilia celkonscia edukado disvolvanta ilian talenton, verkis studon mem la patro László Polgár por FOKUSO 1987/3, p. 9-19, kun multaj bildoj.

S-ino Halina Komar, Nowy Sacz, PL: „Se vi ne volas esti soleca, venu!" – invitas vin letero kun gaja flugfolio al „Int. Renkonto Kun Koro" en montara feria vilaĝo Krynica. Nu, se via Esperantotur-filio eĉ minacas nin, ke „Flirti estas permesate!" – ni nepre petos forpermeson de edzinjo por rapide aliĝi al la du-semajna programo (surprize malkara) fine de junio. Por tamen ne iri sola, jen via adreso: Al. Wolności 37F, PL-33-300.

LETERKESTO

S-ro Emil *Timm,* ktm, pĉt. *Kyritz* O.Grothewohl-str. 3A, DDR-1910. – F-ino Nora *Görke,* (18) ktm, pĉt. *Blumenthal* Waldhof, DDR-1921. – Lektoro Valdas *Moriakinas* (31) pri div. temoj, kun H k.a. landoj. *Kaunas* Biliuno aleja 55-24, Litovio SU-233.016. – Studentino Daiva *Dilbaité* (19) ktm, *Vilnius* Taikos 38-30, Litovio SU-232.035. – Historiisto *Pikov* Gennadij (36) aparte pri mezepoko, literaturo, fotado k.a. *Novosibirsk* Vibornaja 97, loĝ.34, Su-630.126. – Edukistino Tatjana *Dĵurilo* (23) pri naturo, vojaĝo, pentrarto, pedagogio, kol. bk, pm, kalend., *Krasnodar* ab.ja. 377, SU-350.040. – F-ino Miroslawa *Kociel* (23) pri turismo, fotado, Eo. Kol. ilustr. revuoj, bk, tur. prosp. *Gdansk* ul. Lumumby 32 B7, PL-80-367. – Studento Radoslaw *Ragan* (22) pri historio, literaturo, lingvoj, muziko, sporto, kol. bk. *Katowice* ul. Stefan Batorego 7/1 PL. – Lernantino Dorota *Mazurek* (17) pri muziko, literaturo, lingvoj. *Lublin* ul. Kniczkawskiego 20/9, PL-20-468. – Instruistino Marianna *Mól* (52) pri literaturo, turismo. *Bydlin* ul. Wolbromska 87. PL-32-313. – Lernanto Marcin *Majchrzak* (18) pri mod. muziko, fotado. Kol. bk, naturisto, kun junuloj. *Owinska* ul. Polna 12, PL-62-005. – Ĉina lernanto *Tang* Yong (18) praktiki E-on. *Shanghai* Chongming Normal School, Klas 2. P.R. Ĉinio 202.177. – Studentino Lenka *Klimová* (24) pri sporto, naturo (biologion studas), elektroniko, komputiloj, kun H. *Drazkovice* 33, CS-533 33. – Inĝ. konstruisto Sergej *Suhockij* (34) ktm, pĉt. *Gomel* p/k 99. SU-246.050. – S-ro *Kántor* János (55) oficisto, ktm, pri naturismo k.a. *Nyíregyháza* É-krt 4 H-4400. – Ekonomikisto Vencislav *Benovski* (38) pĉt kun H. CS, Su, R, GDR. *Bjala Slatina* pk. 134. BG-3200. – Grzegorz *Wienĉ* (29) laboristo, naturisto, pri turismo, mod. muziko, foto, kino, kol.bk, kun junuloj. *Owinská* ul. Dworcowa 5/9. PL-62-005. – Oficisto Wieslaw *Wojdylak* (28) pri turismo, literaturo. *Przemysl* ul. Monte Cassino 16/19. PL-37-700. – Inĝ. geofizika *Mamed-zade* Vadim (29) ktm, pri ĵaz- k mod. muziko, teatro, montturismo, kol. diskoj, E-aĵoj. *Baku* Avakjana 43-12. SU-370.138. – S-ro Leo *Teder* ktm, pĉt. interŝ. pm, bk, kalend. *Kilingi Nómme*, Nómme sovhoz, Estonio SU-203.622. –

HUNGARA VIVO * Ĉefredaktoro: Vilmos Benczik * Redakta Komitato: Szilárd Bálint, Stefan McGill, Tibor Bessenyei, Márton Fejes, Ervin Fenyvesi, István László, d-ro György Nanovfszky, Péter András Rados, Sándor Révész, Zsuzsa Varga-Haszonits. * Ĉefkunlaborantoj: Mihály Gergely, Alfons Pechan, Aurél Ponori-Thewrewk * H-1368 Budapest, pk. 193. Telefono: 563-659, 564-093. Eldonas: Hungara Esperanto-Asocio. * Respondeca eldonanto: Oszkár Princz. * Disvastigas la Hungara Poŝto. Aboneblas en ĉiuj poŝtoficejoj, ĉe la gazetkolportistoj de la Centra Gazetoficejo de la Poŝto (HELIR, Budapest XIII. Lehel u. 10/a. H-1900) senpere aŭ per poŝtmandato. * Abonprezo por jaro (ses numeroj) 11,- USD aŭ egalvalora sumo en alia valuto. *
Indexszám: 25 377 0018-7704, ISSN 0018-7704.

HALOJN

FRIDHALOJN

DEPONEJOJN

GIMNASTIKEJOJN

PER MALPEZAJ KONSTRUMATERIALOJ!

– Rapide
– En bona kvalito
– Je favoraj prezoj

de

CSOMIÉP

en uzpreta stato...

Por viaj planoj de teknika evoluigo ni ofertas
niaj servojn kaj referencajn konstruaĵojn.

PER NI ĈIO MARŜAS PLI FACILE...

HÓDMEZŐVÁSÁRHELY
Tanácsköztársaság tér 59.
6801
Telefono: 62/41-433
Telekso: 84-235

Hódmezővásárhely
fabriko de Modaj Trikotajoj

HÓDMEZŐVÁSÁRHELYI
HÓDIKÖT
DIVAT KÖTÖTTÁRUGYÁR

liveras al pli ol
20 landoj
trikitaju - kroĉetitajn
vestoju virajn kaj virinaju

1989 FEB 1 7